

Ĉe la koro de la tero

Edgar Rice Burroughs

The background of the lower half of the page is a solid cyan color. It is decorated with various magenta geometric shapes: a large triangle on the left, a smaller triangle on the right, several horizontal and vertical lines of varying lengths, and a curved line that starts from the left and curves towards the right. The text 'Project Gutenberg' is written in white at the bottom right, partially overlapping the cyan background and the magenta shapes.

Project Gutenberg

The Project Gutenberg eBook of Ce la koro de la tero, by Edgar Rice Burroughs

This eBook is for the use of anyone anywhere at no cost and with almost no restrictions whatsoever. You may copy it, give it away or re-use it under the terms of the Project Gutenberg License included with this eBook or online at www.gutenberg.org

** This is a COPYRIGHTED Project Gutenberg eBook, Details Below **
** Please follow the copyright guidelines in this file. **

Title: Ce la koro de la tero

Author: Edgar Rice Burroughs

Translator: Gary Mickle

Release Date: March 12, 2007 [EBook #20802]

Language: Esperanto

*** START OF THIS PROJECT GUTENBERG EBOOK CE LA KORO DE LA TERO ***

Edgar Rice Burroughs

Ĉe la koro de la Tero

Tradukita de Gary Mickle

Originala anglalingva titolo: At the Earth's Core.

Traduko kopirajtita 2001 de Gary Mickle.

Ĉi tiu elektronika teksto estas nur por privata uzo. Oni ne rajtas republikigi ĝin profitcele en presita aŭ alia formo sen la eksplicita konsento de la kopirajto-posedanto. Permespetojn oni adresu al: Gary Mickle,

Brüsseler Str. 6, DE-13353 Berlin, Germanio aŭ gmickle@nexgo.de.

Translation Copyright 2001 by Gary Mickle.

This Etext is for private use only. No republication for profit in print or other media may be made without the express consent of the Copyright Holder. Requests for permission should be addressed to: Gary Mickle, Brüsseler Str. 6, DE-13353 Berlin, Germany or gmickle@nexgo.de.

Enhavo

[Noto de la tradukanto](#)

[Antaŭparolo](#)

1. [Al la Eternaj Fajroj](#)
2. [Stranga Mondo](#)
3. [Novaj Mastroj](#)
4. [Dian la Bela](#)
5. [Sklavoj](#)
6. [Komenco de Hororo](#)
7. [Liberiĝo](#)
8. [La Templo de la Maharoj](#)
9. [La Vizaĝo de la Morto](#)
10. [En Futra Denove](#)
11. [Kvar Mortaj Maharoj](#)
12. [Postĉaso](#)
13. [La Ruzulo](#)
14. [En la Ĝardeno Edena](#)
15. [Reiro al la Tero](#)

Noto de la tradukanto

Ĉi tiu Interreta eldono estas reviziita versio de la traduko, kiu disponeblis rete ekde 2001. La antaŭa teksto estis nur parte reviziita Esperanta traduko en tiu stato de relativa kompletiĝo, kiun ĝi atingis ĝis 1997. Partoj de la teksto estis lingve kaj stile mankohavaj.

Mi komencis mian tradukon de ĉi tiu romano (kiu eldoniĝis unuafoje anglalingve en 1922) en 1968, eklerninte Esperanton du jarojn antaŭe. Tuj komence, mi intencis nur ekzerci la lingvon. La decido traduki ĝuste ĉi tiun tekston estis la frukto de maksimume kvinminuta pripensado. Nur post iometa progreso mi iĝis pli kaj pli ambicia kaj finfine persistis ĝis la fino.

Tiam mi flankenmetis la manuskripton, kaj ĝi ripozis sur mia librobreto 25 jarojn. Aĉetinte komputilon antaŭ jaroj, mi rememoris ĝian ekziston kaj pripensis, ke ĝi povus interesi kelkajn homojn, do mi retajpis la tuton sen ĝeni min per дума korektado aŭ reviziado. Iom poste mi tamen zorge reviziis kelkajn partojn, sed tute ne ĉion. Sed nun mi faris la plenan revizian laboron, por kiu mi ne havis sufiĉe da tempo antaŭ kelkaj jaroj.

La romano povus tre plaĉi al tiuj, kiuj ŝatas rapidmovajn aventurrakontojn sen ĝisnubaj literaturaj pretendoj, tipaj por tiu ĝenro de frutempa sciencfikcio. Ankaŭ Esperanto-komencantoj povus ŝati ĝin pro ĝuste tiuj kvalitoj.

Edgar Rice Burroughs kaj la Pelucidaro-serio

La nomo de Edgar Rice Burroughs (1875-1950) estas malpli konata ol tiu de la plej fama figuro de lia literatura kreado, Tarzan, la rolulo de granda romanserio, poste de filmaj kaj komiksaj adaptaj. Liaj tri aliaj grandaj romanserioj estas la marsa, la venusa kaj la pelucidara. *Ĉe la koro de la Tero* estas la unua romano de la pelucidara serio. Lia verkaro sumiĝis je 68 romantitoloj.

Burroughs naskiĝis en riĉa familio en Ĉikago kaj trapasis mallongan armean

karieron. Geedziĝinte en 1900, lia edzino Emma kaj li havis du filojn kaj unu filinon. Dum la unuaj jaroj la familio vivis preskaŭ en malriĉeco. Burroughs ofte ŝanĝis la laborlokon. Lia vivstato pliboniĝis, kiam li 35-jara komencis verki por popularaj fikcigazetoj. Lia unua publikigita verko estis *Sub la lunoj de Marso*, ekaperinta felietone en 1912. Samjare li eldonis la faman *Tarzan de la simioj*, kaj jam en la posta jaro li povis fondi propran eldonejon. Komence de la 20-aj jaroj li verkis mezume tri romanojn jare por povi pagi sian luksan vivstilon kaj por kompensi siajn malbonajn financajn investojn. Dum la 2-a mondmilito li laboris kiel militraportisto en la suda Pacifiko. Li mortis de kormalsano en 1950.

Kvankam la literatura kritiko ofte taksas la verkojn de Burroughs krude verkitaj kaj ŝablonecaj—li ja mem diris iam al intervjuanto, ke li ne trompas sin pri la “beletraj” kvalitoj de sia verkaro—ili facile ensorĉas legantojn per sia rapidmoveco kaj fantazipleno, kiun akklamis verkistoj kiel Ray Bradbury kaj Arthur C. Clarke. Jane Goodall, zoologino, kiu esploris la grandajn simiojn de Afriko, atribuis sian unuan junaĝan fascinon pri sia estonta esplortemo al la Tarzan-libroj. La “simiohomo” Tarzan efektive iĝis parto de la populara kulturo de la 20-a jarcento, kies maleston oni malfacile povus imagi.

La leganto ne povas pretervidi en la verkoj de Burroughs elementojn, kiuj laŭ la hodiaŭa juĝo estas ne tre “politike ĝustaj” kaj foje rasismaj. Neblankuloj ne ĉiam, sed ofte rolas kiel maliculoj, la kolonianta-rola de la blankuloj estas kvazaŭ memkompreneblaĵo, kaj la prezentata rilato inter viroj kaj virinoj sekvas la normkompreneojn de antaŭ kelkaj generacioj. Burroughs plene dividis la regantan mondrigardon kaj la socitipajn antaŭjuĝojn de siaj usonaj samtempuloj —kaj tiuj antaŭjuĝoj estas multloke kvazaŭ palpeblaj por legantoj.

En la Pelucidaro-serio, al kiu apartenas *Ĉe la koro de la Tero*, la maljuna sciencisto Abner Perry kaj juna akompananto, la romanheroo David Innes, tratunelas la Teron 800 kilometrojn per unika borveturilo ĝis la kava spaco en la mezo de la planedo. Tie ili renkontas vivoformojn, kiuj formortis sur nia Tero antaŭ milionoj da jaroj, sed ankaŭ civilize ŝtonepokan homaron, sklavigitan de drakosimilaj reptilioj, la potencaj maharoj, mastroj de la interna mondo. Pelucidaron, la landon de eterna tagmezo, lumigas miniatura suno, kiun la gravita forto tenas pendanta en la centro de la kavaĵo. La du novalvenintoj baldaŭ rekonas sian mision: alporti al la pelucidara homaro kulturon kaj civilizon, kaj liberigi ĝin elsub la maharoj, venigante ĝin al ĝia laŭrajta loko pinte de la specioj.

ANTAŬPAROLO

Unue, bonvolu memori, ke mi ne supozas, ke vi kredos ĉi tiun historion. Do vi ne mirus pri lastatempa travivaĵo mia, en kiu, kirasite per naiva fido, mi senĝene rakontis ĝian esencon al membro de la Reĝa Geologia Societo okaze de mia lasta vojaĝo al Londono.

Certe ŝajnus al vi, kvazaŭ oni kaptis min ĉe tiel abomena krimo kiel la ŝtelo de la Juveloj de la Krono el la Turo^[1] aŭ la venenado de la kafo de lia Moŝto la Reĝo.

La erudiciulo, al kiu mi konfidis, glaciigis antaŭ ol mi atingis la duonon—nur tio savis lin de eksplodiĝo—kaj miaj revoj pri honora membreco en la Societo, oraj medaloj kaj niĉo en la Glorhalo forvaporiĝis en la maldensan, fridan aeron de lia arkta teniĝo.

Sed mi kredas la historion, kaj ankaŭ vi kredus, kaj ankaŭ la klerulo de la Reĝa Geologia Societo kredus, se vi ambaŭ povus aŭdi ĝin el la buŝo de tiu viro, kiu rakontis ĝin al mi. Se vi estus vidinta, kiel mi, la fajron de veremo en tiuj grizaj okuloj, aŭdinta la tonon de sincero en tiu mallaŭta voĉo, sentinta la kortuŝecon—ankaŭ vi kredus. Vi ne bezonus la definitivan pruvon, kiun mi vidis: la bizaran ramforinko-similan beston, kiun li kunportis el la interna mondo.

Mi trovis lin tute subite kaj ne malpli neatendite, ĉe la rando de la granda Sahara Dezerto. Li staris antaŭ kaprofela tendo meze de areto da daktilpalmoj ĉe eta oazo. Araba tendaro kun ok aŭ dek tendoj staris proksime.

Mi estis en Afriko por ĉasi leonojn. Mia trupo konsistis el dek du dezertidoj; mi estis la sola “blankulo”. Dum ni proksimiĝis al la punkto de verdaĵo, mi vidis la viron eliri el sia tendo kaj scivoleme rigardadi al ni, ombrante siajn okulojn per levita mano. Ekvidinte min, li rapidis antaŭen por renkonti nin.

“Blankulo!” li ekkriis. “Laŭdon al la Sinjoro! Jam de horoj mi vin rigardas, esperante, sed ankaŭ dubante, ke ĉi-foje venas blankulo. Diru al mi la daton. Kiun jaron ni havas?”

Kaj kiam mi respondis, li ŝanceliĝis kvazaŭ batite rekte sur la vizaĝon, kaj li devis ekkapti la ledrimenon de mia piedingo por sin apogi.

“Ne povas esti!” li kriis post momento. “Ne povas esti! Diru, ke vi malpravas aŭ ke vi nur ŝercas.”

“Mi diras al vi la veron, mia amiko,” mi respondis. “Kial mi trompus aŭ provus trompi nekonaton pri tia banalaĵo kiel la dato?”

Dum longa tempo li staris silenta kaj kun klinita kapo.

“Dek jaroj!” li murmuris finfine. “Dek jaroj, kaj mi kredis, ke pasis apenaŭ pli ol unu!”

Dum tiu nokto li rakontis al mi sian historion—tiun, kiun mi kiel eble plej fidele ripetas, laŭ mia memoro, al vi.

Subnoto

[1] la Turo de Londono.

1-a ĉapitro

AL LA ETERNAJ FAJROJ

Mi naskiĝis en Connecticut^[2] antaŭ proksimume tridek jaroj. Mia nomo estas David Innes. Mia patro estis riĉa minejposedanto. Li mortis, kiam mi estis deknaŭjara. Laŭ lia testamento mi post la plenaĝiĝo ricevos lian tutan havaĵon, kondiĉe ke dum la antaŭaj du jaroj mi diligente dediĉu min al la heredota granda firmao.

Mi faris ĉion, kion mi kapablis, por plenumi la lastajn dezirojn de mia patro—ne pro la heredaĵo, sed ĉar mi amis kaj honoris mian patron. Ses monatojn mi laboregis en la minejo kaj en la kontoroj, ĉar mi volis ekkoni ĉiun detalon de la negoco.

Tiam Perry interesis min pri sia inventaĵo. Li estis maljunulo, kiu dediĉis la plej longan parton el sia longa vivo al la perfektigo de meĥanika subtera borveturilo. Kiel distraĵon li studis paleontologion. Mi studis liajn planojn, aŭskultis liajn argumentojn, ekzamenis lian funkciantan prototipon—kaj, konvinkite, mi disponigis la necesajn monrimedojn por konstrui plenampleksan, praktikan borveturilon.

Mi ne klarigos nun la detalojn de ĝia konstruo; ĝi kuŝas en la dezerto, proksimume du mejlojn^[3] for. Morgaŭ vi eble volos rajdi tien por vidi ĝin. Simple dirite, ĝi estas ŝtala cilindro cent futojn^[4] longa, artikizita, por ke ĝi tordiĝu kaj turniĝu tra solida roko, se necese. Ĉe unu ekstremo estas potenca borilo funkciigita de motoro, kiu laŭ Perry produktas pli da potenco je la kuba colo^[5] ol iu ajn alia motoro produktas je la kuba futo. Mi memoras liajn pretendojn, ke la motoro sola povus enorme riĉigi nin—ni intencis publike konatigi la tutan aferon post la sukceso de nia unua sekreta elprovo—sed Perry neniam revenis de tiu prova vojaĝo, kaj mi revenis nur post dek jaroj.

Mi memoras la sortodecidan nokton, kvazaŭ ĝi estus la hieraŭa, en kiu ni intencis elprovi la praktikecon de tiu mirinda inventaĵo. Estis preskaŭ

noktomeze, kiam ni iris al la alta turo, en kiu Perry estis konstruinta sian “feran talpon”, kiel li ŝatis nomi ĝin. Ĝia granda nazo ripozis sur la nuda tero. Ni trapasis la pordojn de la ekstera blendo, sekure fermis ilin, trapasis al la kajuto en la interna cilindro, kiu entenis la regadmeĥanisman, kaj ŝaltis la elektrajn lampojn.

Perry rigardis al sia generatoro; al la grandaj rezervujoj, kiuj tenis la vivdonajn ĥemiaĵojn, per kiuj li produktos freŝan aeron por anstataŭi tiun, kiun ni forzos spirante; al siaj mezurinstrumentoj, kiuj registros temperaturojn, rapidecon, distancon, kaj kiuj analizos la trapasatajn rokaĵojn.

Li provis la stirilon kaj superrigardis la fortajn dentradojn, kiuj transdonos mirindan rapidecon al la giganta borilo ĉe la nazo de lia stranga veturilo.

Niaj seĝoj, en kiujn ni zonis nin, estis tiel fiksitaj sur transversaj stangoj, ke ni sidus ekvilibre, egale ĉu la maŝino plugus vojon malsupren en la internaĵon de la Tero, ĉu ĝi moviĝus horizontale laŭlonge de granda karbvejno, aŭ ĉu ĝi suprenirus vertikale al la supraĵo.

Finfine ĉio pretis. Perry klinis sian kapon kaj preĝis. Dum momento ni silentis, kaj tiam la mano de la maljunulo ekkaptis la ŝaltostangon. Eksonis timiga muĝego sub ni—la giganta framo tremis kaj vibris—aŭdiĝis ekbruego, kiam la mola grundo ekpasis tra la kavaĵo inter la interna kaj ekstera blendoj kaj deponiĝis malantaŭ ni. Ni ekiris!

La bruo estis surdiga. Estis terura sento. Dum plena minuto nek li nek mi povis fari ion alian ol kroĉiĝi per la proverba malespero de dronanto al la teniloj de niaj balancantaj seĝoj. Tiam Perry ĵetis rigardon al la termometro.

“Aj!” li kriis, “ne povas esti—rapide! Kion montras la distancometro?”

Tio kaj la rapidometro estis ĉe mia flanko de la kajuto, kaj dum mi turniĝis por kontroli, mi povis vidi Perry murmuranta.

“Altiĝo je ses gradoj^[6]—ne eblas!” kaj poste mi vidis lin timplene tiregi je la stirilo.

Kiam mi fine trovis la etan montrilon en la obskuro, mi ekkomprenis la videblan eksciton de Perry, kaj mia koro sinkis. Sed kiam mi parolis, mi kaŝis la timon, kiu hantis min.

“Estos jam sepcent futoj, Perry,” mi diris, “antaŭ ol vi povos turni ĝin horizontalen.”

“Vi devos helpi min, knabo,” li respondis, “ĉar mi mem ne povas eĉ moveti ĝin el la vertikala pozicio. Dio permesu, ke nia kuna forteco estu egala al la tasko, ĉar alie ni certe pereos.”

Mi serpentumis al la flanko de la maljunulo, ne dubante, ke la granda rado tuj cedos al la potenco de miaj junaj kaj viglaj muskoloj. Kaj mia kredo ne estis nura egoismo, ĉar miaj kamaradoj ĉiam trovis mian korpon tre enviinda. Kaj ĝuste tial ĝi fortiĝis pli ol la naturo intencis, ĉar mia komprenebla fiero pri mia granda forteco igis min prizorgi kaj fortigi miajn muskolojn kaj korpon per ĉiu ebla rimedo. Per boksado, futbalo kaj bazopilko mi trejnigis min ek de la infaneco.

Do kun la plej granda memfido mi ekkaptis la grandan feran radrondon; sed kvankam mi uzis ĉiun unkon de mia forto, mia plej granda peno estis tiel senefika kiel tiu de Perry—la ilo tute ne moviĝis—la malvarma kaj senesperiga teruraĵo, kiu tenis nin rekte sur la vojo al la morto!

Fine mi ĉesigis la senefikan lukton kaj sen parolo reiris al mia sidloko. Ne necesis vortoj—almenaŭ al mi nenio ŝajnis direnda, kvankam Perry eble dezirus preĝi. Kaj mi estis tute certa, ke li dezirus, ĉar li neniam preterlasis okazon fari preĝon. Li preĝis, kiam li vekiĝis, li preĝis antaŭ ol manĝi, li preĝis post la manĝo kaj nokte, antaŭ ol enlitiĝi, li preĝis denove. Intertempe li ofte trovis aliajn okazojn preĝi, eĉ kiam la motivo ŝajnis iom dubinda laŭ mia mondeca vidpunkto—nun, kiam li estis baldaŭ mortonta, mi antaŭvidis kun granda certeco veran orgion de preĝado, se decas per tia metaforo aludi agon tiel solenan.

Sed je mia mirego mi malkovris, ke, kiam la morto rigardaĉis en lian vizaĝon, Abner Perry transformiĝis en novan personon. El lia buŝo eliris ne preĝoj, sed klara rivero de nemoderigitaj blasfemoj, ĉiuj direktitaj kontraŭ tiu kviete obstina meĥanismo.

“Ŝajnas al mi, Perry,” mi riproĉis, “ke viro de via pretendita pieco preferus preĝi ol blasfemi, kiam la morto proksimiĝas.”

“Morto!” li kriis. “Ĉu tio ĉagrenas vin? Nia morto estas sensignifa, kompare kun la perdo, kiun la mondo devos suferi. Sciuj, David, ke per tiu ĉi fera cilindro ni elmontris eblecojn, pri kiuj la scienco apenaŭ eĉ revis. Ni utiligis novan principon, kaj per ĝi ni donis al masiva peco de ŝtalo la potencon de dekmil

viroj. La estingiĝo de du homaj vivoj interne de la Tero tute ne estas komparebla kun la mondotragedio, kiu entombigos en la interno de la Tero la eltrovaĵojn, kiujn mi faris kaj elprovis en la sukcesa konstruo de la maŝino, kiu portas nin pli kaj pli proksimen al la eternaj fajroj de la centro de la Tero.”

Mi ne hezitas konfesi, ke mi pli multe maltrankviliĝis pri nia propra sorto ol pri ia eventuala perdo suferota de la mondo. La mondo almenaŭ nenion sciis pri sia perdo, dum al mi la afero estis reala kaj terura.

“Kion ni faru?” mi demandis, maskante mian ĉagrenon per malalta kaj firma voĉo.

“Ni povus halti ĉi tie kaj morti de sufokiĝo, kiam malpleniĝos niaj aer-rezervujoj,” respondis Perry, “aŭ ni povus daŭrigi antaŭen kun la eta espero, ke ni baldaŭ sufiĉe devojigos la borveturilon el ĝia vertikala pozicio, por ke ni iru laŭ la arko de granda cirklo, kio finfine revenigus nin al la tersupraĵo. Se ni sukcesos je tio antaŭ ol atingi la tre altan temperaturon de la interno, ni eble saviĝos. Laŭ mia opinio, povas esti unu ŝanco de sukceso kontraŭ kelkaj milionoj, ke ni malsukcesos—se ni daŭrigos antaŭen, ni mortos pli rapide, sed ne malpli certe ol se ni sidos senfare, atendante la torturon de malrapida kaj terura morto.”

Mi ekrigardis la termometron. Ĝi montris 110 gradojn. Kaj dum ni parolis, la fortega fera talpo boris pli ol mejlon plu en la rokon de la Tera krusto.

“Ni daŭrigu, do,” mi respondis. “Kun ĉi tiu rapideco baldaŭ venos la fino. Vi neniam informis min, ke la rapideco de la maŝino estos tiel alta, Perry. Ĉu vi sciis?”

“Ne,” li respondis. “Mi ne povis precize kalkuli la rapidecon, ĉar mi ne havis instrumenton, kiu povus mezuri la egan potencon de mia generatoro. Sed mi kredis, ke ni moviĝos po proksimume kvincent jardojn^[7] hore.”

“Kaj ni moviĝas po sep mejlojn hore,” mi konkludis por li, rigardante la distancometron. “Kiel dika estas la krusto de la Tero, Perry?” mi demandis.

“Ekzistas preskaŭ tiom da konjektoj, kiom geologoj,” li respondis. “Oni taksas ĝin je tridek mejloj, ĉar la interna varmeco, kiu pliiĝas po proksimume unu gradon je ĉiu sesdek- aŭ sepdekfuta profundiĝo, sufiĉus por fandi la plej fandimunajn substancojn je tiu distanco sub la tersupraĵo. Sed alia supozas, ke la

fenomenoj de precesio kaj nutacio postulas, ke la Tero, se ĝi ne estas tute solida, devas havi kruston dikan je pli ol okcent mejloj. Do jen. Vi povas elekti.”

“Kaj se ĝi montriĝos solida?” mi demandis.

“Estos al ni finfine egale, David,” respondis Perry. “En la plej bona okazo sufiĉos nia fuelo por tri- aŭ kvartaga veturado, dum ne restos aero pli ol tri tagojn. Ambaŭ, do, ne sufiĉos por sendanĝere travojaĝi okmil mejlojn da roko al la antipodo.”

“Se la krusto estas sufiĉe dika, ni fine haltos inter sescent kaj sepcent mejloj sub la tersupraĵo; sed dum la lastaj cent kvindek mejloj ni estos kadavroj. Ĉu ĝuste?” mi demandis.

“Tute, David. Ĉu vi timas?”

“Mi ne scias. Ĉio okazis tiel subite, ke ŝajne nek vi nek mi komprenas la veran terurecon de nia situacio. Mi devus esti timigita ĝis paniko; tamen mi ne estas. Kredeble, la ŝoko estis tiel granda, ke ĝi multe obtuzigis niaj sentojn.”

Denove mi turnis min al la termometro. La hidrargo altiĝis pli malrapide. Nun la temperaturo estis nur 140-grada, kvankam ni jam penetris ĝis preskaŭ kvarmejla profundeco. Mi informis Perry, kaj li ridetis.

“Almenaŭ ni frakasis unu teorion,” li diris nur, kaj tiam li denove komencis blasfemi per pitoreskaj vortoj pri la stirilo. Unufoje mi aŭdis piraton blasfemi, sed ties plej bonaj klopodoj estis tiuj de amatoro kompare kun la science majstreca fiparolo de Perry.

Denove mi penis movi la stirilon, sed estis kvazaŭ mi provus svingi la Teron mem. Je mia propono Perry malŝaltis la generatoron, kaj kiam ni haltis, mi denove supermezure elverŝis mian tutan forton por movi la ilon eĉ la dikecon de haro—sed la klopodo estis tiel senfrukta kiel tiu farita dum nia plenrapideca veturo.

Mi malgaje balancis la kapon kaj montris la funkciigilon. Perry tiris kaj ni denove ekplonĝis malsupren en la eternecon po sep mejlojn hore. Ni sidadis kun la okuloj kvazaŭ gluitaj al la termometro kaj la distancometro. La hidrargo nun tre malrapide altiĝis, kvankam la 145-grada temperaturo estis preskaŭ neeltenebla en la mallarĝaj limoj de nia metala malliberejo.

Proksimume tagmeze, alie dirite, dekdu horojn post la komenco de tiu bedaŭrinda vojaĝo, ni jam boris ĝis profundeco de 84 mejloj, kie la hidrargo montris 153 gradojn.

Perry komencis denove esperi, kvankam el kiu fonto li povis ĉerpi ian ajn optimismon, mi ne povis konjekti. Anstataŭ blasfemi, li nun kantis—mi ekkredis, ke la premo de la situacio fine damaĝas lian psikon. Dum la lastaj horoj ni ne parolis, krom kiam li foje petis de mi ciferojn, kiujn montris la metroj, kaj kiam mi respondis. Mia cerbo pleniĝis de vanaj bedaŭroj. Mi rememoris plurajn farojn el mia pasinteco, pro kiuj mi feliĉus havi kelkajn jarojn pli por regajni mian honoron. Ekzemple, mi rememoris la okazaĵon en la Latin Commons ĉe Andover^[8], kiam Calhoun kaj mi metis pulvon en la fornon—kio preskaŭ mortigis unu el la mastroj. Kaj ankaŭ—sed kial maltrankviliĝi? Mi estis baldaŭ mortonta kaj pagonta por tiaj aferoj kaj por kelkaj aliaj. La varmeĉo jam sufiĉis, por ke mi anticipu tion, kio venos. Se plialtiĝus la temperaturo kelkajn gradojn, mi sentis, ke mi perdos la konscion.

“Kion montras la metroj nun, David?” la voĉo de Perry interrompis miajn malgajajn pensojn.

“90 mejlojn kaj 153 gradojn,” mi respondis.

“Ha! Ni bone disbatis tiun teorion pri la tridekmejla krusto, ĉu ne?”

“Kaj ĉu tio iel helpos nin?” mi regrumblis.

“Sed mia amiko,” li daŭrigis, “ĉu tiu temperaturo nenion signifas al vi? Ĝi ne altiĝis dum ses mejloj. Pripensu tion, junulo!”

“Jes, mi pripensas,” mi respondis, “sed kiam nia aerprovizo elĉerpiĝos, ĉu gravos, ĉu la temperaturo estas 153-grada aŭ 153.000-grada? Ni estos same mortaj, kaj krome, neniu scios.” Sed mi devas konfesi, ke pro iu neklarigebla kialo la senŝanĝa temperaturo ja fakte renovigis mian velkantan esperon. Kion mi esperis, estas neklarigebla. Kiel Perry penis klarigi, la malpruvo de pluraj tre precizaj kaj kleraj sciencaj hipotezoj montris, ke ni ne povas antaŭvidi, kio atentos nin en la interno de la Tero; do kial ne esperi pri io bona, almenaŭ ĝis nia morto—kiam ni ne plu bezonus esperon por esti feliĉaj. Tio estis tre bona kaj logika rezonado, do mi ĝin akceptis.

Cent mejlojn subtere la temperaturo *jam falis al 152,5 gradoj*. Kiam mi tion

anoncis, Perry etendis siajn brakojn por min ĉirkaŭpremi.

Ek de tiam, ĝis la tagmezo de la dua tago, la temperaturo konstante malpliiĝis. Baldaŭ ĝenis min la malvarmeco, kiu iĝis same netolerebla kiel la antaŭa varmego. Kiam ni atingis la profundecon de ducent kvardek mejloj, preskaŭ sveniga amoniaka haladzo atakis niajn nazojn, kaj la termometro registris –10 gradojn. Preskaŭ du horojn ni suferis tiun morde intensan malvarmon, ĝis proksimume 245 mejloj sub la tersupraĵo, kiam ni eniris tavolon de solida glacio, kie la hidrargo rapide altiĝis ĝis nulo. Dum la postaj tri horoj ni trapasis 10 mejlojn da glacio, finfine enirante alian serion de amoniakozaj tavoloj, kie la hidrargo denove falis al –10 gradoj.

Malrapide ĝi altiĝis denove, ĝis ni konvinkiĝis, ke ni fine proksimiĝas al la fandita terinterno. Je 400 mejloj la temperaturo atingis 153 gradojn. Febre mi rigardadis la termometron. Malrapide la hidrargo altiĝis. Perry jam ĉesis kanti kaj nun preĝis.

Niaj esperoj jam ricevis tian mortfrapon, ke la malrapide pliiĝanta varmeco ŝajnis al niaj skuitaj mensoj multe pli granda ol ĝi vere estis. Dum la posta horo mi atentis la supreniron de tiu senkompata kolono de hidrargo, ĝis je 410 mejloj ĝi montris 153 gradojn. En preskaŭ senspira streĉeco ni nun komencis rigardadi la ciferojn.

153 gradoj estis la maksimuma temperaturo renkontita super la glacia tavolo. Ĉu nun ĝi denove haltos, aŭ ĉu daŭros la senkompata altiĝo? Ni sciis, ke estas nenia espero; tamen, plenaj de energia vivpersisto, ni malcedeme esperadis, kvankam ni sciis, ke nia espero estas vana. La aer-rezervujoj jam estis preskaŭ malplenaj. Kio restis el la karega oksigeno, apenaŭ sufiĉis por vivteni nin dum 12 horoj. Sed ĉu tiam ni eĉ vivos? Ĉio ŝajnis al mi nekredebla.

Je 420 mejloj mi denove faris kontrolon.

“Perry!” mi vokis. “Perry! Ĝi falas! Ĝi falas! Estas 152 gradoj denove!”

“Aĥ!” li kriis. “Kion ĝi povus signifi? Ĉu eble la kerno de la Tero estas malvarma?”

“Mi ne scias, Perry,” mi respondis, “sed dank’ al Dio, se mi devas morti, mi ne mortos per fajro—nur tion mi timis. Mi povas fronti kian ajn morton, nur ne tian.”

Malsupren, malsupren falis la hidrargo, ĝis ĝi indikis la saman temperaturon kiel sep mejlojn sub la tersupraĵo, kaj tiam ni subite eksciis, ke la morto estas tre proksima. Perry eltrovis tion la unua. Mi vidis lin manipulanta la valvojn, kiuj regis la aerprovizon. Samtempe mi spertis malfacilan spiradon. Mi sentis kapturiniĝon, kaj miaj membroj iĝis pezaj. Mi vidis Perry kolapsi en sia seĝo. Li skuis sin kaj denove rektiĝis. Tiam li turniĝis al mi.

“Adiaŭ, David,” li diris, “jam venis la fino,” kaj tiam li ridetis kaj fermis la okulojn.

“Adiaŭ, Perry, kaj bonŝancon!” mi respondis, ridetante al li. Sed mi luktis kontraŭ tiu terura dormemo. Mi estis tre juna—mi ne volis morti.

Unu horon mi batalis kontraŭ la kruele proksimiĝanta morto, kiu atakis min de ĉiu flanko. Komence mi trovis, ke grimpinte en la trabaron super mi, mi povis trovi pli grandan kvanton da oksigeno, kaj dum iom da tempo tio vivtenis min. Verŝajne unu horon post la senkonsciiĝo de Perry mi fine eksciis, ke mi ne plu povos daŭrigi la neegalan lukton kontraŭ la neeviteblo.

Per mia lasta flagretanta konscio mi meĥanike turniĝis al la distancometro. Ĝi montris veturitan distancon de precize kvincent mejloj—kaj tiam la granda maŝino subite ekhaltis. Ĉesis la tondra klakado de la rokaĵo retroĵetata tra la spaco inter la ekstera blendo kaj la interna cilindro. La furioza turniĝado de la giganta borilo evidentigis, ke ĝi libere funkciadas en *aero*—kaj tiam min fulmobatis alia ekscio. La nazo de la borveturilo estis *super* ni. Tiam mi ekmemoris, ke ĝi direktiĝis supren, de kiam ni trapasis la glacian tavolon. Ni turniĝis en la glacio kaj poste kuris supren al la terkrusto. Dank’ al Dio! Ni estis ekster danĝero!

Mi metis mian nazon al la tubo, tra kiu ni intencis preni specimenojn dum la paso de la borveturilo tra la Tero, kaj mia plej granda sopiro realiĝis—fluego da freŝa aero verŝiĝis en la feran kajuton. Tiu ago lasis min en stato de kolapso, kaj mi perdis la konscion.

Subnotoj

[2] ŝtato en la nord-oriento de Usono.

[3] 1 mejlo = 1,61 km.

[4] 1 futo = 0,304 m.

[5] 1 colo = 2,54 cm.

[6] [farenhejta] grado: $32^{\circ} \text{ F.} = 0^{\circ} \text{ C.}$; $212^{\circ} \text{ F.} = 100^{\circ} \text{ C.}$

[7] jardo: 0,917 m.

[8] Andover: urbeto en la nordorienta usona ŝtato Massachusetts havanta plurajn konatajn superajn lernejojn kaj kolegiojn.

2-a ĉapitro

STRANGA MONDO

Mi estis senkonscia apenaŭ pli ol momenton, ĉar kiam mi plonĝofalis de la trabo, al kiu mi kroĉiĝis, mi koliziis kun la planko de la kajuto, kaj la frapego rekonsciigis min.

Mi zorgis unue pri Perry. Mi abomenis pensi, ke li povus morti tuj antaŭ la sojlo al saviĝo. Deŝirante lian ĉemizon, mi metis mian oreilon al lia brusto. Mi preskaŭ ekploris pro trankviliĝo—lia koro batis tute konstante.

Ĉe la akvorezervujo mi trempis mian poŝtukon kaj vigle frapis ĝin kelkfoje kontraŭ liaj frunto kaj vizaĝo. Post momento li min rekompencis per la levo de siaj palpebroj. Dum iom da tempo li kuŝis grandokula kaj senkomprena. Tiam lia skuita menso malrapide reordiĝis, kaj li eksidis, flarante la aeron kun mirega mieno.

“David,” li kriis fine, “jen aero, tiel certe kiel mia vivo. Sed kion signifas tio? Kie en la mondo ni estas? Kio okazis?”

“Ĝi signifas ja, ke ni reatingis la supraĵon de la Tero, Perry,” mi kriis, “sed mi ne scias ĝuste kie. Mi ankoraŭ ne malfermis la pordon. Mi estis tro okupita per via revivigo. Je Dio, homo, vi preskaŭ maltrafis vian saviĝon!”

“Vi diris, ke ni reatingis la supraĵon, David? Kiel tio povas esti? Dum kiom da tempo mi estis senkonscia?”

“Ne longe. Ni turniĝis en la glacia tavolo. Ĉu vi ne memoras la subitan turniĝon de niaj seĝoj? Ek de tiam la borilo estis super ni anstataŭ sub ni. Ni ne rimarkis ĝin tiam, sed nun mi ĝin memoras.”

“Ĉu vi diras, ke ni turniĝis en la glacia tavolo, David? Ne eblas. La borveturilo ne povas turniĝi, se io ne devojigas la nazon. Se io devojigus la nazon—iu ekstera forto aŭ rezisto—la stirilo moviĝus reage. La stirilo tute ne moviĝis ek de

nia starto, David. Vi scias tion.”

Mi ja sciis tion; sed jen la borilo hurlante turniĝadis en la aero, kaj ampleksaj kvantoj da aero verŝiĝis en la kajuton.

“Ne eblas, ke ni turniĝis en la glacia tavolo, Perry, tion ni ambaŭ scias,” mi respondis; “sed restas la fakto, ke ni faris ĝin, ĉar jen ni estas, denove sur la supraĵo de la Tero, kaj nun mi eliros por eltrovi ĝuste kie.”

“Prefere atendu ĝis la mateno, David—verŝajne estas noktomezo nun.”

Mi ekrigardis la kronometron.

“La dekdua horo kaj duono. Sepdek du horojn ni vojaĝis, do estus noktomeze nun. Sed malgraŭ tio mi intencas rigardi la benitan ĉielon, kiun revidi mi ne plu aŭdacis esperi,” kaj tion dirinte, mi levis la riglostangojn de la interna pordo kaj svingis ĝin malferme. La interblendejo entenis grandan kvanton da loza grundo, kiun mi devis forŝoveli por povi atingi la duan pordon en la ekstera blendo.

Post mallonga tempo mi forigis sufiĉe da grundo kaj rokaĵo al la planko de la kajuto por malkovri la eksteran pordon. Perry staris tuj malantaŭ mi, kiam mi ĵetis ĝin malferme. Ĝia supra duono estis super la tersupraĵo. Kun surprizita mieno mi turniĝis kaj alrigardis Perry—hela taglumo estis ekstere!

“Ŝajnas, ke iel fuŝiĝis aŭ niaj kalkuloj aŭ la kronometro,” mi diris. Perry kapneis—strange mienis liaj okuloj.

“Ni rigardu tra la pordon, David,” li kriis.

Kune ni elpaŝis kaj ekstaris, silente rigardante pejzaĝon samtempe groteskan kaj belan. Antaŭ ni malalta kaj ebena strando etendiĝis al silenta maro. Tiel malproksime kiel ni kapablis vidi, sennombraj insuletoj punktis la akvosupraĵon—kelkaj el ture altega, nuda, granita rokaĵo—aliaj ornamitaj per splenda garnaĵo de tropikaj plantoj, miriade stelumitaj per la majesta bunteco de brilkoloraj floroj.

Malantaŭ ni kreskis tenebra kaj neloga arbaro el gigantaj arbecaj filikoj intermiksitaj kun plantspecoj pli tipaj je tropika praarbaro. Grandegaj grimpoplantoj pendis kurbitaj inter la arboj, kaj densaj subkreskaĵoj kovris implikitan amason da falintaj trunkoj kaj branĉoj. Ĉe la rando de la arbaro ni

vidis tiun saman splendoran buntecon de sennombraj floroj, kiuj ornamis la insulojn, sed en la ombroj ĉio ŝajnis funebre malluma kaj malgaja.

Kaj sur ĉion la tagmeza suno disĵetis tra la sennuba ĉielo siajn varmradiojn.

“Kie sur la Tero ni estas?” mi demandis, turnante min al Perry.

Dum kelkaj sekundoj la maljunulo ne respondis. Li staris kun la kapo klinita, en profunda pensado. Sed fine li ekparolis.

“David,” li diris, “Mi ne estas tute certa, ke ni estas *sur* la Tero.”

“Kion vi diras, Perry?” mi kriis. “Ĉu eble ni mortis kaj eniris la paradizon?”

Turniĝante kun rideto, li fingromontris la nazon de la borveturilo, kiu elstaris el la tero malantaŭ ni.

“Sen tio, David, mi povus kredi, ke ni vere venis al la lando trans la Stikso. Sed la borveturilo malpruvas tiun teorion—ĝi certe ne povus iri en la ĉielon. Tamen, mi pretas allasi, ke ni vere atingis alian mondon ol tiun de nia ĝisnuna vivo. Se ni ne estas *sur* la Tero, ni ja povas kredi, ke ni estas *en* ĝi.”

“Eble ni revenis tra la terkrusto kaj elvenis sur iun tropikan insulon de la Antiloj,” mi sugestis.

Perry denove skuis sian kapon.

“Ni scios pli poste, David,” li respondis, “kaj intertempe, ni esploru la marbordon—ni eble trovos indiĝenon, kiu informos nin.”

Dum ni marŝis laŭ la strando, Perry penseme rigardadis la akvon. Estis evidente, ke li luktas kontraŭ grandega enigmo.

“David,” li diris subite, “Ĉu vi rimarkas ion strangan pri la horizonto?”

Dum mi rigardis, mi ekkomprenis, kial la pejzaĝo hantis min ek de la unua vido per aludo de strangeco kaj nenatureco—*tute mankis horizonto!* Tiel malproksimen kiel ni kapablis vidi, etendiĝis la maro, kaj el la akvo videbliĝis etaj insuloj, el kiuj la malproksimaj etis kiel makuletoj; sed ĉiam fone de tiuj estis la maro, tiel ke, laŭŝajne, ni rigardas *supren* al la plej malproksima per la

okulo videbla punkto. Fine, ĉio nebuliĝis en la foreco. Videbla estis neniu klara horizontala linio, kiu montris la kurbiĝon de la terglobo for de la vidlinio.

“Mi ekkomprenas gravan aferon,” daŭrigis Perry, elpoŝigante sian horloĝon. “Mi kredas, ke mi parte solvis la enigmon. Estas nun la dua horo. Kiam ni eliris de la borveturilo, la suno estis rekte super ni. Kaj kie ĝi estas nun?”

Mi rigardis supren kaj trovis la brilegan sferon ankoraŭ en la sama loko—en la centro de la ĉielo. Kaj kia suno! Mi apenaŭ rimarkis ĝin antaŭe. Ĝi estis almenaŭ trioble pli granda ol la suno, kiun mi ĝis tiam konis, kaj ĝi ŝajnis tiel proksima, ke vidante ĝin, oni kredis sin kapabla tuŝi ĝin per etendo de la brako.

“Je Dio, Perry, kie ni estas?” mi demandis. “Ĉio ĉi incitas miajn nervojn.”

“Mi kredas povi diri kun plena certeco, David,” li ekparolis, “ke ni estas—” sed li ne parolis plu. De malantaŭ ni ĉe la borveturilo, venis la plej tondra teruriga muĝo, kiu iam trafis miajn orelojn. Unumense, ni turniĝis por vidi tion, kio eligis tiun timigan bruegon.

Se ankoraŭ restis en mia kapo la ideo, ke ni estas sur la Tero, la vidaĵo, kiu trafis miajn okulojn, tute forvaporigis ĝin. El la arbaro venis kolosa bestego, kiu multe similis urson. Ĝi estis ĝuste tiel granda kiel la plej granda elefanto, kaj ĝiaj antaŭpiedoj estis armitaj per fortikaj ungegoj. Ĝia nazego pendis preskaŭ futon sub ĝia malsupra makzelo, kiel rudimenta rostro. Densaj, hirtaj haroj kovris la gigantan korpon.

Terure muĝante, ĝi trenis sin al ni per peza, malrapida troto. Mi turniĝis al Perry por proponi, ke ni eble serĉu pli agrablan restadejon—evidente Perry jam ekhavis tiun ideon, ĉar li estis jam cent paŝojn for, kaj ĉiusekunde liaj mirindaj saltoj pliigis la distancon. Neniam antaŭe mi sciis, kian neuzitan kurkapablon la maljuna sinjoro posedas.

Mi vidis, ke li celas parton de la arbaro, kiu disbranĉiĝis al la maro, ne malproksime de la loko, kie ni antaŭe staris, kaj ĉar la fortega besto, kiu tiom ekvigligis Perry, daŭre proksimiĝis al mi, mi postsekvis Perry, kvankam per malpli peniga rapideco. Estis evidente, ke la enorma besto, kiu nin ekĉasis, ne posedas korpon taŭgan por rapida kurado, do ŝajnis al mi necese nur atingi la arbojn sufiĉe malproksime antaŭ ĝi por povi forgrimpi de la danĝero sur iun grandan branĉon, antaŭ ol ĝi alvenos.

Malgraŭ nia danĝera situacio, mi ne povis ne ridi pri la freneze rapidaj penadoj de Perry, kiu klopodis rifuĝi en la malsuprajn branĉojn de la jam atingitaj arboj. La unuaj dekkvin futoj de la arbotrunkoj estis nudaj—almenaŭ ĉe tiuj arboj, kiujn Perry provis suprengrimpi, ĉar la azildona aspekto de la pli grandaj el tiuj arbigantoj evidente logis lin. Dekfoje li ekgrimpis supren, tiel rapide kiel granda kato, sed ĉiufoje li refalis de la trunko teren, kaj post ĉiu tia malsukceso li terurigite ekrigardis super sian ŝultron al la proksimiĝanta bestego, samtempe eligante timplenajn kriojn, kiuj eĥis tra la morna arbaro.

Fine li ekvidis grimpoplanton same dikan kiel manradikon, kaj kiam mi atingis la arbaron, li jam rapidege suprengrimpis sur ĝi, manon super mano. Li jam preskaŭ atingis la plej malaltan branĉon de la arbo, el kiu pendis la grimpoplanto, kiam ĝi ŝiriĝis pro lia pezo, kaj li barakte falis antaŭ miajn piedojn.

Lia malbona ŝanco ne plu amuzis min, ĉar la besto jam tro proksimis al ni. Kaptante Perry je la ŝultro, mi starigis lin per unu tiro, kaj rapidante al pli malgranda arbo, kiun Perry povis facile ĉirkaŭteni per siaj brakoj kaj kruroj, mi levis lin tiel alten kiel eble, kaj tiam mi lasis lin al sia sorto, ĉar ekrigardo super mian ŝultron montris, ke la terura besto jam preskaŭ atingis min.

Mi saviĝis nur pro la grandeco de la besto. Ĝia grandegeco faris ĝin tro lanta por povi konkuri kontraŭ la viglo de miaj junaj muskoloj, do mi kapablis salti flanken, antaŭ ol la malvigla menso de la besto povis redirekti ĝin al mia postsekvo.

La tiel akiritaj kelkaj sekundoj ebligis, ke mi sendifekte rifuĝu en la branĉojn de arbo kelkajn paŝojn for de tiu, en kiu Perry trovis havenon.

Ĉu mi diris, ke mi sendifekte rifuĝis? Tiam mi kredis, ke ni estas tute ekster danĝero, kaj ankaŭ Perry tion kredis. Li levis sian voĉon preĝe, por danki Dion pri nia saviĝo, kaj li ĵus finis ian peanon de danko, ke la besto ne kapablas grimpi en arbojn, kiam sen averto ĝi baŭmis malantaŭ li sur la vostego kaj la postpiedoj kaj etendis siajn timinde armitajn piedojn ĝis la branĉo, sur kiu li kuŝis.

Ĝian samtempan muĝon preskaŭ tute dronis la timokrio de Perry, kiu preskaŭ enfalis la faŭkan buŝegon sub si, ĉar li tiel subite ekimpetis por foriri de la danĝera branĉo. Kun profunda sopiro de trankviliĝo mi vidis lin sendifekte atingi

pli altan branĉon.

Kaj tiam la besto faris ion, kio denove glaciigis min pro teruro. Kaptante la arbotrunkon per siaj potencaj antaŭpiedoj, ĝi tiris tiun malsupren per la tuta pezego de sia granda masiveco kaj per la tuta nerezistebla potenco de siaj fortegaj muskoloj. Malrapide, sed konstante, la trunko komencis kurbiĝi al la bestego. Colon post colo, li suprenmetis la piedojn, dum la arbo pli kaj pli forkliniĝis de sia vertikala pozicio. Perry alkroĉiĝis, klakigante siajn dentojn pro teruro. Pli kaj pli alten en la kliniĝantan kaj svingiĝantan arbon li grimpis. Pli kaj pli rapide la arbopinto ekkliniĝis teren.

Tiam mi vidis, kial la bestego estas armita per tiaj kolosaj piedoj. Jen ĝi uzis ilin por ĝuste tiu celo, por kiu la naturo destinis ilin. La bradipsimila estaĵo estis plantmanĝulo, kaj por nutri sian korpegon ĝi bezonis forŝiri la foliaron de tutaj arboj. Kial ĝi atakis nin, estis facile klarigeble, se oni premisis temperamenton tiel malbelan kiel ĉe la fera kaj stulta afrika rinocero. Sed ĉion ĉi ni pensis nur poste. En tiu momento mi tro timegis pro Perry por pensi pri io alia ol rimedo por savi lin de la jam tiel proksima morto.

Mi sciis, ke sur la Tero mi povus kuri pli rapide ol la mallerta besto, do mi faligis min el mia folioza rifuĝejo, celante nur unu aferon: logi la atenton de la estaĵo for de Perry sufiĉe longe por ebligi, ke la maljunulo atingu la havenon de pli granda arbo. Apude staris multaj, kiujn eĉ la grandega forto de tiu giganta monstro ne povus klini.

Kiam mi alteriĝis, mi prenis falintan branĉon el la implikita amaso, kiu kovris la teron en tiu ĝangaleca arbaro, kaj saltinte nevidita malantaŭ la vilan dorson, donis al la bestaĉo grandegan baton. Mia plano efikis kiel magio. Pro la antaŭa malrapideco de la besto mi neniel antaŭvidis la mirindan lertecon, kiun ĝi nun montris. Ĝi ĉesis teni la arbon kaj ekstaris sur siaj kvar piedoj, samtempe svingante sian grandan, malican voston tiel forte, ke ĝi rompus ĉiun oston de mia korpo, se ĝi frapus min: sed bonŝance, mi turniĝis kaj fuĝis tuj, kiam mi sentis la trafon de mia bato sur la ture altan dorson.

Kiam ĝi komencis postsekvi min, mi erare decidis ekkuri laŭ la rando de la arbaro anstataŭ al la senobstakla strando. Post momento mi troviĝis ĝisgenue profunda en putrantaj plantoj, kaj la terura kreitaĵo rapide proksimiĝis, dum mi baraktadis kaj faladis, klopodante liberigi min.

Falinta arbotrunko donis al mi pormomentan avantaĝon, ĉar surgrimante ĝin, mi saltis al alia kelkajn paŝojn antaŭe, kaj tiumaniere mi sukcesis resti super la implikaĵo, kiu tapiŝis la teron ĉirkaŭe. Sed la zigzaga vojo, kiun tio postulis, tiel severe handikapis min, ke la postĉasanta besto konstante proksimiĝis al mi.

De malantaŭe mi subite ekaŭdis tumulton de hurloj kaj akraj, oreltranĉaj bojoj—kiel la sono, kiun farus aro da plene kriantaj lupoj. Nevole mi rigardis malantaŭen por eltrovi, de kie venas tiu nova kaj minaca sono, kaj pro tio, mi mispaŝis kaj denove baraktofalis sur mian ventron en la profundan implikaĵon de plantoj.

Mia mamute granda adversulo estis jam tiel proksima, ke mi anticipis certe senti la pezon de unu el liaj teruraj piedoj, antaŭ ol povi restariĝi, sed surprize, la bato ne trafis min. La hurlado kaj dentklakado kaj bojado de la novuloj enirintaj la tumulton nun ŝajnis esti tuj malantaŭ mi, kaj dum mi levis min per la brakoj kaj ekrigardis ĉirkaŭen, mi vidis tion, kio forlogis de mi la atenton de la *dirito*, kio estas la nomo, kiun mi poste lernis, de la estaĵo.

Ĉirkaŭis ĝin kelkcent lupsimilaj bestoj—laŭŝajne sovaĝaj hundoj—kiuj hurlante kaj mordante atakis ĝin de ĉiu flanko kaj profundigis siajn blankajn dentegojn en la karnon de la malrapida besto kaj forkuris, antaŭ ol ĝi povis trafi ilin per siaj piedegoj aŭ balae svingiĝanta vosto.

Sed miaj mirantaj okuloj vidis ion plian. Tra la malsupraj arbobranĉoj venis blekanta bando da homecaj estaĵoj, kiuj evidente kurigis la hundaron antaŭen. Laŭ ĉiuj aspektoj ili okulfrape similis la negrojn de Afriko. Ili havis tre nigran haŭton, kaj iliaj trajtoj multe similis tiujn de negroj, krom ĉe la kapo, kiu kliniĝis malantaŭen tuj super la okuloj, lasante preskaŭ neniun frunton. Proporcie kun iliaj torsoj, iliaj brakoj estis iom pli longaj kaj iliaj kruroj pli mallongaj ol ĉe homoj, kaj pli poste mi rimarkis, ke iliaj haluksoj elstaras de la piedoj ortangule—ĉar ili kutimis loĝi en arboj, kredeble. Malantaŭe ili trenis longan, maldikan voston, kiun ili uzis por grimpi, same kiel la manojn kaj piedojn.

Mi stumblante stariĝis, tuj kiam mi eltrovis, ke la luphundoj tenas la diriton for. Vidinte min, kelkaj el la sovaĝaj kreitaĵoj ĉesis timigi la bestegon kaj avide venis al mi kun la dentegoj malkovritaj kaj kiam mi turniĝis por forkuri al la arboj por denove rifuĝi inter la malsupraj branĉoj, mi vidis kelkajn el la simiohomoj saltadi kaj babibleki en la foliaro de la plej proksima arbo.

Inter ili kaj la bestoj malantaŭ mi estis neniu vere elektinda alternativo, sed dum mi povis almenaŭ dubi pri la bonvenigo ricevota de tiuj groteskaj homparodioj, mi ne povis dubi pri la sorto, kiu atendus min sub la avidaj dentegoj de miaj ferocaj postĉasantoj.

Do mi kuregis al la arboj, intencante pasi sub tiu, kiu entenas la simiohomojn, kaj rifuĝi en alian pli malproksiman; sed la luphundoj estis tre proksimaj malantaŭ mi—tiel proksimaj, ke mi ĉesis esperi saviĝon de ili, sed jen unu el la estaĵoj en la arbo super mi svingiĝis malsupren, metante la kapon antaŭen kaj tenante la voston ligita ĉirkaŭ granda branĉo, kaj kaptante min sub la akseloj, svingis min supren inter siajn kunulojn kaj ekster danĝeron.

Tie ili komencis ekzameni min kun multe da ekscitita scivolemo. Ili esploris miajn vestaĵojn, hararon kaj karnon. Ili turnis min por eltrovi, ĉu mi havas voston, kaj kiam ili trovis min ne tiel ekipita, ili freneze ekridegis. Ili havis dentojn tre grandajn kaj blankajn kaj ebenajn, kvankam la supraj kojnodontoj estis iom pli longaj ol la aliaj kaj elstaris iomete ĉe fermita buŝo.

Ekzameninte min dum kelkaj momentoj, unu el ili eltrovis, ke miaj vestaĵoj ne estas parto de mi, kaj tiam ili ekŝiris de sur mi la vestaĵojn, pecon post peco, freneze ridegante. Simiece, ili klopodis mem surmeti la vestaĵojn, sed ili ne estis sufiĉe lertaj por la tasko, do ili rezignis.

Intertempe, mi streĉis la okulojn por ekvidi Perry, sed nenie mi povis vidi lin, kvankam estis plene videbla la aro de arboj, en kiun li unue rifuĝis. Premis min la timo, ke io okazis al li, kaj kvankam mi kriis lian nomon kelkfoje, ne venis respondo.

Fine, lacaj de sia ludado kun miaj vestaĵoj, la kreitaĵoj ĵetis ilin teren, kaj havante po unu el ili ambaŭflanke, kiu tenis min je la brako, ni ekmoviĝis per tre timiga rapideco tra la arbosuproj. Neniam antaŭe aŭ poste mi spertis tian vojaĝon—eĉ nun mi ofte vekiĝas el profunda dormo hantita de la abomena rememoro pri tiu aĉa travivaĵo.

De arbo al arbo la lertaj estaĵoj saltis kiel sciuropteroj, dum malvarma ŝvito ekkovris mian frunton, kiam mi vidis la abismojn sube, en kiujn mi ĵetiĝus, se eĉ nur unu el miaj portantoj mispaŝus. Dum ili portadis min, mil konfuzaj pensoj plenigis mian kapon. Kio okazis al Perry? Ĉu mi iam revidos lin? Kion planas la duonhomaj estaĵoj, en kies manojn mi falis? Ĉu ili estas loĝantoj de la sama

mondo, en kiu mi naskiĝis? Ne! Ne povis esti. Sed kie mi do estis? Mi ne forlasis la Teron—pri tio mi certis. Tamen, mi ankaŭ ne povis akordigi la viditaĵojn kun la kredo, ke mi ankoraŭ estas en la mondo de mia naskiĝo. Suspirante, mi ĉesis pripensi la aferon.

3-a ĉapitro

NOVAJ MASTROJ

Ni vojaĝis ŝajne plurajn mejlojn tra la malluma kaj morna arbaro, antaŭ ol ni subite alvenis densan vilaĝon, konstruitan en la superaj branĉoj de la arboj. Dum ni proksimiĝis al ĝi, mia eskortanto komencis sovaĝe kriadi, kio tuj eligis respondon el la interno, kaj post momento, svarmo de estaĵoj de la sama raso kiel niaj kaptintoj alrapidis por renkonti nin. Denove mi estis en la mezo de freneze babilanta amaso. Mi estis ŝovita tien kaj reen. Ili pinĉis kaj frapis min, ĝis mia haŭto kontuziĝis, sed mi kredas, ke ili traktis min tiel ne pro krueleco aŭ malico —mi estis por ili kuriozaĵo, strangaĵo, nova ludaĵo, kaj iliaj infanecaj mensoj bezonis la aldonan atestadon de ĉiuj sentumoj por kredebligi tion, kion ili vidis per la okuloj.

Post iom da tempo ili trenis min en la vilaĝon, kiu konsistis el kelkcent krudaj loĝejoj el branĉoj kaj folioj subtenitaj de la arbobranĉoj. Inter la dometoj sterniĝis mortaj branĉoj kaj trunkoj de malgrandaj arboj, kiuj kunligis la loĝejojn en unu arbo kun tiuj en apudaj arboj, kaj tiel kelkfoje formiĝis serpentumaj stratoj. La tuta reto de loĝejoj kaj vojoj formis preskaŭ senbreĉan plankon 50 futojn super la tero.

Komence mi scivolis, kial tiuj lertmovaj estaĵoj bezonis kunligi la arbojn per tiaj pontoj, sed pli poste, kiam mi vidis la diversajn duonsovaĝajn bestojn, kiujn ili tenadis interne de la vilaĝo, mi ekkomprenis la neceson de la vojoj. Estis kelkaj sovaĝaj luphundoj samspecaj, kiajn mi laste vidis ĝenantajn la diriton, kaj multaj kapro-similaj bestoj, kies plenplenaj mamoj evidentigis la kialon de ilia tenado.

Mia gardanto haltis antaŭ unu el la dometoj, en kiun li puŝis min, kaj tiam du el tiuj estaĵoj ekkaŭris antaŭ la pordo—sendube por malebligi al mi forfuĝi, kvankam mi apenaŭ sciis, kien fuĝi.

Mi ĵus eniris la malluman internon, kiam mi ekaŭdis konatan voĉon, preĝantan.

“Perry!” mi kriis. “Kara Perry! Dank’ al Dio, ke vi saviĝis.”

“David! Ĉu povas esti, ke vi travivis?” Kaj la maljunulo stumble proksimiĝis al mi kaj forte ĉirkaŭpremis min.

Li vidis mian falon antaŭ la dirito, kaj tiam lin kaptis pluraj el la simiohomoj, kiuj portis lin tra la arbosuproj al la vilaĝo. Liaj kaptintoj tiel scivolis pri liaj vestaĵoj kiel pri miaj, kun la sama rezulto. Kiam ni rigardis unu la alian, ni ne povis ne ridi.

“Kun vosto, David,” rimarkis Perry, “vi estus tre admirinda simio.”

“Eble ni povus prunti kelkajn,” mi aldonis. “Ili ŝajnas tre laŭmodaj nun... Sed kion la simiohomoj intencas fari kun ni, Perry? Ili ne ŝajnas vere sovaĝaj. Do kiaj ili estas laŭ vi? Vi intencis klarigi tion al mi, kiam tiu hirta monstro atakis nin—ĉu vi havas ian ajn ideon?”

“Jes, David,” li respondis, “mi scias ĝuste, kie ni estas. Ni faris grandiozan eltrovon, amiko! Ni pruvis, ke la Tero estas kava. Ni trapasis la tutan terkruston al la interna mondo.”

“Perry, vi estas freneza!”

“Tute ne, David. Nia borveturilo portis nin tra la 240-mejla terkrusto sub nia ekstera mondo. En tiu loko, ĝi atingis la pezocentron de la kvincent mejlojn dika krusto. Ĝis tie ni veturis malsupren—la direkto estas nur relativa, kompreneble. En la momento, kiam niaj seĝoj inversiĝis—pro kio vi ekkredis, ke ni turniĝis kaj rapidas supren—ni trapasis la pezocentron, kaj kvankam ne ŝanĝiĝis la direkto de nia antaŭeniĝo, tamen, efektive, ni ekmoviĝis supren al la tersupraĵo de la interna mondo. Ĉu ne konvinkas vin la strangaj bestoj kaj plantoj, kiujn ni vidis, ke vi ne troviĝas en la mondo, kie vi naskiĝis? Kaj la horizonto—ĉu ĝi povus havi la saman strangan aspekton, kiun ni ambaŭ rimarkis, se ni ne efektive starus sur la interna supraĵo de sfero?”

“Sed la suno, Perry!” mi insistis. “Kiel la suno povus brili tra kvincent mejloj da solida terkrusto?”

“Ĉi tie ne temas pri la suno de la ekstera mondo. Ĝi estas alia suno—tute malsama suno, kiu ĵetas sian eterne tagmezan brilegon sur la supraĵon de la interna mondo. Rigardu ĝin nun, David—se vi povas vidi ĝin el la pordo de ĉi

tiu domo—kaj vi vidos ĝin ankoraŭ en la centro de la ĉielo. Ni estas ĉi tie jam de multaj horoj—kaj ankoraŭ estas tagmeze.”

“Kaj tamen estas tre simple, David. Iam la Tero estis nebula maso. Ĝi malvarmiĝis, kaj dum la malvarmiĝo ĝi malgrandiĝis. Fine, maldika terkrusto de solidaĵo formiĝis sur ĝia ekstera supraĵo—ia ŝelo, sed interne de la ŝelo estis parte fandita materio kaj vaste dilatitaj gasoj. Kaj kio okazis dum la konstanta malvarmiĝo? La centrifuga forto ĵetis la erojn de materio el la nebuleca centro al la krusto, tuj kiam ili fariĝis solidaj. Oni vidas la praktikan aplikon de la sama principo ĉe la moderna senkremigato. Post iom da tempo restis en la grandega, vaka interno nur malgranda, supervarmega kerno de gasa materio, kiun postlasis la maldilatiĝo de la malvarmiĝantaj gasoj. La el ĉiuj direktoj egala gravita altiro de la solida krusto fikse tenis tiun luman kernon ĉe la preciza centro de la Tero. Al ĉiu parto de la interna mondo egale, ĝi radias sian ĉiam tagmezan lumon kaj brulan varmegon.”

“Ŝajnas, ke la interna mondo sufiĉe malvarmiĝis por vivteni animalan vivon nur longajn epokojn post la apero de vivo sur la ekstera krusto, sed la familiaraj formoj de animala kaj planta vivo, kiujn ni vidis ĉi tie, evidentigas, ke funkcias la samaj fortoj ankaŭ ĉi tie. Prenu ekzemple la grandan beston, kiu atakis nin. Eksterdube, ĝi estas similulo de la megaterio el la postpliocena epoko de la ekstera krusto, kies fosiliĝintan skeleton oni trovis en Suda Ameriko.”

“Sed la groteskaj arbaruloj?” mi insistis. “Certe ili ne havas similulojn el la historio de la Tero.”

“Kiu povus diri?” li respondis. “Tiu specio povus esti kvazaŭa ĉenero inter la simioj kaj la homoj, kies postrestaĵoj ĉiuj neniĝis en la sennombraj tertremoj, kiuj konvulsiigis la eksteran kruston, aŭ ĝi povus esti nur la rezulto de iom alispeca evolucio—ambaŭ estas tute eblaj.”

Pluan konjektadon interrompis la apero de kelkaj el niaj kaptintoj antaŭ la enirejo de la dometo. Du el ili envenis kaj eltenis nin. La danĝeraj vojetoj kaj la ĉirkaŭaj arboj estis plenaj je nigraj simiohomoj kaj iliaj inoj kaj idoj. Eĉ ne unu portis ian ornamaĵon, armilon aŭ vestaĵon.

“Tre malalte evoluintaj,” juĝis Perry.

“Sed sufiĉe alte por kaŭzi grandan ĉagrenon al ni,” mi respondis. “Kion ili intencas fari kun ni, laŭ via supozo?”

Ni eksciis nelonge poste. Kiel ĉe nia vojaĝo al la vilaĝo, nin kaptis kelkaj el la fortikaj estaĵoj, kiuj forrapidigis nin tra la arbosuproj, dum ĉirkaŭ ni kaj malantaŭ ni kuradis babilanta, ridetanta hordo da lertmovaj nigraj simiohomoj.

Dufoje mispaŝis miaj portantoj, kaj mia koro ekĉesis bati, kiam ni ekplongis al tuja morto ĉe la mortaj branĉamasoj malsupre. Sed ambaŭfoje, tiuj lertaj, potencaj vostoĵoj etendis sin kaj trovis apogajn branĉojn, kaj nek unu el ili eĉ iom malfirmigis sian tenon al mi. Efektive, ŝajnis, ke tiuj okazaĵoj ĝenis ilin neniom pli, ol frapi la piedfingron ĉe stratkruciĝo ĝenus homon de la ekstera mondo; ili nur eligis rideksplodon kaj rapidis antaŭen kun mi.

Dum longa tempo ili daŭrigis tra la arbaro—dum kiom da tempo, mi ne povis diveni, ĉar mi ankoraŭ lernadis tion, kion mia menso pli poste tre klare ekkomprenis: ke la tempo tuj ĉesas esti faktoro, kiam malaperas rimedoj por mezuri ĝin. Ni ne plu havis niajn brakhorloĝojn kaj ni vivadis sub senmova suno.

Jam estis al mi malfacile kalkuli la tempon, kiu pasis, de kiam ni trarompigis en la internan mondon. Pasis eble horoj, eble tagoj—kiu povus diri tion en mondo de ĉiama tagmezo! Laŭ la suno, pasis neniom da tempo—sed mi taksis, ke jam de kelkaj horoj ni troviĝas en tiu bizara mondo.

Post iom da tempo ni eliris el la arbaro sur platan ebenaĵon. Mallongan distancon antaŭ ni staris kelkaj malaltaj, rokaj montetoj. Niaj kaptintoj pelis nin al ili, kaj post mallonga tempo ili gvidis nin tra mallarĝa montpasejo en rondan valetan. Tie ili eklaboris, kaj ni baldaŭ konvinkiĝis, ke se ni ne mortos kiel okaze de romia festotago, io alia tamen mortigos nin. La konduto de niaj kaptintoj tuj ŝanĝiĝis, kiam ili eniris la naturan arenon inter la rokozaj montetoj. Ĉesis ilia ridado. Minaca krueleco vidiĝis sur iliaj bestaj vizaĝoj—elbuŝigitaj dentegoj minacis nin.

Oni metis nin en la centron de la amfiteatro, kaj la mil simiohomoj formis grandan rondon ĉirkaŭ ni. Tiam oni alportis luphundon—Perry nomis ĝin hienodono^[9]—kaj oni liberigis la bestegon en la rondon kun ni. Ĝia korpo estis tiel granda kiel tiu de plenkreska dogo; ĝiaj kruroj estis mallongaj kaj potencaj; ĝiaj makzeloj estis larĝaj kaj fortaj. Malhelaj, hirtaj haroj kovris ĝiajn dorson kaj flankojn, dum ĝiaj brusto kaj ventro estis tute blankaj. Dum ĝi malrapide kaj minace alproksimiĝis al ni, ĝi prezentis aspekton tre timigan, kun suprentiritaj lipoj, kio videbligas la terure grandajn dentegojn.

Perry estis sur la genuoj, preĝanta. Mi kliniĝis kaj prenis ŝtonon. Pro mia moviĝo la besto iom retiriĝis kaj komencis rondiri ĉirkaŭ ni. Evidente iu jam antaŭe alcelis ĝin per ŝtonoj. La simiohomoj dancis supren kaj malsupren, urĝante la beston antaŭen per sovaĝaj krioj, ĝis ĝi fine vidis, ke mi ne ĵetas, kaj atake alkuris.

Ĉe Andover^[10] kaj poste ĉe Yale^[11], mi estis ĵetisto ĉe venkantaj basbalaj teamoj. Kaj mia rapideco kaj mia celkapablo ŝajnis fakte eksterordinaraj, ĉar la rekordo, kiun mi atingis dum mia lasta kolegia jaro, estis tiel bona, ke unu el la plej prestiĝaj grandligaj teamoj^[12] en Usono faris ofertojn al mi; sed eĉ en la plej malfacila situacio, kiun mi frontis en la pasinteco, mi ne bezonis tiel precize celi kiel nun.

Kiam mi levis mian brakon por ĵeti, mi regis miajn nervojn kaj muskolojn absolute, kvankam la ridetantaj makzeloj pafiĝis al mi per terura rapideco. Kaj tiam mi ĵetis, uzante por la ĵeto ĉiun unkon de miaj pezo, forto kaj lerteco. La ŝtono trafis la hienodonon rekte sur la nazon kaj forte repuŝis lin sur la dorson.

Sammomente, ĥoro de kriĉoj kaj hurloj leviĝis el la spektantaro, pro kio mi dum momento kredis, ke la kaŭzo estas mia venko super ilia ĉampiono; sed mi baldaŭ konstatis mian eraron. Dum mi rigardis, la simiohomoj forkuris ĉiudirekte al la ĉirkaŭaj montetoj, kaj tiam mi vidis la veran kaŭzon de ilia maltrankviliĝo. Malantaŭ ili, amase puŝiĝante tra la pasejo kondukanta en la valon, venis svarmo de vilaj homoj—gorilecaj kreitaĵoj armitaj per lancoj kaj hakiletoj kaj portantaj longajn, ovalajn ŝildojn.

Demonece ili atakis la simiohomojn, kaj la hienodono, jam denove konscia kaj leviĝinta, forfuĝis de ili, hurlante pro timo. Rapidege preterpasis nin la ĉasantoj kaj ĉasatoj, kaj la viluloj atentis nin per nenio pli ol foja ekrigardo, ĝis la areno tute vakiĝis de la antaŭaj okupantoj. Tiam ili revenis al ni, kaj unu, kiu ŝajne havis aŭtoritaton super ili, ordonis kunpreni nin.

Paŝinte el la amfiteatro sur la vastan ebenaĵon, ni ekvidis karavanon de gehomoj—homoj kiel ni—kaj unuafoje mia koro pleniĝis de espero kaj refaciliĝo, tiom ke mi volis ekkrii pro eksplodanta ĝojo. Nu, ili fakte estis duonnudaj kaj sovaĝaspekta bando, sed almenaŭ laŭ la korpa formo ili precize similis al ni. Ili estis neniel groteskaj aŭ hidaj, kiel la aliaj estaĵoj de tiu kurioza kaj konsterna mondo.

Sed post pliproksimiĝo niaj koroj denove peziĝis, ĉar ni trovis la povrajn mizerulojn kunĉenitaj kol-al-kole en longa vico, kaj la gorilohomoj estis iliaj gardistoj. Senceremonie ili katenis Perry kaj min ĉe la fino de la vico, kaj sen plia ĝeno oni rekomencis la interrompitan marŝadon.

Ĝis tiu tempo ni estis viglaj pro ekscitiĝo, sed nun la lacige monotona longa marŝo trans la sunbakitan ebenaĵon sentigis al ni ĉiujn turmentajn sekvojn de longa maldormo. Plu kaj plu ni senhalte stumbladis antaŭen sub tiu abomena tagmeza suno. Se ni falis, oni spronpikis nin per akra lancpinto. Niaj kunkaptitoj ne stumblis. Ili paŝadis antaŭen fiere rektaj. Foje ili interŝanĝis vortojn en iu lingvo plena de unusilabaĵoj. Ili estis noblaspekta raso, kun belformaj kapoj kaj perfektaj korpoj. La viroj estis barbaj, altaj kaj muskolozaj; la virinoj malpli grandaj kaj pli graciaj, kun loze bukaj amasoj da korvnigraj haroj surkape. Ambaŭ seksoj havis belproporciajn trajtojn. Eĉ ne unu posedis vizaĝon, kiun oni taksus nebela sur la Tero. Ili ne portis ornamaĵojn, sed pli poste mi eksciis la kaŭzon, nome, ke iliaj kaptintoj forprenis de ili ĉion valoran. Kiel vestaĵon la virinoj portis robon faritan el ia helkolora, makulhava felo, laŭ aspekto iom simila al la felo de leopardo. Tion ili portis aŭ fiksita per leda rimeno al la talio tiel, ke ĝi pendis unuflanke ĝis iom sub la genuo, aŭ ili portis ĝin pendanta grazie de unu ŝultro. Iliajn piedojn vestis ledaj sandaloj. La viroj portis zontukon el la felo de iu hirta besto, kies longaj finaĵoj pendis preskaŭ ĝis la tero, antaŭe kaj malantaŭe. Kelkfoje estis fiksitaj al tiuj finaĵoj la ungegoj de la besto, de kiu oni prenis la felon.

Niaj gardantoj, kiujn mi jam priskribis kiel gorilecajn homojn, estis iom pli malpezaj ol goriloj, sed tamen ili estis fortegaj. Iliaj brakoj kaj kruroj pli akordis al homaj proporcioj, sed hirtaj, brunaj haroj kovris ilian tutan korpon, kaj iliaj vizaĝoj estis same tiel brutalaspektaj kiel tiuj de la kelkaj remburitaj specimenoj, kiujn mi vidis en la muzeoj de la ekstera mondo.

Ilia sola nobliga trajto estis la alta disvolviĝo de la kapo super kaj malantaŭ la oreloj. Tiurilate ili estis ne malpli homecaj ol ni. Ilia vestaĵo estis ia tuniko el malpeza ŝtofo, kiu etendiĝis ĝis la genuoj. Sub ĝi ili portis nur zontukon el la sama ŝtofo, dum ili kovris siajn piedojn per la dika felo de iuspeca mamuto de tiu interna mondo.

Ĉirkaŭ iliaj brakoj kaj koloj pendis multaj ornamaĵoj el metalo—plejparte arĝento—kaj sur iliaj tunikoj estis alkudritaj la kapoj de etaj rampuloj, strange kaj artece aranĝitaj. Ili parolis inter si, dum ili marŝadis ambaŭflanke de ni, sed

en lingvo, kiun mi perceptis diferenca de tiu, kiun uzis niaj kunkaptitoj. Kiam ili alparolis tiujn, ili ŝajnis uzi trian lingvon, pri kiu mi pli poste eksciis, ke ĝi estas ĵargono simila laŭ la tipo al la piĝina lingvo de ĉina kulio.

Nek mi nek Perry havas klaran imagon pri la marŝita distanco. Ni ambaŭ dormis jam dum multe da horoj, antaŭ ol oni haltis por ripozi, kaj tiam ni falis teren por dormi plu. Mi diras “dum horoj,” sed kiel oni mezuru la tempon, kie la tempo ne ekzistas! Kiam nia marŝo komenciĝis, la suno estis rekte super ni, kaj kiam ni haltis, niaj ombroj direktiĝis al la nadiro. Ĉu pasis momento aŭ ĉu eterneco da Tera tempo? Neniu scias! Eble tiu marŝo okupis naŭ jarojn kaj dek unu monatojn el la dek jaroj, kiujn mi pasigis en la interna mondo, aŭ eble ĝi plenumiĝis en ono de sekundo—mi ne scias. Sed unu aferon mi ja scias, kaj de kiam vi diris al mi, ke pasis dek jaroj post mia foriro el la ekstera mondo, mi perdis ĉian respekton por la tempo—mi ekdubas, ĉu ĝi eĉ ekzistas, krom en la malfortaj, limigitaj mensoj de homoj.

Subnotoj

[9] specio de praaj predobestoj, “hienodentulo”.

[10] urbeto en la nordorienta Usona ŝtato Massachusetts havanta plurajn konatajn superajn lernejojn kaj kolegiojn.

[11] fama universitato en la ŝtato Connecticut, unu el la plej malnovaj en Usono.

[12] la plej eminentaj usonaj bazopilkaĵaj teamoj apartenas al unu el du “grandaj ligoj”.

4-a ĉapitro

DIAN LA BELA

Kiam la gardistoj vekis nin, ni estis multe pli freŝaj. Ili donis al ni manĝaĵon. Ĝi konsistis el strioj de sekigita viando, sed ĝi donis al ni novajn viglon kaj forton, tiel ke nun ankaŭ ni marŝis kun alte tenitaj kapoj kaj fiere paŝis. Almenaŭ mi tion faris, ĉar mi estis juna kaj fieraj; sed la kompatinda Perry abomenis marŝi. Sur la Tero mi ofte vidis lin voki taksion por transiri placon—nun li pagis pro tio, kaj liaj maljunaj kruroj ŝanceliĝis tiel, ke mi devis ĉirkaŭbraki lin kaj duone porti lin dum la cetero de tiuj teruraj marŝoj.

Fine, la tereno komencis ŝanĝiĝi, kaj ni forlasis la platan ebenaĵon kaj eniris majestan montaron el virga granito. La tropikajn vegetaĵojn de la malalta ebenaĵo anstataŭis pli fortikaj vegetaĵoj, sed eĉ ĉi tie la efikoj de konstantaj varmo kaj lumo estis facile videblaj ĉe la grandegeco de la arboj kaj la abundeco de folioj kaj floroj. Kristalaj riveretoj muĝis tra siaj rokozaj fluejoj, plenigataj de la eternaj neĝamasoj, kiujn ni povis vidi super ni en la malproksimo. Super la neĝkovritaj montopintoj pendis amasoj da densaj nuboj. Perry klarigis, ke ili ŝajne efikas duoble: kaj por faligi novan neĝon, kiu anstataŭis la degelintan, kaj por ŝirmi tiun neĝon de la rektaj sunradioj.

Nun ni jam sciis kelkajn vortojn de la ĵargona lingvaĉo, per kiu niaj gardantoj alparolis nin, kaj ankaŭ bone progresis en la ĉarma lingvo de niaj kunkaptitoj. Tuj antaŭ mi en la vico de kunĉenitoj estis juna virino. Trifuta ĉeno trude kunligis nin, kaj pri tio mi baldaŭ ekĝojis. Mi trovis ŝin volonta instruantino, kaj de ŝi mi lernis la lingvon de ŝia tribo kaj ankaŭ multon pri la kutimoj kaj vivo de la interna mondo—almenaŭ de tiu parto, kiun ŝi konis.

Ŝi informis min, ke ŝi nomiĝas Dian la Bela, kaj ke ŝi apartenas al la tribo Amoz, kiu loĝas en la krutaĵoj super la Darel Az, tio estas Malprofunda Maro.

“Kiel vi venis ĉi tien?” mi demandis al ŝi.

“Mi fuĝis de Jubal la Malbela,” ŝi respondis, kvazaŭ tiu klarigo plene sufiĉus.

“Kiu estas Jubal la Malbela?” mi demandis. “Kaj kial vi fuĝis de li?”

Ŝi rigardis min kun miro.

“Pro *kio* virino forkuras de viro?” Ŝi respondis mian demandon per alia demando.

“Ili ne faras tion en la mondo, el kiu mi venis,” mi respondis. “Foje ili postkuras la virojn.”

Sed ŝi ne povis kompreni. Kaj mi ne sukcesis komprenigi al ŝi, ke mi estas el alia mondo. Ŝi estis tiel certa kiel multaj homoj de la ekstera mondo, ke la Universo kreiĝis nur por estigi la propran specion kaj la propran mondon.

“Sed pri Jubal,” mi insistis. “Rakontu al mi pri li, kial vi forfuĝis kaj estis ĉenita je la kolo kaj pelita trans grandan parton de la tuta mondo.”

“Jubal la Malbela metis sian trofeon antaŭ la domon de mia patro. Ĝi estis la kapo de giganta tandoro. Ĝi restis tie, kaj neniu metis pli grandan trofeon apud ĝin. Do mi sciis, ke Jubal la Malbela venos kaj prenos min kiel edzinon. Neniu alia tiel forta viro deziris min, ĉar pli forta viro povus mortigi pli grandan beston kaj tiel gajni min anstataŭ Jubal. Mia patro ne estas lerta ĉasisto. Iam li estis, sed sadoko ĵetis lin, kaj neniam plu li povis plene uzi sian dekstran brakon. Mia frato, Dakor la Forta, iris en la landon Sari por ŝteli al si virinon. Tial restis neniu, nek patro nek frato nek amanto, por savi min de Jubal la Malbela, do mi forkuris kaj kaŝis min en la montetoj, kiuj ĉirkaŭas la landon Amoz. Kaj ĉi tiuj sagotoj trovis kaj kaptis min tie.”

“Kiel ili uzos vin?” mi demandis. “Kien ili pelas nin?”

Denove ŝi montris nekredeman ekmiron.

“Mi preskaŭ povas kredi, ke vi estas el alia mondo,” ŝi diris, “ĉar alie, tia nescio estus neklarigebla. Ĉu vi vere ne scias, ke la sagotoj servas la maharojn—la potencajn maharojn, kiuj kredas sin la posedantoj de Pelucidaro kaj de ĉio, kio moviĝas aŭ kreskas sur ĝi, kaj de ĉio, kio rampas aŭ tunelas sub ĝia supraĵo, kaj de ĉio, kio vivas en ĝiaj lagoj kaj oceanoj kaj flugas en ĝia aero? Poste vi eble diros al mi, ke vi neniam aŭdis pri la maharoj!”

Mi hezitis ŝajni eĉ pli malestiminda, sed ĉar mankis aliaj rimedoj por akiri scion, mi konfesis, ke mi scias nenion ajn pri la potencaj maharoj. Tio ŝokis ŝin. Sed ŝi faris sian eblon por informi min, kvankam multaj aferoj, kiujn ŝi diris, estis same kompreneblaj al mi kiel la greka lingvo estus al ŝi. Ŝi priskribis la maharojn ĉefe per komparoj. Tiel ili similas al tipdaroj, tiel ĉi ili similas al la senharaj lidioj.

Mi komprenis preskaŭ nur, ke ili estas terure malbelaj, flugilohavaj kaj palmopiedaj, ke ili loĝas en subteraj urboj, ke ili estas mirinde saĝaj. La sagotoj militis por ili, ofensive kaj defende, kaj la homoj kiel ŝi estis la manoj kaj piedoj —ili estis la sklavoj kaj servutuloj, kiuj faris ĉiujn korpajn laborojn. La maharoj estis kvazaŭ la kapo, la cerbo, de la interna mondo. Mi sopiris vidi tiun rason de superuloj.

Perry lernis la lingvon kune kun mi. Kiam ni haltis, kiel ni foje faris, kvankam tutaj epokoj ŝajnis apartigi la haltojn, li parolis kun ni, kiel faris ankaŭ Gak la Vila, kiu estis ĉenita tuj antaŭ Dian la Bela. Antaŭ Gak estis Huĝa la Ruza. Ankaŭ tiu foje parolis. La plejmulto el liaj paroloj direktiĝis al Dian la Bela. Tute facile oni povis vidi, ke li ekamis ŝin, sed ŝi ŝajnis tute ne konscii pri liaj malkaŝaj sinaltrudoj. Ĉu mi diris “malkaŝaj”? Ekzistas popolo en Nov-Zelando aŭ Aŭstralio—mi forgesas, en kiu lando—en kiu la viroj montras sian preferon al ŝatata virino per klabobato sur la kapon. Kompare kun tiu metodo, oni povus nomi subtila la amindumadon de Huĝa. Tamen, en la komenco mi tre ruĝiĝis pro ĝi, kvankam mi eĉ pasigis kelkajn jarojn ĉe Rectors kaj en kelkaj malpli delikataj lokoj de Nov-Jorko, Vieno kaj Hamburgo.

Sed la virino! Ŝi kondukis superbe. Facile oni povis konstati, ke ŝi konsideras sin tute aparta de siaj tiamaj ĉirkaŭaĵoj kaj kunuloj, kaj supera al ili. Ŝi parolis kun mi kaj kun Perry kaj kun la silentema Gak, ĉar ni estis respektemaj; sed ŝi kvazaŭ ne kapablis vidi Huĝan la Ruza kaj ankaŭ ne aŭdi lin, kaj tio furiozigis lin. Li provis instigi unu el la sagotoj transloki la inon antaŭ lin en la vico de sklavoj, sed la ulo nur pikis lin per lancopinto kaj diris, ke li jam elektis la inon kiel propran posedaĵon—kaj ke li aĉetos ŝin de la maharoj tuj post la alveno en Futra. Ŝajnis, ke Futra estas nia alcelata urbo.

Trapasinte la unuan montoĉenon, ni ĉirkaŭiris salan maron, en kiu naĝis sennombraj aĉaj kreaĵoj. Estis fokosimilaj bestoj, kies longaj koloj etendiĝis pli ol dek futojn super la enormaj korpoj kaj kies serpentajn kapojn dividis faŭkaj buŝoj, el kiuj elstaris nekalkuleblaj dentegoj. Ankaŭ ĉirkaŭnaĝis inter la aliaj rampuloj gigantaj testudoj, kiuj laŭ Perry estis plesiosaŭroj el la liasa epoko. Mi

ne dubis liajn vortojn—kiom mi sciis, ili povus esti io ajn.

Dian diris al mi, ke ili estas tandorazoj, tio estas tandoroj de la maro, kaj ke la aliaj pli timigaj rampuloj, kiuj foje levigās el la maro por batali kontraŭ la tandorazoj, estas azdiritoj, tio estas maraj diritoj—Perry nomis ilin iĥtiosaŭroj. Ili similis balenojn kun aligatoraj kapoj.

Mi jam forgesis tiun malmulton da geologio, kiun mi lernis en la lernejo—restis al mi esence nur la memoro pri la teruro, kiun mi sentis ĉe la rigardado de bildoj pri restaŭritaj prahistoriaj monstroj, kune kun la firma opinio, ke iu ajn viro kun porktibio kaj multe da fantaziero povus “restaŭri” ĉian ajn paleolitikan monstron laŭ sia deziro kaj rikolti agnoskon kiel unuaranga paleontologo. Sed kiam mi vidis tiujn sveltajn, brilajn korpegojn speguliĝi en la sunlumo, kiam ili malmergiĝis el la oceano, skuante siajn gigantajn kapojn; kiam mi vidis la akvon fali de sur iliaj muskolozaj korpoj per miniaturaj akvofaloj, dum ili glitis tienreen, jen sur la supraĵo, jen duone mergiĝintaj; kiam mi vidis ilin renkontiĝi kun malfermitaj buŝoj, siblante kaj gruntante en sia titaneca kaj senĉesa militado, mi ekkomprenis kiel limigita estas la malriĉa kaj malforta imagopovo de la homoj, kompare kun la nekredebla genio de la Naturo.

Kaj Perry! Li estis mirigita ĝismedole. Tion li diris mem.

“David,” li rimarkis post longedaŭra marŝado ĉe la bordo de tiu mirinda maro. “David, iam mi instruis geologion kaj mi pensis, ke mi kredas tion, kion mi instruas; sed nun mi konstatas, ke mi ne kredis ĝin—ke homo tute ne povas kredi tiajn aferojn, se li ne vidas ilin propraokule. Estas aferoj, pri kiuj ni ne dubas, eble ĉar oni diradas ilin al ni denove kaj denove, kaj ni neniel povas malpruvi ilin—kiel la religion, ekzemple, sed ni ne kredas ilin—ni nur pensas, ke ni kredas. Se vi iam reatingos la eksteran mondon, vi trovos, ke la geologoj kaj la paleontologoj estos la unuaj, kiuj nomos vin mensogulo, ĉar ili scias, ke estaĵoj tiaj, kiajn ili restaŭris, neniam ekzistis. Oni ja povas *imagi* ilian ekzistadon en same tiel imagita epoko—sed nuntempe? Ba!”

Kiam ni denove haltis, Huĝa la Ruza sukcesis trovi sufiĉe da nestreĉita ĉeno por povi tordiĝi al la flanko de Dian. Ni ĉiuj staris, kaj kiam li proksimiĝis al la ino, ŝi turnis al li la dorson samstille kiel Tera virino, tiel ke mi ne povis ne rideti, sed la rideto daŭris mallonge, ĉar tiumomente la mano de la Ruzulo kaptis ŝian nudan brakon, kaj li krude tiris ŝin al si. Tiutempe mi ne konis la kutimojn kaj sociajn morojn de Pelucidaro; sed tamen mi eĉ ne bezonis la petan rigardon, kiun

la virino pafis al mi el siaj belegaj okuloj, por ke ĝi influu mian postan faron. Mi ne atendis por eltrovi, kion la Ruzulo intencas fari; anstataŭ atendi kaj antaŭ ol li povis kapti ŝin per la alia mano, mi donis al li tian pugnobaton sur la mentono, ke li falis teren.

Kriego de aprobo leviĝis de tiuj aliaj malliberuloj kaj sagotoj, kiuj vidis la mallongan dramon; ne ĉar mi helpis la virinon, kiel mi poste sciigis, sed pro la neta kaj al ili mirinda metodo, per kiu mi venkis Huĝan.

Kaj la virino? Komence, ŝi rigardis min per larĝaj, mirantaj okuloj, kaj tiam ŝi klinis la kapon, duone kaŝante la vizaĝon, kaj ŝiaj vangoj delikate ruĝiĝis. Dum momento ŝi tiel staris muta, kaj tiam ŝi alten levis la kapon kaj turnis al mi la dorson, kiel ŝi faris al Huĝa. Kelkaj el la malliberuloj ridis, kaj mi vidis la vizaĝon de Gak la Vila malheliĝi, dum li rigardis min serĉeme. Tiu parteto de la vango de Dian, kiun mi povis vidi, subite ŝanĝiĝis de ruĝo al blanko.

Tuj post kiam ni denove ekmarŝis, kaj kvankam mi komprenis, ke iel mi ofendis Dian la Bela, mi ne povis igi ŝin paroli kun mi, por ke mi lernu, kion mi misfaris — tiel multon respondus Sfinkso, se mi parolus al ĝi. Fine, mia propra malsaĝa fiero grandiĝis kaj ne allasis, ke mi plu klopodu, kaj tiel nia kamaradeco, kiu sen mia konscio fariĝis al mi tre grava, forŝvebis. Poste, mi parolis nur kun Perry. Huĝa nek renovigis sian sinaltrudadon al la virino nek proksimiĝis al mi.

Denove, la laciga kaj ŝajne senfina marŝado iĝis por mi vera inkubo. Ju pli mi ekkomprenis, kiel gravis por mi la amikeco kun Dian, des pli mi bedaŭris ĝian mankon, kaj des pli granda baro estis mia stulta fiero. Sed mi estis tre juna kaj mi rifuzis peti de Gak la klarigon, kiun li sendube povus doni, kaj kiu povus ĉion reĝustigi.

Dum la marŝo kaj dum haltoj, Dian konstante rifuzis vidi min — kiam ŝia rigardo vagis en mia direkto, ŝi aŭ rigardis super mian kapon aŭ rekte preter min. Finfine, mi fariĝis tiel senespera, ke mi decidis subigi mian memestimon kaj denove demandi al ŝi, kiel mi ofendis kaj kiel mi povos esti pardonita. Mi decidis fari tion dum la venonta halto. Tiutempe ni proksimiĝis al alia montoĉeno, kaj kiam ni atingis ĝin, ni ne serpentumis trans ilin tra iu tre alta montpasejo, sed eniris grandan naturan tunelon — fakte, temis pri serio de labirintaj grotoj, tiel mallumaj kiel Erebo.

La gardistoj havis neniujn torĉojn aŭ aliajn lumigilojn. Efektive, ni tute ne vidis

signojn de fajro aŭ artefarita lumo, de kiam ni eniris Pelucidaron. En lando de ĉiama tagmezo ne necesis lumigado sur la tersupraĵo, sed mi miris, ke mankas al ili rimedoj por lumigi la vojon en tiuj malhelaj subteraj pasejoj. Do ni antaŭeniris per helika rapideco, ofte stumblante kaj falante—dum la gardistoj sonigis muzikecan ĉanton antaŭ ni, en kiu foje troviĝis iuj altaj notoj, kiuj ĉiam indikis krudajn lokojn kaj vojturniĝojn.

Nun la haltoj plioftiĝis, sed mi ne volis alparoli Dian, ĝis mi povos vidi laŭ ŝia mieno, kiel ŝi akceptas miajn pardonpetojn. Finfine, febla heliĝo antaŭ ni sciigis nin pri la fino de la tunelo, pro kio almenaŭ mi estis tre dankema. Tiam, post subita vojturniĝo, ni elvenis en la plenan lumon de la tagmeza suno.

Sed samtempe mi subite ekrimarkis ion por mi vere katastrofan—Dian estis for, kaj ankaŭ kvin aŭ ses aliaj malliberigitoj. Ankaŭ la gardistoj vidis tion, kaj la vidaĵo de ilia feroĉa kolerego estis terura. Iliaj timindaj, bestaj vizaĝoj tordiĝis al la plej diablecaj mienoj, kiam ili akuzis unu la alian pri respondeco pro la perdo. Ili poste atakis nin, batante nin per lancostangoj kaj hakiletoj. Ili jam mortigis du kaptitojn apud la antaŭo de la vico, kaj samon ili farus al ni ĉiuj, sed la estro fine ĉesigis la brutalan buĉadon. Mi neniam vidis en mia tuta vivo tiel teruran ekzemplon de besteca kolero—mi dankis Dion, ke Dian ne estis inter tiuj postlasitaj por suferi ĝin.

El la dek du kaptitoj antaŭe ĉenitaj antaŭ mi, ĉiu dua, komencante de Dian, estis liberigita. Huĝa forestis. Gak restis. Kion ĝi signifis? Kiel oni faris ĝin? La estro de la gardistoj enketis pri tio. Baldaŭ li eltrovis, ke la krudaj seruroj, kiuj tenis la kolkatenojn, estis lerte malfermitaj.

“Huĝa la Ruza,” murmuris Gak, nun antaŭ mi en la vico. “Li prenis la virinon, kiun vi rifuzis havi,” li daŭrigis, ekrigardante min.

“Kiun mi rifuzis havi?!” mi kriis. “Kion vi volas diri?”

Li atente rigardis min dum momento.

“Mi dubis pri via rakonto, ke vi venis el alia mondo,” li diris fine, “sed alimaniere oni ne povus klarigi vian nescion pri la moroj de Pelucidaro. Ĉu vi vere ne komprenas, ke vi ofendis la Belulinon, kaj kiel?”

“Mi ne scias, Gak,” mi respondis.

“Do mi diros al vi. Kiam Pelucidara viro intervenas inter alia viro kaj la virino, kiun tiu volas havi, la virino apartenas al la venkinto. Dian la Bela apartenas al vi. Via devo estis aŭ preni ŝin aŭ liberigi ŝin. Se vi prenis ŝian manon, tio montrus vian deziron edzinigi ŝin, kaj se vi levus ŝian manon super vian kapon kaj faligus ĝin, tio signifus, ke vi ne volas ŝin kiel edzinon kaj liberigas ŝin de ĉiu ŝuldo al vi. Farante nek tion nek tion, vi faris al ŝi la plej grandan ofendon, kiun viro povas fari al virino. Nun ŝi estas via sklavinon. Neniu viro edzinigos ŝin aŭ povos tion fari kun honoro, ĝis li venkos vin en batalo, sed la viroj ne elektas sklavinon kiel edzinon—almenaŭ la viroj de Pelucidaro ne faras tion.”

“Mi ne sciis, Gak,” mi kriis. “Mi ne sciis. Ne pro tuta Pelucidaro mi farus malbonon al Dian la Bela, ĉu per parolo, rigardo aŭ faro. Mi ne deziras ŝin kiel sklavinon. Mi ne deziras ŝin kiel mian—”, sed tiam mi ekhaltis. La vizio de tiu dolĉa kaj senkulpa vizaĝo ŝvebis antaŭ mi en la nebulo de mia fantazio, kaj kvankam antaŭe mi kredis, ke mi nur ŝate retenas la memoron pri kara amikeco, kiun mi perdis, nun ŝajnis mallojale al Dian la Bela diri, ke mi ne deziras ŝin kiel edzinon. Mi pensis pri ŝi nur kiel bonvena amikino en stranga, kruela mondo, Eĉ tiam, mi ne kredis, ke mi amas ŝin.

Mi kredas, ke Gak konstatis la veron de miaj vortoj pli multe el mia mieno ol el mia parolo, ĉar iom poste, li kuŝigis sian manon sur mia ŝultro.

“Homo el alia mondo,” li diris, “Mi kredas vin. La lipoj povas mensogi, sed kiam la koro parolas per la okuloj, ĝi diras nur veron. Via koro parolis al mi. Mi scias nun, ke vi tute ne celis ofendi Dian la Bela. Ŝi ne estas de mia tribo, sed mia fratino estas ŝia patrino. Ŝi ne scias tion—ŝia patrino estis forrabita de ŝia patro, kiu venis, kune kun multaj aliaj Amoz-tribanoj por batali kontraŭ ni por niaj virinoj, la plej belaj virinoj de Pelucidaro. Tiam ŝia patro estis la reĝo de Amoz, kaj ŝia patrino estis la filino de la reĝo de Sari, kies regpovon mi, lia filo, transprenis. Do Dian estas la filino de reĝoj, kvankam ŝia patro ne plu estas la reĝo, de kiam la sadoko ĵetis lin kaj Jubal la Malbela forprenis de li la reĝecon. Pro ŝia altrangeco, la malbono, kiun vi faris al ŝi, ŝajnas des pli grava al tiuj, kiuj vidis ĝin. Ŝi neniam pardonos vin.”

Mi demandis al Gak, ĉu mi ne povus iel liberigi la virinon el la sklaveco kaj honto, kiujn mi senvole kaŭzis al ŝi.

“Se vi iam trovos ŝin, jes,” li respondis. “Nur levi ŝian manon kaj faligi ĝin en la kunesto de aliuloj sufiĉos por liberigi ŝin. Sed kiel vi iam povos trovi ŝin, vi, kiu

estas kondamnita al vivo de sklaveco en la subtera urbo Futra?”

“Ĉu neniel eblas forkuri?” mi demandis.

“Huĝa la Ruza forkuris kaj kunprenis la aliajn,” respondis Gak. “Sed ne estas aliaj senlumaj lokoj sur la vojo al Futra, kaj ne estos facile, kiam ni jam estos tie —la maharoj tre saĝas. Eĉ se oni povus forfuĝi el Futra, estas la tipdaroj—ili trovus vin, kaj tiam—” la Vilulo skutremis. “Ne, vi neniam fuĝos de la maharoj.”

La perspektivo estis malĝojiga. Mi demandis al Perry, kion li pensis pri ĝi; sed li nur suprentiris siajn ŝultrojn kaj daŭrigis longan preĝon, pri kiu li jam delonge okupiĝis. Li diris, ke la sola bela flanko de nia kaptiteco estas la ampleksa tempo, kiun ĝi donas al li por improvizi preĝojn. Tio jam ekobsedis lin.

La sagotoj jam komencis rimarki lian kutimon deklamadi dum tutaj marŝoj. Unu el ili demandis al li, kion li diras kaj al kiu li parolas. La demando donis al mi ideon, do mi rapidis respondi, antaŭ ol Perry povis ion diri.

“Ne ĝenu lin per interrompo,” mi diris. “Li estas tre sankta homo en la mondo, de kiu ni venis. Li parolas al spiritoj, kiujn vi ne povas vidi. Ne interrompu, aŭ ili saltos sur vin el la aero, kaj deŝiros viajn membrojn—jene,” kaj mi saltis al la granda bruto kun laŭta “Bu!”, kiu tiom timigis lin, ke li stumblis malantaŭen.

Mi sciis, ke la risko estas granda, sed se eblus profiti el la sendanĝera manio de Perry, mi volis profiti, kiam estis plej facile. Ĝi sukcesis bonege. La sagotoj traktis nin ambaŭ kun multe da respekto dum la cetero de la vojaĝo, kaj pri la afero ili poste informis siajn mastrojn, la maharojn.

Du marŝadojn post tiu epizodo ni atingis la urbon Futra. Ĝia enirejo estis markita per du altaj turoj el granito, de sur kiuj oni gardis ŝtuparon, kiu kondukis al la subtera urbo. Sagotoj gardostaris ĉi tie, kaj ankaŭ ĉe almenaŭ cent aliaj turoj dismetitaj sur granda ebenaĵo.

5-a ĉapitro

SKLAVOJ

Dum ni malsupreniris la larĝan ŝtuparon, kiu kondukis al la ĉefa avenuo de Futra, mi unuafoje ekvidis la regantan rason de la interna mondo. Nevole mi retiriĝis, kiam unu el la estaĵoj proksimiĝis por ekzameni nin. Ion pli hidan kaj malbelan ne eblus imagi. La ĉiopovaj maharoj de Pelucidaro estas grandaj rampuloj, el kiuj kelkaj estas ses ĝis ok futojn longaj, kun longaj, maldikaj kapoj kaj grandaj rondaj okuloj. Akraj, blankaj dentegoj viciĝas en iliaj bekosimilaj buŝoj, kaj ostecaj elstaraĵoj dentumas iliajn grandajn lacertajn korpojn de la kolo ĝis la fino de la longa vosto. Iliaj piedoj havas tri palmo-piedfingrojn, dum el la antaŭpiedoj elstaras malantaŭen je 45-grada angulo membranecaj flugiloj, kiuj almetiĝas al la korpo tuj antaŭ la postaj piedoj kaj finiĝas per akraj pintoj kelkajn futojn super la korpoj.

Mi ĵetis rigardon al Perry, kiam la estaĵo preterpasis min por ekzameni lin. La maljunulo gapis la fian kreaĵon per larĝaj, mirantaj okuloj. Post kiam ĝi pluiris, li turnis sin al mi.

“Ramforinko el la meza oolita epoko^[13], David,” li diris, “sed, je Dio, kiel grandega! La plej grandaj restaĵoj, kiujn oni iam malkovris, indikis grandecon, kiu ne superas tiun de ordinara korvo.”

Dum ni pluiris sur la ĉefa avenuo de Futra, ni vidis multajn milojn da tiaj estaĵoj alirantaj kaj venantaj de siaj tagaj devoj. Ili malmulte atentis nin. Futra estas elsternita subtere laŭ regula ordo, kiu indikas rimarkindan inĝenieran kapablon. Oni elhakis ĝin el tavolo de kalkŝtono. La stratoj estas larĝaj kaj havas unuecan dudek-futan alton. Je regulaj interspacoj la plafono de tiu subtera urbo estas trapenetrita de tuboj, kaj sistemo de lensoj kaj reflektiloj transdonas la sunlumon, moderigitan kaj difuzitan, forigante la kimerian^[14] tenebron, kiu alie regus. Laŭ simila maniero oni enlasas aeron.

Oni prenis Perry kaj min, kune kun Gak, al granda publika konstruaĵo, kie unu el

la sagotoj el nia antaŭa gardistaro klarigis al mahara oficisto la cirkonstancojn de nia kaptiĝo. La rimedo de komunikado inter la du estis rimarkinda pro tio, ke oni ne interŝanĝis parolajn vortojn. Ili aplikis ian gestolingvon. Kiel mi poste lernis, la maharoj havas nek orelojn nek parolan lingvon. Inter si mem ili komuniĝas per rimedo, kiu laŭ Perry devas esti ia sesa sentumo, kiu perceptas kvaran dimension.

Ni neniam tute komprenis lin, kvankam li tre ofte klopodis klarigi ĝin al mi. Mi sugestis telepatio, sed li neis, dirante, ke ne temas pri telepatio, ĉar ili povis interkomuniĝi nur dum kunestado, kaj ĉar ili ne povas paroli kun la sagotoj aŭ la aliaj loĝantoj de Pelucidaro per la sama rimedo, per kiu ili mem interparolis.

“Ili faras jenon,” diris Perry. “Ili projekcias siajn pensojn en la kvaran dimension, en kiu ili fariĝas percepteblaj per la sesa sentumo de la aŭskultanto. Ĉu mi faras la aferon tute klara?”

“Tute ne, Perry,” mi respondis. Li malespere balancis sian kapon kaj returnis sin al sia laboro. Ili donis al ni taskon porti grandan kvanton da mahara literaturo de unu ejo al alia, kie ni devis aranĝi ĝin sur bretoj. Mi sugestis al Perry, ke ni estas en la publika biblioteko de Futra, sed poste, kiam li komencis trovi la ŝlosilon al ilia skriba lingvo, li informis min, ke temas pri la antikva arkivo de la raso.

Dum tiu tempo mi konstante pensis pri Dian la Bela. Mi ĝojis, kompreneble, ke ŝi fuĝis de la maharoj kaj de la sorto aludita de la sagoto, kiu intencis aĉeti ŝin ĉe nia alveno al Futra. Mi ofte scivolis, ĉu la grupeto de fuĝintoj estis kaptita de la gardistoj, kiuj reiris por serĉi ilin. Foje, mi eĉ kredis, ke mi pli kontentus, se Dian estus en Futra, anstataŭ dependa de la indulgo de Huĝa la Ruza.

Gak, Perry kaj mi ofte interparolis pri la eblo forfuĝi, sed la sariano estis tiel saturita de sia tutviva kredo pri la neebleco fuĝi de la maharoj, krom per miraklo, ke li ne multe helpis al ni—lia sinteno estis tiu de homo, kiu atendas, ke la miraklo venu al li.

Je mia propono, Perry kaj mi faris kelkajn glavojn el pecoj de fero, kiujn ni trovis inter diversaj forĵetaĵoj en la ĉeloj, kie ni dormis, ĉar oni lasis al ni preskaŭ senliman liberecon en la limoj de la konstruaĵo, en kiun oni metis nin. Tiel multe da sklavoj priservis la enloĝantojn de Futra, ke neniu el ni estis troŝarĝita per laboro, kaj niaj mastroj ne traktis nin kruele.

Ni kaŝis niajn novajn armilojn sub la feloj, kiuj estis niaj litoj, kaj poste Perry

koncipis la ideon fari pafarkojn kaj sagojn—armilojn ŝajne nekonatajn en Pelucidaro. Poste ŝildoj; sed akiri ilin estis por mi facile, ĉar mi ŝtelis ilin desur la muroj de la ekstera gardoĉambro de la konstruaĵo.

Ni jam finis tiujn aranĝojn por protekti nin post la foriro el Futra, kiam la sagotoj, kiujn oni sendis por rekapti la fuĝintajn malliberigitojn, revenis kun kvar el ili, inter ili Huĝa. Dian kaj du aliaj eskapis ilin. Okazis, ke Huĝa estis malliberigita en la sama konstruaĵo kiel ni. Li diris al Gak, ke li ne plu vidis Dian aŭ la aliajn, de kiam li liberigis ilin en la senluma groto. Kio okazis al ili, li tute ne sciis—eble ili ankoraŭ vagadis, perditaj en la labirinta tunelo, se ili ne jam mortis pro malsato.

Nun mi ektimis eĉ pli pri la sorto de Dian, kaj samtempe, kiel mi supozas, mi unuafoje eksciis, ke mian ŝato al tiu virino eble fontas el io plia ol nura amikeco. Dum ĉiuj horoj de la tago ŝi estis la konstanta temo de miaj pensoj, kaj kiam mi dormis ŝia kara vizaĝo hantis miajn sonĝojn. Pli neŝancelebla ol iam antaŭe fariĝis mia decido fuĝi de la maharoj.

“Perry,” mi konfidis al la maljunulo, “se ni devos traserĉi ĉiun kvadratan colon de ĉi tiu mondeto, mi trovos Dian la Bela kaj reĝustigos la malbonon, kiun mi neintence faris al ŝi.” Jen la preteksto, kiun mi faris al Perry.

“Mondeto!” li rikanis. “Vi ne komprenas, kion vi diras, bubo,” kaj tiam li montris al mi mapon de Pelucidaro, kiun li antaŭnelonge trovis inter la manuskriptoj, kiujn li aranĝis.

“Rigardu,” li diris, fingromontrante, “tio evidente estas akvo, kaj ĉio ĉi estas tero. Ĉu vi rimarkas la ĝeneralan formon de la du areoj? Kie troviĝas oceanoj sur la ekstera krusto, sube, ĉi tie, oni trovas teron. Tiuj relative malgrandaj areoj de oceano ĝenerale sekvas la konturojn de la kontinentoj de la ekstera mondo.

“Ni scias, ke la krusto de la terglobo estas 500 mejlojn dika; krome, ke la interna diametro de Pelucidaro estas proksimume 7000 mejloj, kaj la surfaca areo estas 165.480.000 kvadrataj mejloj. Tri kvaronoj el tio estas tero. Pripensu! Tersurfaco de 124.110.000 kvadrataj mejloj! Nia propra mondo havas nur 53.000.000 kvadratajn mejlojn da tero, kaj ĝia cetera surfaco estas kovrita de akvo. Tiel same, kiel oni ofte komparas landojn laŭ ilia relativa grandeco, tiel, se ni same komparas la du mondojn, ni trovas strangan anomalion, nome, ke pli granda mondo situas interne de pli malgranda!

“Kie en ĉi tiu vasta Pelucidaro vi serĉus vian Dian? Sen steloj aŭ lumoj aŭ moviĝanta suno, kiel vi povus trovi ŝin, eĉ se vi scius, kie ŝi estas?”

Lia eldiro estis konvinka. Ĝi forprenis de mi la spiron; sed mi trovis min post ĝi des pli firme rezoluta, ke mi provos ĝin.

“Se Gak akompanos nin, ni eble sukcesos je ĝi,” mi sugestis.

Perry kaj mi serĉis lin kaj starigis al li la demandon rekte.

“Gak,” mi diris, “ni nepre volas fuĝi el la sklaveco. Ĉu vi akompanos nin?”

“Ili atakigos siajn tipdarojn,” li diris, “kaj ni estos mortigitaj; sed...” li hezitis, “mi riskus fuĝi, se mi kredus, ke estus eĉ malgranda ŝanco liberiĝi kaj reiri al mia propra popolo.”

“Ĉu vi kapablas trovi vian propran landon?”, demandis Perry. “Kaj ĉu vi povus helpi al David serĉi Dian?”

“Jes.”

“Sed kiel vi povus vojaĝi tra nekonataj teritorioj sen astroj aŭ kompasoj por gvidi vin?”, persistis Perry.

Gak ne komprenis, kion signifas la eldiroj de Perry pri astroj kaj kompasoj, sed li certigis nin, ke oni povus eĉ vindi la okulojn de iu ajn pelucidarano kaj porti lin al la plej malproksima parto de la mondo, sed tamen li kapablas reiri rekte al sia hejmo laŭ la plej mallonga vojo. Ŝajnis surprizi lin, ke ni trovas ĝin iel ajn mirinda. Perry diris, ke ŝajne temas pri la sama hejmenira instinkto, kiun kelkaj specioj de Teraj kolomboj havas. Mi ne scias pri tio, kompreneble, sed ĝi donis al mi ideon.

“Do povas esti, ke Dian trovis rektan vojon al sia propra popolo?” mi demandis.

“Certe,” respondis Gak, “almenaŭ se iu potenca rabobesto ne mortigis ŝin.”

Mi favoris tujan provon fuĝi, sed kaj Perry kaj Gak konsilis atendi iun helpan akcidenton, kiu sekurigus al ni ioman ŝancon de sukceso. Mi ne komprenis, kia akcidento povus trafi tutan komunumon en lando de ĉiama taglumo, kies enloĝantoj ne havas fiksitajn dormajn kutimojn. Mi eĉ estas certa, ke kelkaj

maharoj neniam dormas, dum aliaj, inter longaj periodoj de maldormeco, eble rampas en malluman ejon sub sia loĝejo, kie ili longe dormadas. Perry diras, ke se maharo restas veka dum tri jaroj, li kompensos la tutan perditan dormon per unu tutjara dormado. Eble tio estas vera, sed mi neniam vidis pli ol tri el ili dormantaj, kaj la vido de tiu triopo sugestis al mi nian manieron fuĝi.

Mi jam serĉadis malproksime sub la niveloj, kiujn ni sklavoj rajtis frekventi—eble kvindek futojn sub la ĉefa etaĝo de la konstruaĵo—inter reto de koridoroj kaj apartamentoj, kiam mi subite trovis tri maharojn, kiuj kuŝis sur lito el feloj. Unue, mi kredis ilin mortintaj, sed ilia regula spirado poste konvinkis min pri mia eraro. Kiel ekfulmo la penso venis al mi, ke tiuj dormantaj rampuloj donas al ni mirindan okazon eviti la atenton de niaj kaptintoj kaj de la sagotaj gardistoj.

Mi haste reiris al Perry, kiu atenteme studadis mucidan amason da al mi sensignifaj hieroglifoj, kaj klarigis mian planon al li. Je mia miro, ĝi ŝokegis lin.

“Estus murdo, David,” li kriis.

“Ĉu estas murdo mortigi reptilian monstron?” mi konsternite demandis.

“Ĉi tie ili ne estas monstroj, David,” li respondis. “Ĉi tie ili estas la dominanta raso—kaj ni estas la ‘monstroj’—de pli malalta specio. En Pelucidaro la evolucio procedis alie ol en la ekstera mondo. Tie, teruraj konvulsioj de la naturo ĉiam denove ekstermis la ekzistantajn speciojn—se ne tio, iu monstro el la epoko de dinosaŭroj eble regus nian mondon hodiaŭ. Ĉi tie ni vidas, kio povus esti okazinta en nia propra historio, se la kondiĉoj estus kiel ĉi tie.

“La vivo en Pelucidaro estas multe pli juna ol sur la ekstera krusto. Ĉi tie la homoj atingis evolucian ŝtupon analogan al la ŝtonepoko en la historio de nia propra mondo, sed dum sennombraj jarmilionoj ĉi tiuj rampuloj progresis. Eble ilia sesa sentumo, kiu ŝajnas al mi nedubebla, donis al ili avantaĝon super la aliaj, pli timinde armitaj bestoj, sed eble ni neniam scios tion. Ili rigardas nin kiel ni rigardas la bestojn de niaj kampoj, kaj mi lernas el iliaj skribaj kronikoj, ke aliaj maharaj rasoj manĝas homojn—ili tenas ilin en grandaj gregoj, ĝuste kiel ni tenas brutojn. Ili plej zorge bredas la homojn, kaj kiam tiuj estas tute grasaj, ili mortigas ilin kaj manĝas ilin.”

Mi skutremis.

“Kial vi trovas ĝin tiel terura, David?” demandis la maljunulo. “Ili komprenas

nin ne pli bone ol ni komprenas la pli malaltajn bestojn de nia propra mondo. Mi trovis ĉi tie tre erudiciajn diskutojn pri la demando, ĉu *gilakoj*, kiel ili nomas la homojn, havas ian rimedon de komunikado. Unu verkanto asertas, ke ni eĉ ne kapablas rezoni, kaj ke ĉiu nia ago estas meĥanisma aŭ instinkta. La reganta raso de Pelucidaro, David, ankoraŭ ne lernis, ke la homoj interkomunikiĝas kaj rezonas. Ĉar ni ne komunikiĝas kiel ili, ili ne kapablas kompreni, ke ni entute iel interkompreniĝas. Ni pri la bestoj de nia propra mondo ne alie rezonas. Ili scias, ke la sagotoj havas parolan lingvon, sed ili komprenas nek ĝin nek kiel ĝi manifestiĝas, ĉar ili ne havas organojn de aŭdado. Ili kredas, ke la moviĝo de la lipoj sola transportas la signifon. Ke la sagotoj povas komunikiĝi kun ni, tion ili eĉ ne povas koncepti.

“Jes, David,” li konkludis, “plenumi vian planon signifus murdi.”

“Nu bone, se necesas, Perry,” mi respondis, “mi fariĝos murdisto.”

Li igis min klarigi la planon denove kaj tre detale, kaj pro iu kaŭzo, kiu tiam ne estis klara al mi, li postulis tre precizan priskribon de la apartamentoj kaj koridoroj, kiujn mi ĵus esploris.

“Konsiderante, ke vi nepre intencas efektiviĝi vian frenezan planon, David”, li diris finfine, “mi demandas al mi, ĉu ni eble ne povus samtempe fari reale kaj daŭre utilan servon al la homaro de Pelucidaro. Aŭskultu, mi lernis multajn mirindajn aferojn el ĉi tiu arkivo de la maharoj. Por ke vi ĝuste taksu mian planon, mi koncize skizos la historion de tiu specio.

“Iam la maskloj estis ĉiopovaj, sed antaŭ multaj epokoj la inoj poiome iĝis la mastroj. Dum la sekvantaj epokoj ne okazis rimarkindaj ŝanĝoj ĉe la mahara specio. Ĝi daŭre progresis sub la inteligenta kaj benoriĉa regado de la damoj. La scienco progresis per paŝegoj. Tio validas aparte pri la sciencoj, kiujn ni nomas biologio kaj eŭgeniko. Fine, iu sciencistino anoncis, ke ŝi eltrovis metodon por fekundigi ovojn kemie post ilia demeto—ĉiuj veraj reptiliojn, kiel vi scias, naskiĝas el ovoj.

“Kio okazis? Tuj oni ne plu bezonis masklojn, ĉar la specio ne plu dependis de ili. Pasis pliaj epokoj ĝis la nuntempo, en kiu ni trovas specion, kiu konsistas nur el inoj. Sed jen la grava afero. Nur unu mahara popolo tenas la sekreton pri tiu kemia formulo. Ĝi estas en la urbo Futra, kaj se mi ne serioze eraras, ĝi troviĝas laŭ mia juĝo bazita sur via priskribo de la keloj, kiujn vi trapasis hodiaŭ, en la

kelo de ĉi tiu konstruaĵo.

“Pro du kialoj ili forkaŝas ĝin kaj ĵaluze gardas ĝin. Unue, ĉar la vivo mem de la maharoj dependas de ĝi, kaj due, ĉar kiam ĝi estas publika propraĵo, kiel en la komenco, tiel multaj eksperimentadis je ĝi, ke la danĝero de troloĝateco fariĝis tre serioza.

“David, se ni povus fuĝi kaj samtempe kunporti kun ni tiun gravegan sekreton, kian servon ni plenumus per tio por la homaro de Pelucidaro!” La nura penso preskaŭ superfortis min. Ja estus ni la duopo, kiuj metus la homojn de la interna mondo en ilian laŭrajtan lokon inter la kreitaĵoj. Nur la sagotoj barus ilian vojon al absoluta supereco, kaj mi opiniis, ke preskaŭ certe la sagotoj ŝuldas sian tutan potencon al la pli granda inteligenteco de la maharoj—mi ne povis kredi, ke tiuj gorilecaj bestoj intelektu superas la pelucidaran homaron.

“Perry!” mi diris ekscitite, “Vi kaj mi savos tutan mondon! Kune, ni gvidos la homajn gentojn el la mallumo de nescio en la lumon de progreso kaj civilizo. Ni transportos ilin per unu paŝo el la ŝtonepoko en la dudekan jarcenton. La nura penso pri tio estas absolute fabeleca.”

“David,” diris la maljunulo, “Mi kredas, ke Dio sendis nin ĉi tien ĝuste por tiu celo—estos la laboro de mia vivo instrui al ili Lian mesaĝon—konduki ilin al la lumo de Lia indulgo, dum ni edukos iliajn korojn kaj manojn por vivo en kulturo kaj civilizo.”

“Vi pravas, Perry,” mi diris, “kaj dum vi instruos ilin preĝi, mi instruos ilin batali, kaj kune ni kreos rason de homoj, kiu honorindigos nin ambaŭ.”

Gak eniris la apartamenton kelkajn minutojn antaŭ la fino de nia interparolo, kaj nun li volis scii la kialon de nia ekscitiĝo. Perry opiniis prudente, ke ni ne tro rakontu al li, do mi klarigis nur, ke mi havas planon por fuĝi. Post kiam mi skizis ĝin al li, li ŝajnis tiel ŝokita kiel antaŭe Perry, sed pro alia kialo. La Vilulo pripensis nur nian hororigan sorton okaze de eventuala eltrovo; sed finfine mi persvadis lin akcepti mian planon kiel la solan realigeblan, kaj kiam mi certigis lin, ke mi transprenos la plenan respondecon pri ĝi, se oni kaptos nin, li donis sian heziteman jeson.

Subnotoj

[13] alterna nomo de ĵurasia epoko.

[14] tre malhela kaj morna, kiel en la mita lando priskribita de Homero kiel loko de eterna mallumo.

6-a ĉapitro

KOMENCO DE HORORO

En Pelucidaro unu tempo taŭgas kiel alia. Ne estis nokto, kiu vualu nian entreprenotan fuĝon. Necesis ĉion fari en plena taglumo—ĉion krom la laboro, kiun ni devis fari en la apartamento sub la konstruaĵo. Do ni decidis elprovi nian planon tuj, por ke la maharoj, kiuj devis ebligi ĝin, ne vekiĝu, antaŭ ol mi atingos ilin; sed seniluziiĝo trafis nin jam survoje al la subaj elkavigitejoj, ĉar tuj kiam ni atingis la ĉefan etaĝon de la konstruaĵo, ni renkontis hastantajn arojn de sklavoj, kiujn forta sagota gardistaro pelkurigis el la konstruaĵo al la avenuo.

Aliaj sagotoj sagis tien kaj aliloken por serĉi aliajn sklavojn, kaj tuj kiam ni aperis, oni alsaltis nin kaj ŝovis nin en la vicon de marŝantaj homoj.

Nek la kialon nek la celon de la ĝenerala eliro ni konis, sed iom poste disvastiĝis tra la vicoj de kaptitoj onidiro, ke oni rekaptis du forkurintajn sklavojn, viron kaj virinon, kaj ke ni marŝas al la loko, kie ni vidos ilian punon, ĉar la viro mortigis sagoton el la taĉmento, kiu ĉasis kaj rekaptis ilin.

Je tiu sciigo mia koro eksaltis en mian gorĝon, ĉar mi certis, ke la du kaptitoj devenas el tiu grupo, kiu forfuĝis en la senluma groto kun Huĝa la Ruza, kaj ke Dian estas la virino. Gak tion kredis, kaj ankaŭ Perry.

“Ĉu ni ne povas fari ion ajn por savi ŝin?” mi demandis al Gak.

“Nenion”, li respondis.

Tra la homplena avenuo ni marŝis, kaj dum tio la gardistoj traktis nin per neordinara krueleco, kvazaŭ ankaŭ ni estus implikitaj en la murdo de ilia kompano. Oni intencis fari el la okazo lecionon al la aliaj sklavoj pri la danĝero kaj vaneco de ĉia provo fuĝi, kaj pri la nepra morto, kiu trafas murdinton de supera estaĵo, kaj mi supozas, ke pro tio la sagotoj sentis sin plene rajtigitaj fari la tutan procedon kiel eble plej malkomforta kaj dolora al ni.

Ili pikis nin per siaj lancoj kaj batis nin per siaj hakiletoj pro la plej malgrandaj provokoj kaj eĉ neprovokite. Ni travivis tre malagrablan duonhoron, ĝis oni fine pelis nin tra malalta enirejo en grandegan konstruaĵon, kies mezon okupis granda areno. Benkoj ĉirkaŭis tiun liberan spacon je tri flankoj, kaj je la kvara troviĝis amasoj da grandaj rokegoj sur deklivo, kiu altiĝis de la antaŭo supren ĝis la tegmento.

Komence, mi ne povis konstati la celon de tiu rokamasego, krom eble prezenti rustikan kaj pitoreskan fonon por la scenoj prezentataj en la areno antaŭ ĝi, sed baldaŭ poste, kiam la lignaj benkoj preskaŭ jam plenis de sklavoĵoj kaj sagotoj, mi ekvidis la uzmanieron de la rokegoj, ĉar tiam la maharoj komencis vice enpaŝi la konstruaĵon.

Ili marŝis rekte trans la arenon al la rokoj ĉe la alia flanko, kie ili elvastigis siajn vespertajn flugilojn kaj suprenŝvebis trans la altan muron ĉirkaŭ la areno kaj faris sin komfortaj sur la rokegoj. Ili estis do la rezervitaj, loĝiaj seĝoj por la regantaro.

La rampuloj trovis la neŝlifitan supraĵon de granda roko tiel komforta, kiel ni la molecon de remburita brakseĝo. Tie ili pigre kuŝis, palpebrumante per siaj hidaj okuloj kaj sendube interparolante en sia lingvo de la sesa sentumo kaj kvara dimensio.

Unuafoje mi vidis ilian reĝinon. Ŝi malsimilis al la aliaj per neniu trajto, kiun miaj Teraĵoj okuloj povis percepti, ĉar ĉiuj maharoj fakte aspektas identaj al mi, sed ŝi transiris la arenon nur, post kiam ŝiaj regnaninoj jam okupis lokon, antaŭirite de dudek grandegaj sagotoj, la plej grandaj, kiujn mi iam vidis, dum ĉe ŝiaj flankoj anaspaŝis po unu granda tipdaro, kaj postiris ŝin dudek pliaj sagotaj gardistoj.

Ĉe la bariero, la sagotoj suprengrimpis la apikaĵon per vere simieca lerto, dum malantaŭ ili la aroganta reĝino ŝvebis alten per la flugiloj, kun siaj du timindaj drakoj ambaŭflanke, kaj sternis sin sur la plej granda rokego el ĉiuj, precize en la mezo de tiu amfiteatra flanko rezervita por la dominanta raso. Tie ŝi ekkaŭris, tiu reĝino plej malbela kaj neinteresa, kvankam sendube tute konvinkita pri sia beleco kaj die donita regorajto, same kiel la plej fiera monarko de la ekstera mondo.

Kaj tiam komenciĝis la muziko—muziko sensona! La maharoj ne povas aŭdi, do

la tamburoj kaj fifroj kaj trumpetoj de Teraj orkestroj estas al ili nekonataj. La “orkestro” konsistas el pli ol dudek maharaj. Ili marŝis en vico al la centro de la areno, kie la estaĵoj sur la rokoj povis spekti ilin, kaj tie ili ludis dekkvin aŭ dudek minutojn.

Ilia tekniko konsistis el vostosvingado kaj kapomovado laŭ regula sinsekvo de mezuritaj moviĝoj, kio rezultigis kadencon ŝajne same plaĉan al maharaj okuloj kiel la kadenco de nia instrumenta muziko al niaj oreloj. Foje la tuta muzikistaro samtempe faris egalmezurajn paŝojn al unu flanko aŭ al la alia, aŭ malantaŭen aŭ antaŭen—ĉio ĉi impresis min kiel nekomprenebla ridindaĵo, sed post la unua muzikaĵo la maharaj sur la rokoj montris la unuajn signojn de entuziasmo, kiujn mi vidis ĉe la reganta raso de Pelucidaro. Ili svingis siajn grandajn flugilojn supren-malsupren kaj batis siajn rokajn sidlokojn per la potencaj vostoj, ĝis la tero tremis. Tiam la muzikistoj ekludis alian muzikaĵon, kaj denove regis tomba silento. En unu rilato la mahara muziko estas belega—se la ludata muzikaĵo ne plaĉas, oni devas nur fermi la okulojn.

Fine, elĉerpinte sian repertuaron, la muzikistoj ekflugis en la aeron kaj ekkuŝis sur la rokoj super kaj malantaŭ la reĝino. Tiam komenciĝis la ĉefa tagorda punkto. Kelkaj sagotaj gardistoj ŝovis viron kaj virinon en la arenon. Spite miajn antaŭtimojn, mi kliniĝis antaŭen el mia seĝo por ekzameni la virinon, esperante, ke ŝi estu iu alia ol Dian la Bela. Ŝia dorso estis turnita al mi dum iom da tempo, kaj la granda korvonigra haramaso, kiun mi vidis, plenigis min per timosento.

Baldaŭ oni malfermis pordon sur unu flanko de la arena muro por enlasi grandan, hirtan, taŭrosimilan beston.

“Ĝi estas granda bovo,” flustris Perry ekscitite. “Tiaj bestoj vagadis kun la kaverna urso kaj la mamuto sur la ekstera mondo en iu praepoko. Ni vojaĝis milionon da jaroj malantaŭen, David, al la infanaĝo de planedo—ĉu ne mirinde?”

Sed mi vidis nur la nigran hararon de la duone nuda virino, kaj mia koro ĉesis bati pro la obtuza mizero, kiun mi eksentis vidante ŝin, kaj en tiu momento ne interesis min la mirindaĵoj de la natura historio. Se ne kunestus Gak kaj Perry, mi saltus sur la plankon de la areno por dividi la sorton de tiu senpreza trezoro el la ŝtonepoko.

Kiam eliris la bovego—*dago* ĝi nomiĝis en Pelucidaro—oni ĵetis du lancojn en

la arenon antaŭ la piedojn de la kaptitoj. Ŝajnis al mi, ke blovtubo por faboj tiel efikus kiel tiuj mizeraj armiloj kontraŭ la kolosa monstro.

Dum la besto proksimiĝis al la duopo, muĝante kaj stampfante per la potenco de multaj Teraj virbovoj, apertiĝis rekte sub ni alia pordo, el kiu nun eliris la plej terura muĝo, kiu iam trafis miajn ofenditajn orelojn. En la komenco mi ne povis vidi la beston, kiu eligis tiun laŭtan defion, sed la sonego igis la du viktimojn subite turniĝi, kaj jen mi vidis la vizaĝon de la junulino—ne estis Dian! Mi preskaŭ ploris pro faciliĝo.

Kaj nun, dum ili ambaŭ staris ŝtoniĝintaj pro timo, mi vidis la farinton de tiu korpremiga sono silente ŝteliri al loko, kie mi povis ĝin vidi. Estis grandega tigro—de tia speco, kiu ĉasis la grandajn bovojn tra la praĝangaloj dum la junaĝo de nia mondo. Laŭ la formo kaj eksteraj markoj ĝi ne malsimilis al la plej noblaj bengalaj tigroj de nia propra mondo, sed kiom ĝiaj dimensioj gigantis, tiom ĝiaj koloroj imponis. La brilega flavo preskaŭ stridis, ĝia blanko estis lanuga, ĝia nigro glimis kiel la plej bona antracito, kaj ĝia felo estis longa kaj hirta kiel tiu de monta kapro. Neniu povus nei la belegon de tiu besto, sed same kiel ĉio sur Pelucidaro pli grandas kaj pli intense buntas, tiel ankaŭ pli intensa estis ĝia feroca teniĝo. Ne nur unuopaj anoj de tiu speco ĉasas homojn—ĉiuj estas homĉasantoj. Sed ili ne limigas sian furaĝadon al homoj. Ĉiajn bestojn kaj fiŝojn de Pelucidaro ili manĝas kun avido ĉe siaj konstantaj penadoj nutri siajn potencajn muskolojn.

Ĉe unu flanko de la mortkondamnita paro la dago muĝis kaj antaŭenpaŝis, kaj ĉe la alia flanko la angorinspira *tarago* ŝtele proksimiĝis al ili kun malfermita faŭko kaj salivgutantaj dentegoj.

La viro ekkaptis la lancojn kaj transdonis unu al la virino. Aŭdinte la muĝadon de la tigro, la taŭro ekhurlis per rabia furiozeco. Neniam en mia vivo mi aŭdis tiel inferan bruegon kiel faris la du bestegoj, kaj pripensu, ke ĝi restis neaŭdebla al la fiaj rampuloj, pro kies distro oni okazigis la spektaklon!

Nun la dago kuratakis de unu flanko, kaj la tarago de la alia. La du nanoj starantaj meze ŝajnis tuj pereontaj, sed ĝuste kiam la brutacoj atingis ilin, la viro ekkaptis la brakon de sia kompanino, kaj kune ili saltis flanken, dum la furiozaj kreitaĵoj trafis unu la alian kiel koliziantaj lokomotivoj.

Sekvis batalego, kies senintermita kaj timinda feroco transcendas la eblojn de

imagado kaj priskribado. Ree kaj ree la enorma taŭro ĵetis la kolosan tigron alten en la aeron, sed kiam la katego frapiĝis al la tero, ĝi ĉiufoje rekuris al la lukto kun energio ŝajne ne reduktita kaj kun videble pli forta kolero.

Dum kelka tempo la geviroj penadis nur resti for de la du bestegoj, sed fine mi vidis ilin disiĝi. Ambaŭ ŝtele paŝis al po unu el la luktantoj. Nun la tigro estis sur la larĝa dorso de la taŭro, kroĉite al la granda kolo per la tenajlaj dentegoj kaj disŝirante la dikan haŭton en striojn kaj pecojn per siaj longaj kaj fortikaj ungegoj.

Dum momento la taŭro staris muĝante kaj tremante pro doloro kaj rabio, kun la fendohufoj vaste elmetitaj, dum ĝi vigle vipis per la vosto de flanko al flanko, sed tuj poste, en freneza orgio de saltado, ĝi kuregis tra la areno en furioza provo deĵeti sian ŝirantan rajdanton. Nur kun peno la virino sukcesis eviti la unuan impeton de la vundita besto.

Ĉiuj ĝiaj penoj por defaligi la tigron ŝajnis vanaj, ĝis ĝi en sia malespero ĵetis sin mem teren kaj ĉirkaŭruliĝis plurfoje. Nur mallonga tia traktado tiel konsternis la tigron, forprenante de ĝi la spiron, kiel mi supozas, ke ĝi perdis sian alkroĉiĝon, kaj tuj poste la granda dago katrapide leviĝis kaj profundigis siajn kornegojn en la ventron de la tarago, najlante ĝin al la grundo de la areno.

La granda kato ungegis la hirtan kapon, ĝis la okuloj kaj oreloj estis deŝiritaj kaj restis nur kelkaj rubandoj de traŝirita sanganta karno sur la kranio. Dum ĝi spite me traeltenis la aflikton de tiu doloriga puno, la dago staris senmova, fiksante sian malamikon, kaj ĝuste tiumomente alsaltis la viro, kiu jam vidis, ke la blinda taŭro estos la malpli danĝera malamiko, kaj trapuŝis la lancon en la koron de la tarago.

Kiam ĉesis la feroce ungorastado de tiu besto, la taŭro levis sian sangantan, nevidpovan kapon, kaj kun kolera muĝo ekkuris trans la arenon. Per grandaj saltoj ĝi alvenis rekte al la arena muro sub niaj sidlokoj, kaj tuj poste unu el liaj saltegoj hazarde portis lin trans la barieron en la mezon de la sklavo kaj sagotoj tuj antaŭ ni. Svingante siajn sangajn kornojn de flanko al flanko, la besto falĉis tra la homamaso, rekte supren en nia direkto. Antaŭ li, sklavo kaj gorilohomoj interluktis en la stampedo por eskapi la mortdanĝeran agoniadon de la estaĵo, ĉar vere furioza estis la atako.

Forgesinte nin, la gardistoj aliĝis al la amaskurado al la elirejoj, kiuj

multnombraj breĉis la muron de la amfiteatro malantaŭ ni. Perry, Gak kaj mi estis apartigitaj dum la kaoso, kiu regis en la momentoj, post kiam la besto supersaltis la muron de la areno, kaj kiam ĉiu celis savi nur sian propran haŭton.

Mi kuris dekstren, preterpasante kelkajn elirejojn obstrukcitajn de la timfrenezigita homamaso, kiu interbatalis por eskapi. Deruliĝis sceno, kvazaŭ tuta aro de dagoj atakus ilin, anstataŭ unusola blinda, mortanta besto, sed tiel efikas paniko de homamaso.

7-a ĉapitro LIBERIĜO

Kurinte el la trajektorio de la besto, mi ĉesis timi ĝin, sed same tiel rapide ekkaptis min alia emocio—espero pri fuĝo, kiun la demoralizita stato de la gardistaro tiumomente ebligis.

Mi pensis pri Perry, kaj se mi ne esperus, ke liberiĝinte mi povos pli bone akceli ankaŭ lian liberiĝon, mi tuj pelus el mia kapo ĉiujn pensojn pri fuĝo. Sed okazis, ke mi hastis dekstren ĉe la serĉado de elirejo, al kiu ne kuris sagotoj, kaj fine mi trovis tian—malaltan kaj stretan aperturon, kiu kondukis en obskuran koridoron.

Sen primediti la eblajn konsekvencojn, mi pafis min en la ombrojn de la tunelo, palpserĉante mian vojon en la senlumeco tra kelka distanco. La rumorado de la amfiteatro pli kaj pli dampiĝis, ĝis post iom da tempo regis silento kiel en tombo. Iom da malintensa lumo filtriĝis tra ventumaj kaj lumigaj tuboj lokitaj je regulaj intervaloj, sed ĝi apenaŭ sufiĉis por doni al miaj homaj okuloj iom da vidkapablo en la mallumo, do mi devis moviĝi tre singarde, palpserĉante mian vojon unu paŝon post la alia, tuŝante per unu mano la muron je mia flanko.

Iom poste, la lumo fortiĝis, kaj je mia ĝojo mi trovis post momento suprenirantan ŝtuparon, ĉe kies supro la helega lumo de la tagmeza suno brilis tra aperturo ĉe la tersurfaco.

Singarde mi grimpis la ŝtupojn supren al la fino de la tunelo, kaj tie mi skoltis, vidante la vastan ebenaĵon de Futra antaŭ mi. La multnombraj altaj turoj el granito, kiuj markis la diversajn enirejojn de la subtera urbo, situis ĉiuj antaŭ mi—dorse de mi la ebenaĵo etendiĝis plata kaj sentrajta ĝis la proksimaj antaŭmontetoj. Mi do atingis la tersupraĵon ĉe la rando de la urbo, kaj miaj fuĝperspektivoj ŝajnis multe pli helaj.

Unue mi havis la impulson atendi la noktiĝon, antaŭ ol provi transiri la ebenaĵon—tiel profunde radikitaj estas la penskutimoj—sed subite mi rememoris la

eterne tagmezanan ardon, al kiu la tuta Pelucidaro estas elmetita, kaj kun rideto mi faris unuan paŝon antaŭen en la taglumon.

Ĝistalie altkreska herbo kovras la ebenaĵon de Futra—la splende floranta herbo de la interna mondo, ĉe kiu ĉiun herberan pinton ornamas eta, kvinpetala floreto—brilaj diverskoloraj steletoj, kiuj glimis inter la verdaj folioj, donacante al tiu stranga, sed bela pejzaĝo siaspecan ĉarmon.

Sed la sola vidaĵo, kiu allogis min en tiu momento, estis la foraj montetoj, al kiuj mi volis fuĝi, do mi rapidis antaŭen, tretante en mia hasto la miriadajn belaĵojn subpiede. Perry diras, ke la gravitoforto malpli grandas sur la supraĵo de la interna mondo ol sur la ekstera. Li klarigis al mi unufoje la tuton, sed mi neniam tre brile komprenis tiaĵojn, do mi forgesis la plejmulton. Laŭ mia memoro, la diferencon kaŭzas iugrade la kontraŭaltiro de tiu parto de la terkrusto, kiu situas tuj super la loko sur Pelucidaro, pri kiu temas. Nu, ĉu klarigite ĉu ne klarigite, ĉiam ŝajnis al mi, ke en Pelucidaro mi moviĝas pli rapide kaj pli lertmove ol sur la ekstera surfaco—oni paŝis tie kun ia aereca leĝero, kiu estis tre agrabla, kaj oni sentis ian malligitecon de sia korpo kompareblan nur kun tio, kion oni foje spertas en sonĝoj.

Kaj ĉi-foje, transirante la florumitan ebenaĵon de Futra, mi ŝajnis flugi, kvankam kiugrade atribui tion al sugestio devenanta de Perry kaj kiugrade al la realo, mi ne scias. Ju pli mi pensis pri Perry, des malpli mi ĝuis mian ĵus akiritan liberecon. Por mi ne povis esti libereco en Pelucidaro, se ne ankaŭ la maljunulo havis ĝin, kaj nur la espero iel trovi rimedon por liberigi lin, detenis min de reiro al Futra.

Ĝuste kiumaniere helpi al Perry, tion mi apenaŭ kapablis imagi, sed mi esperis, ke iuj hazarde bonaj cirkonstancoj solvos la problemon por mi. Evidente, tamen, nur miraklo povus helpi al mi, ĉar kian prodaĵon mi, nuda kaj nearmita, plenumu en tiu stranga mondo? Mi eĉ dubis, ĉu mi povos trovi la vojon al Futra post la alveno al loko, de kie mi ne plu povos vidi la ebenaĵon, kaj eĉ se tio eblus, kian helpon mi donu al Perry, vaginte plejeble grandan distancon?

La situacio aspektis des pli senespera, ju pli mi ekzamenis ĝin, sed kun senceda persisto mi daŭrigis la vojon al la antaŭmontetoj. Malantaŭ mi aperis neniun signon pri postsekvo kaj antaŭ mi mi vidis neniun vivaĵon. Mi moviĝis kvazaŭ tra mortinta kaj forgesita mondo.

Mi tute ne scias, kompeneble, kiom da tempo mi bezonis por atingi la randon de la ebenaĵo, sed finfine mi envagis la montetojn, tra kiuj mi laŭiris belan kanjoneton supren al la montoj. Flanke de mi petolis ride murmuranta roĵo, brue hastanta al la silenta maro. En ĝiaj plej kvietaj malrapidejoj mi ekvidis multajn fiŝetojn, kiuj pezis laŭ mia takso kvar aŭ kvin funtojn^[15]. Laŭ la aspekto, kvankam ne laŭ grandeco kaj koloro, ili similis al la balenoj de niaj propraj maroj. Gvatante ilian naĝan kaprioladon, mi eltrovis ne nur, ke ili mamnutras siajn idojn, sed ankaŭ, ke ili fojfoje aliras la akvosupraĵon kaj por spiri kaj por manĝi iujn herbojn kaj iun kuriozan skarlatan likenon, kiu kreskis sur la rokoj tuj super la akvonivelo.

Tiu lasta kutimo donis al mi la okazon, kiun mi avidis—kapti unu tian plantomanĝantan cetacon, kiel Perry nomis ilin, kaj prepari tiel bonan manĝon kiel oni povas el nekuirita varmsanga fiŝo; sed intertempe mi kutimiĝis nutri min per manĝaĵo en ties natura stato, ĉe kio mi tamen obstinis ellasi la okulojn kaj intestojn, kio siatempe tre amuzis Gak, al kiu mi ĉiam donacis tiujn frandaĵojn.

Kaŭrante borde de la roĵo, mi atendis, ĝis unu tia eteta purpura baleno elmergiĝis por manĝeti je la longaj herboj pendantaj super la akvo, kaj tiam, kiel predobesto, kiu la homo efektive estas, mi ekkaptis per unu salto mian viktimon, je kiu mi ekkvietigis mian malsaton, dum ĝi ankoraŭ vivplene tordiĝis por fuĝi.

Poste, mi trinkis el la kristala akvo, kaj, lavinte la manojn kaj vizaĝon, mi fuĝis plu. Super la fonto de la roĵo mi devis grimpi tra kruda tereno ĝis la pinto de longa montokresto. Antaŭ tio, mi jam sekvis krutan deklivon ĝis la bordo de serena interna maro, sur kies trankvila supraĵo sternaĝis pluraj belaj insuloj.

La pejzaĝo estis pli ol ĉarma, kaj, vidante nek beston nek homon, kiu povus minaci mian nove gajnitan liberecon, mi glitis de sur la krutaĵo, kaj duone glitante, duone falante, mi faligis min en la ravan valon, kies nura aspekto ŝajnis promesi azilejon de paco kaj sekureco.

Sur la milde dekliva plaĝo, sur kiu mi migris, kuŝis dissemite multaj drolofformaj, koloraj konkoj, el kiu kelkaj estis vakaj, dum abundo da aliaj ankoraŭ enhavis moluskojn tiel variajn kiel ĉiujn, kiuj iam pasigis sian inertan vivon ĉe la senbrujaj bordoj de la pramaroj de la ekstera terkrusto. Dum mi marŝis, mi ne povis ne kompari min kun la unua viro de tiu alia mondo, ĉar tiel absoluta estis la soleco, kiu ĉirkaŭis min, kaj tiel praepokaj kaj netuŝitaj estis la virgaj mirindaĵoj kaj belaĵoj de la adoleska naturo. Mi min sentis dua Adamo, migranta

solece tra infanaĝa mondo, serĉante mian Evan, kaj dum mi tion pensis, ŝvebis en mia imago la ravaj konturoj de ŝia perfekta vizaĝo kun abundo da belegaj, nigraj haroj super ĝi.

Dum mi marŝis, miaj okuloj rigardis suben sur la plaĝon, tiel ke mi jam tre proksimis, kiam mi ekvidis la aferon, kiu frakasis mian belan revon pri soleco, sekureco, sereno kaj praepoka memsufiĉo. Temis pri elkavigita arbotrunko tiritita sur la sablon, en kies fundo kuŝis kruda remilo.

Mi ankoraŭ troviĝis en stato de forta ŝoko je la konsciiĝo pri sendube ebla nova danĝero, kiam mi aŭdis klaketadon de lozaj ŝtonoj el la direkto de la krutaĵo, kaj, turninte miajn okulojn, mi vidis la produktinton de la bruoj, grandan kuprokoloran viron, kiu rapide alkuris min.

Lia rapidego estis per si mem sufiĉe minaca, tiel, ke tute ne necesis vidi la aldonajn pruvojn: la lancon en lia mano kaj la koleron en lia vizaĝo. Eĉ sen ili, mi konsciis pri mia endanĝerigita situacio, sed kien fuĝi—tio estis la multepeza problemo.

Tiu ulo tiel fulmrapidis, ke ŝajnis neeble forkuri de li sur la plaĝo. Restis do nur unu alia ebleco—la rustika kanoto—kaj en hasto egala al lia mi puŝis ĝin en la maron, kaj kiam ĝi ekfloris, mi donis al ĝi lastan ŝovon kaj enpaŝis ĝin ĉe la pinto.

La posedanto de la primitiva boato voĉigis krion de furiozo, kaj unu momenton poste lia ŝtonpinta lanco skrapis mian ŝultron kaj enprofundiĝis en la lignon de la pirogo. Mi ekkaptis la remilon kaj en febra hasto urĝis la pezmovan, ŝanceliĝantan boateton sur la supraĵon de la maro.

Unu transŝultra rigardo evidentigis al mi, ke la kuprulo jam plonĝis en la akvon kaj rapide postnaĝis en persekuto. Liaj fortaj naĝtiroj minacis postnelonge alvenigi lin, ĉar mi faris nur testudan progreson en tiu nekonata boato, kiu ekveturis en ĉiu direkto, krom en la de mi celita, pro kio mi disipis duonon de mia energio, returnante ĝian grandan prupon al la ĝusta veturdirekto.

Mi veturis jam proksimume cent jardojn, kiam evidentiĝis, ke la postĉasanto kaptos la randon de la pirogo post kelkaj naĝtiroj. En furioza malespero mi ekluktis kontraŭ tiu prototipo de ĉiuj remiloj, urĝe penante eskapi, sed ĉiam ankoraŭ proksimiĝis la kupra giganto.

Jam li etendis manon al la pirogo, kiam mi vidis mincan kaj sinuan korpon sagi el la subaj profundaĵoj. Ankaŭ la viro vidis ĝin, kaj la mieno de hororo, kiu ekregis lian vizaĝon, donis al mi certecon, ke mi ne plu devos timi lin, ĉar lia vizaĝesprimo montris timon pri certa morto.

Poste, lin ĉirkaŭvolvis la ŝlimaj faldegoj de hida monstro el la praprofundo—giganta marserpentego kun elstarantaj dentegoj kaj elpafiĝema dupinta lango, kun ostecaj protuberancoj sur la kapo kaj nazo, kiuj estis fortikaj kornetoj.

Rigardante tiun lukton je vivo aŭ morto, mia rigardo trafis la okulojn de la kondamito, kaj mi preskaŭ certis percepti en ili esprimon de malespera petego. Ĉu jes ĉu ne, min subite trainundis profunda kompato al la malfeliĉulo. Li ja estis mia homfrato, kaj la fakto, ke li kun plezuro estus mortiginta min, se min kaptinta, forvaporiĝis el mia kapo, fronte al lia ekstrema minacateco.

Nekonscie, mi jam ĉesis remi, kiam la serpento ŝvebis supren por ataki mian persekutanton, do la pirogo ankoraŭ floris apud ili ambaŭ. La monstro ŝajnis nur ludi kun la viktimo, antaŭ ol malfermi siajn timindajn makzelojn kaj ekkapti lin kaj treni lin al sia domicilio en la obskura profundo por lin manĝi. La granda serpenta korpo volviĝis kaj malvolviĝis ĉirkaŭ sia predo. La malignaj plenapertaj makzeloj klakfermiĝis antaŭ la vizaĝo de la viktimo. La dupinta lango fulmis sur la kupran haŭton kaj resaltis.

La grandulo noble batalis por sia vivo, batante per sia ŝtona hakilo kontraŭ la osteca kiraso, kiu kovris tiun forpuŝan korpegon, sed li ne pli vundis ĝin ol per simplaj manaj batoj.

Fine, mi ne plu povis elteni la inertan sidadon, dum tiu maligna rampulo trenis homan fraton al fia morto. Enpikita en la pruo de la pirogo estis la lanco ĵetita kontraŭ mi de tiu, kiun savi mi subite deziris. Per tirego mi elŝiris ĝin, kaj, ekstarante sur la voblema trunko, mi trapuŝis ĝin per la tuta forto de miaj du brakoj inter la algapantaj makzelojn de la hidrofido[16].

Laŭte siblante, la bestego delasis de sia predo kaj atakis min, sed la lanco, kroĉita en ĝia gorĝo, vanigis ĝian provon kapti min, kvankam ĝi preskaŭ renversis la pirogon per sia furioza strebo atingi min.

Subnotoj

[15] 1 funto = 0,453 kg.

[16] prabesto-specio.

8-a ĉapitro

LA TEMPLO DE LA MAHAROJ

La indiĝeno, ŝajne nevundita, rapide grimpis en la pirogon kaj, tenante la lancon kun mi, helpis forteni la furiozan estaĵon. Nun la sango el la vundita rampulo ruĝigis la akvon ĉirkaŭ ni, kaj baldaŭ ĝia debiliĝo en la lukto evidentigis, ke mi morte vundis ĝin. Fine, ĝiaj klopodoj por atingi nin tute ĉesis, kaj post kelkaj konvulsioj ĝi turniĝis sur la dorson, ŝtone morta.

Jen trairis mian kapon la subita ekpripensoj pri la situacio, en kiun mi venigis min. Mia plua sorto estis plene je la dispozicio de la sovaĝulo, kies pirogon mi ŝtelis. Ankoraŭ tenante la lancon, mi rigardis en lian vizaĝon kaj trovis, ke li absorbite pristudas min. Tiel ni staris dum pluraj minutoj, fikstenante ambaŭ la armilon, dum ni gapis per stulta miro unu la alian.

Mi ne scias, kio trakuris lian kapon, sed mian trakuris nur unu demando: kiom da tempo, ĝis la ulo rekomencos la atakon.

Fine li alparolis min, sed en lingvo nekonata al mi. Mi balancis mian kapon por signali nescion de lia lingvo, samtempe alparolante lin per la ĵargonaĉo, kiun la sagotoj uzas por interparoli kun la homaj sklavoj de la maharoj.

Je mia ĝojo, li komprenis min kaj respondis per la sama ĵargono.

“Kial vi tenas mian lancon?” li demandis.

“Por ke vi ne trapiku min per ĝi,” mi respondis.

“Tion mi ne farus,” li diris, “ĉar vi ĵus savis mian vivon,” kaj tion dirinte li forprenis la manojn de la lanco kaj ekkaŭris sur la fundo de la pirogo.

“Kiu vi estas,” li demandis plu, “kaj el kiu lando vi venis?”

Ankaŭ mi sidiĝis, metante la lancon inter nin, kaj provis klarigi, kiel mi venis al

Pelucidaro kaj de kie, sed estis por li tiom neeble kompreni aŭ kredi la kuriozan historion, kiun mi rakontis al li, kiom verŝajne por vi kredi je la ekzisto de la interna mondo.

Ŝajnis al li tute ridinda la imago, ke malproksime sub liaj piedoj ekzistus alia mondo, loĝata de homoj similaj al li mem, kaj ju pli li primeditis tion, des pli laŭte li ridis. Sed tiel ĉiam estis. Tio, kion nia povra, limigita mondsperto neniam inkluzivis, tio kvazaŭ ne povas esti—niaj nesensimaj mensoj povas kompreni nur tion, kio ekzistas laŭ la kondiĉoj, kiujn ni trovas ĉirkaŭ ni, sur la eksteraĵo de sensignifa polvereto, kiu iras sian vojon inter la rokoj de la universo—la buleto de malseka grundo, kiun ni tiel fiere nomas la Mondo.

Mi do rezignis pri tio kaj pridemandis lin pri li mem. Li diris, ke li estas mezopo kaj nomiĝas Ĵa.

“Kiu estas la mezopoj?” mi demandis. “Kie ili vivas?”

Li mirigite rigardis min.

“Mi preskaŭ povas kredi, ke vi estas el alia mondo,” li diris, “ĉar kiu pelucidarano povus estis tiel nescia! La mezopoj vivas sur la maraj insuloj. Mi almenaŭ neniam aŭdis pri mezopo, kiu vivas aliloke, kaj sur la insuloj vivas nur mezopoj, kvankam povus esti tute alie en aliaj, foraj landoj. Mi ne scias. Almenaŭ estas tiel, ke en ĉi tiu maro kaj en la proksimaj, nur homoj de mia gento loĝas sur la insuloj.

“Ni estas fiŝkaptantoj, kvankam ni ankaŭ bone ĉasas. Ni ofte iras al la ĉeftero por serĉi ĉasbestojn, ĉar ili maloftas sur ĉiuj insuloj, krom la grandaj. Ni estas ankaŭ militistoj,” li aldonis fiere. “Eĉ la sagotoj de la maharoj timas nin. Iam, kiam Pelucidaro estis juna, la sagotoj ŝatis kapti kaj sklavigi nin, kiel la aliajn homojn de Pelucidaro. Tiel jam delonge rerakontas patroj al filoj. Sed ni batalis tiel furioze kaj mortigis tiom da maharoj en iliaj propraj urboj, ke ili fine lernis, ke pli prudente estus ne ĝeni nin, kaj ankoraŭ pli poste venis tempo, kiam la maharoj estis tro pigraj eĉ por kapti por si mem fiŝojn, krom por distriĝi, kaj tiam ni fariĝis por ili utilaj provizantoj de bezonaĵoj, kaj sekve estiĝis paco inter la rasoj. Nun ili donas al ni aferojn, kiujn ni ne kapablas produkti, kontraŭ la fiŝoj, kiujn ni kaptas, kaj tiel la maharoj vivas en paco kun la mezopoj.

“La grandeguloj eĉ venis al niaj insuloj. Tie, for de la avidaj rigardoj de iliaj propraj sagotoj, ili praktikas siajn religiajn ritojn en la temploj, kiujn ili kun nia

helpo konstruis tie. Se vi ekloĝos ĉe ni, vi sendube vidos, kiajn ritojn ili havas, vere strangajn, kaj terure malfeliĉajn por la kompatindaj sklavoj, kiujn ili alportas por partopreni en ili.”

Dum Ĵa parolis, mi havis bonegan okazon por pli precize ekzameni lin. Li estis giganta ulo, kiu altis laŭ mia takso ses futojn kaj ses aŭ sep kolorojn, belforma kaj kun kupre ruĝa haŭtkoloro ne multe alia ol tiu de niaj nordamerikaj indianoj, kaj ankaŭ liaj trajtoj similis al iliaj. Li havis aglan nazon, kian oni trovas ĉe multaj anoj de la pli altaj triboj, elstarantajn vangostojn kaj nigrajn harojn kaj okulojn, sed liaj lipoj kaj buŝo estis pli belformaj. Entute, Ĵa estis impona kaj bela, kaj belparola eĉ en la mizera helpa ĵargono, kiun ni devis uzi.

Dum nia interparolo, Ĵa prenis la remilon kaj remis la pirogon per viglaj tiroj antaŭen al granda insulo, kiu situis proksimume duonan mejlon for de la ĉeftero. Lia lerta manovrado de la kruda kaj malfacila boato elvokis mian plej profundan admiron, ĉar nelonge antaŭe mi mem manovris ĝin tiel fiaske.

Ektuŝinte la belan, ebenan plaĝon, Ĵa elsaltis, kaj mi sekvis lin. Kune ni trenis la pirogon sufiĉe for inter la arbustojn, kiuj kreskis post la sablo.

“Necesas kaŝi la pirogojn,” Ĵa klarigis, “ĉar la mezopoj de Luana konstante militas kontraŭ ni kaj ŝtelus ilin, se ili trovas ilin.” Li montris per la kapo al insulo pli fora en la maro, tiel dista, ke ĝi ŝajnis nura nebulaĵo pendanta en la malproksima ĉielo. La suprenira kurbiĝo de la surfaco de Pelucidaro konstante malkaŝis al la okuloj de homo de la ekstera Tero nekredblaĵojn. Vidi la teron kaj akvon kurbiĝi supren en la malproksimo, ĝis ĝi ŝajnis kurbiĝi al la rigardanto, fandiĝante poste kun la fora ĉielo. Percepti la marojn kaj montojn pendi super la kapo postulis tiel plenan inversiĝon de la sentuma kaj rezona fakultoj, ke oni preskaŭ nur gapmiris.

Kaŝinte la pirogon, Ĵa tuj sin ĵetis en la ĝangalon, kaj baldaŭ venis sur stretan, sed klare videblan padon, kiu serpentumis tien kaj reen, kiel la vojoj de ĉiuj primitivaj gentoj, sed kiel mi poste konstatis, unu strangaĵo distingis ilin disde ĉiuj aliaj, kiujn mi iam ajn vidis, ĉu ene de la Tero ĉu sur ĝi.

Ĉiufoje la pado iradis, videbla kaj neta kaj bone eltretita, ĝis abrupte ĝi finiĝis, meze de iu densa ĝangala implikaĵo, kaj tiam Ĵa subite retroiris kelkajn paŝojn malantaŭen, saltis sur arbon, tragrimpis ĝin ĝis la alia flanko, faligis sin sur trunkon de falinta arbo, saltis preter malaltan arbuston kaj alteriĝis sur tute alian

nete videblan padon, kiun li kurtan distancon sekvis, turniĝis kaj retroiris mejlon aŭ malpli ol mejlon, ĝis kie tiu nova pado finiĝis tiel abrupte kaj mistere kiel la antaŭa vojparto. Tie li denove transpasis ĉiufoje ian medion, kie ne eblis lasi spuron, kaj poste resurpaŝis la interrompitan vojon.

Kiam mi ekkomprenis la celecon de tiu miriga itinero, mi ne povis ne admiri la indiĝenan sagacon de tiu antikva pramezopo, kiu elpensis tiun originalan artifikon por malhelpi persekutadon fare de malamikoj kaj por prokrasti aŭ malebligi tute ties provojn sekvi lin en liajn urbojn profunde sub la tero.

Al vi, homoj de la ekstera mondo, tio eble ŝajnas malrapida kaj peniga metodo por vojaĝi tra la ĝangalo, sed se vi estus pelucidarano, vi komprenus, ke la tempo estas nenia faktoro, kie ĝi ne ekzistas. Tiel labirintaj estas la sinuoj de la padoj, kaj tiel diversaj la interpadaj medioj kaj la distancoj, kiujn oni devis retroiri ekde la padofinoj por ilin trovi, ke mezopo ofte iĝas viro antaŭ ol koni eĉ tiujn, kiuj kondukas de lia propra urbo al la maro.

Fakte, tri kvaronoj de la edukiĝo de mezopa junulo konsistas el konatiĝo kun tiuj ĝangalaj vojoj, kaj la relativa rango de iu plenkreskulo dependas plejparte de la nombro de vojoj sur lia propra insulo, kiujn li kapablas sekvi. La inoj nenion lernas pri ili, ĉar de la naskiĝo ĝis la morto ili neniam forlasas la arbaran maldensejon, en kiu situas ilia naskiĝa vilaĝo, krom se ilin edzinigas viro el alia vilaĝo, aŭ se ilin militkaptas malamikoj de ilia tribo.

Migrinte eble kvin mejlojn tra la ĝangalo, ni subite eniris grandan maldensejon, en kies preciza centro staris vilaĝo tiel drolaspekta, kiel oni povus imagi.

Estis forhakitaj la suproj de iuj grandaj arboj dekkvin aŭ dudek futojn super la tero, kaj sur tiuj trunkoj estis konstruitaj sferaj loĝejoj el kototegitaj plektitaj vergoj. Sur la verto de ĉiu el la pilkecaj domoj staris iuspeca skulptaĵo, kiu laŭ la klarigo de Ĵa identigis ĝian loĝanton.

Horizontalaj aperturoj, ses colojn altaj kaj du aŭ tri futojn longaj, servis por enlasi lumon kaj ventumi. La enirejo de domo estis malgranda aperturo en la bazo de arbo, kiu gvidis per kruda ŝtupetaro supren tra la kavigita trunko al la supra ĉambraro. La amplekso de la domoj variis de du ĝis pluraj ĉambroj. La plej granda, kiun mi eniris, havis du etaĝojn kaj ok apartamentojn.

Ĉirkaŭ la vilaĝo, inter ĝi kaj la ĝangalo, estis bele kulturitaj agroj, sur kiuj la mezopoj kultivis la bezonatajn grenojn, fruktojn kaj legomojn. Virinoj kaj

infanoj laboris en tiuj ĝardenoj, kiam ni transiris al la vilaĝo. Vidante Ĵa, ili salutis respekteme, sed min ili tute ne atentis. En ilia mezo kaj ĉe la periferio de la kultivita tereno estis multe da militistoj. Ankaŭ tiuj salutis Ĵa, tuŝante la teron tuj antaŭ si per la pintoj de siaj lancoj.

Ĵa kondukis min al granda domo meze de la vilaĝo—la okĉambra—kaj invitinte min enveni, li donis al mi manĝaĵon kaj trinkaĵon. Tie mi konatiĝis kun lia edzino, belulino kun mamsuĉanta bebo en la brakoj. Ĵa rakontis al ŝi, kiel mi savis al li la vivon, kaj post tio ŝi ĉiam traktis min tre kompleze kaj gastigeme, permesante al mi eĉ teni kaj amuzi la adoratan etulon, kiu, laŭ Ĵa, estis la regonto de la tribo, ĉar Ĵa ŝajnis esti la nuna reganto de la komunumo.

Ni manĝis kaj ripozis, kaj mi dormis, pri kio Ĵa tre amuziĝis, ĉar laŭŝajne li malofte aŭ eĉ neniam tion faris, kaj poste la ruĝulo proponis, ke mi akompanu lin al la templo de la maharoj, kiu staris ne malproksime de la vilaĝo.

“Estas malpermesite viziti ĝin,” li diris, “sed la grandeguloj ne kapablas aŭdi, kaj se ni bone kaŝos nin, ili tute ne scios pri nia ĉeesto. Mi estas homo, kiu malamas ilin kaj ĉiam malamis ilin, sed la aliaj ĉefoj de la insulo kredas, ke estus plej prudente daŭrigi la amikajn rilatojn inter la du rasoj; se ne estus tiel, nenio pli plaĉus al mi ol gvidi miajn militistojn en batalo kontraŭ la fiaj estaĵoj kaj ekstermi ilin—la vivo en Pelucidaro estus pli bona, se ili ne ekzistus.”

Mi tutkore konsentis kun Ĵa, sed ŝajnis al mi malfacila afero ekstermi la regantan rason de Pelucidaro. Tiel interparolinte, ni sekvis la komplikan padon al la templo, kiu troviĝis en malgranda maldensejo borderita de enormaj arboj, similaj al tiuj, kiuj kredeble abundis sur la ekstera krusto dum la karbonio.

Jen ĝi staris: granda templo el tajlita rokaĵo, konstruita en la formo de granda ovalo, kun volba tegmento perforita de kelkaj grandaj aperturoj. Neniu pordo aŭ fenestro videblis sur la flankoj de la konstruaĵo, kaj oni ne bezonis tiajn, krom unu enirejo por la sklavoj, ĉar, kiel Ĵa klarigis, la maharoj enflugis en sian solenejon kaj elflugis el ĝi tra la tegmentaj malfermaĵoj.

“Sed estas enirejo”, Ĵa aldonis, “ĉe la bazo de la konstruaĵo, pri kiu eĉ la maharoj nenion scias. Venu.” Kaj li kondukis min trans la maldensejon al amaso de ŝtonoj kuŝantaj apud la bazo de la muro ĉe unu ekstremo de la konstruaĵo. De ĝi li forŝovis kelkajn grandajn rokojn kaj tiel malkaŝis malgrandan aperturon, kiu kondukis rekte en la konstruaĵon, almenaŭ laŭŝajne, kvankam, enirinte post Ĵa,

mi trovis min unue en tute malluma streta loko.

“Ni troviĝas en la ekstera muro,” diris Ĵa. “Ĝi estas kava. Sekvu min singarde.”

La ruĝulo antaŭeniris kelkajn paŝojn palpserĉe kaj poste komencis supreniri krudan ŝtupetaron similan al tiu, kiu kondukis de la tero al la supraj etaĝoj de lia domo. Ni supreniris eble 40 futojn, kiam la interno de la intermura spaco ekheliĝis, kaj baldaŭ ni atingis malfermaĵon en la interna muro, el kiu ni povis senperturbe rigardi la tutan internon de la templo.

La plej malsuperan plankon okupis enorma baseno de klara akvo, en kiu multaj malignaj maharaj adaĝe naĝis tien kaj reen. Artefaritaj insuloj el granito punktis tiun surogaton de maro, kaj sur pluraj el ili mi vidis gevirojn de mia specio.

“Pro kio homoj estas ĉi tie,” mi demandis.

“Atendu, kaj vi jam vidos,” respondis Ĵa. “Ili ludos ĉefrolon en la ceremonioj, kiuj sekvas post la enveno de la reĝino. Estu danka, ke vi ne troviĝas sur ilia flanko de la muro.”

Li apenaŭ finparolis, kiam aŭdiĝis super ni la plaŭdado de svingiĝantaj flugilegoj, kaj momenton poste, longa procesio de timigaj pelucidaraj rampuloj malrapide kaj majeste flugis tra la granda malfermaĵo en la mezo de la tegmento kaj solene ĉirkaŭŝvebis la randon de la templo.

Kelkaj maharaj iris unuaj, postsekvite de almenaŭ dudek konsternaj pterodaktiloj —tipdaroj, kiel oni nomas ilin en Pelucidaro. Malantaŭ tiuj venis la reĝino, flanke eskortita de aliaj tipdaroj, same kiel okazis, kiam ŝi eniris la amfiteatron de Futra.

Trifoje ili iris ĉirkaŭe en la interno de la ovala salonego, kaj fine ripozigis sin sur la malsekaj kaj malvarmaj rokegoj, kiuj elstaras ĉe la ekstera rando de la baseno. En la centro de unu flanko la plej granda roko estis rezervita por la reĝino, kaj sur ĝi ŝi kuŝigis sin, ĉirkaŭita de sia terura gardistaro.

Preninte siajn lokojn, ĉiuj kuŝis dum kelkaj minutoj kviete. Oni povis imagi, ke ili silente preĝas. La kompatindaj sklavoĵoj sur la insuletoj per larĝaj okuloj gapis la fibestojn. Plimulto de la viroj rekte kaj majeste staris kun la brakoj kunfalditaj sur la brusto, atendente sian pereon; sed la virinoj kaj infanoj sin kroĉis unu al la alia, kaŝiĝante malantaŭ la viroj. Ili estis noblaspekta raso, la kavernohomoj de

Pelucidaro, kaj se niaj prauloj similis al ili, do la homaro de la ekstera mondo ne pliboniĝis, sed degeneris dum la paso de la epokoj. Al ili mankas nur bonaj okazoj. Ni havas bonajn okazojn kaj malmulton alian.

Nun moviĝis la reĝino. Ŝi levis sian malbelan kapon por ĉirkaŭrigardi; poste, ŝi tre malrapide ŝovis sin al la rando de sia trono kaj glitis senbrue en la akvon. Tien kaj reen ŝi naĝis en la longa akvujo, returniĝante ĉe la ekstretoj, kiel oni vidas kaptitajn fokojn fari en siaj basenetoj, turniĝante surdorsen kaj plonĝante suben.

Pli kaj pli proksime al la insuloj ŝi venis, ĝis finfine ŝi restis senmova antaŭ la plej granda, rekte trans la akvo de ŝia trono. Levante sian fian kapon el la akvo, ŝi fiksrigardis per la grandaj, rondaj okuloj la sklavojn. Tiuj estis grasaj kaj belformaj, ĉar oni alportis ilin el fora mahara urbo, kie oni tenis homojn en gregoj, bredis kaj grasigis ilin, kiel ni bredas kaj grasigas brutojn.

La reĝino kroĉis siajn okulojn al graseta junulino. Ŝia viktimo provis forturni sin, kaŝis sian vizaĝon per la manoj kaj genuiĝis malantaŭ iu virino; sed la rampulo, sen palpebrumi, tiel fikse alrigardis, ke mi povus ĵuri, ke ŝia rigardo penetras la virinon tra ŝiaj brakoj, trafante fine ĝis la kerno de ŝia cerbo.

La kapo de la rampulo komencis malrapide balanciĝi, sed la okuloj neniam ĉesis direktiĝi al la timigita virino, kaj jen: la viktimo reagis. Ŝi turnis siajn larĝajn, timplenigitajn okulojn al la mahara reĝino, lante ekstaris kaj poste, kvazaŭ remorkita de iu nevidebla potenco, ŝi moviĝis kiel tranculino rekte al la rampulo, fikssante siajn vitrecajn okulojn al la okuloj de sia predanto.

Al la akvorando ŝi venis, eĉ sen heziti, kaj enpaŝis la malprofundan akvon flanke de la insuleto. Ŝi direktiĝis antaŭen al la maharo, kiu nun lante retroflosis, kvazaŭ ŝi kondukus sian viktimon antaŭen. La akvo altiĝis ĝis la genuoj de la ino, kaj ankoraŭ ŝi pluiris, katenita de tiu okulaĉo. Jam la akvo ĝisiris ŝian talion, poste jam la akselojn. Ŝiaj kompanoj sur la insulo spektis hororiĝantaj, senpovaj malhelpi ŝian pereon, en kiu ili vidis aŭguron de sia propra.

La maharo mergiĝis, ĝis nur la longa beko kaj la okuloj elstariĝis super la akvosupraĵo, kaj la ino flosis antaŭen, ĝis la pinto de tiu maligna beko distancis nur unu-du colojn for de ŝia vizaĝo, dum ŝi fikse gapis plu en la okulojn de la rampulo.

Nun la akvo superiris la buŝon kaj nazon de la junulino—vidiĝis nur ŝiaj okuloj

kaj frunto—kaj tamen ŝi marŝis plu post la retroglitanta maharo. La kapo de la reĝino poiome malvidebliĝis sub la supraĵo, kaj ĝin sekvis la okuloj de la viktimo—nur malrapida ondocirklo disiris al la bordoj por marki la lokon, kie la duopo malaperis.

Dum kelka tempo regis plena silento en la templo. La sklavoj staris rigidaj pro teruro. La maharoj rigardis la supraĵon de la akvo por ekvidi la reaperon de sia reĝino, kaj post iom longa tempo ŝia kapo malrapide elmergiĝis ĉe unu ekstremo de la baseno. La dorson antaŭe, ŝi aliris la supraĵon, same tiel fikse antaŭenrigardante, kiel ŝi faris, trenante la sendefendan junulinon al la morto.

Kaj tiam, mi je mia mirego ekvidis la frunton kaj okulojn de la junulino pograde reaperi el la profundo, sekvitaj de la rigardo de la rampulo, ne alie ol kiam ŝi malaperis sub la akvon. La ino eliris ĉiam plu, ĝis ŝi staris en akvo apenaŭ ĝisiranta ŝiajn genuojn, kaj kvankam ŝi estis subakvigita sufiĉe longe por droni trifoje, nenio indikis, krom ŝiaj gutantaj haroj kaj akvobrilanta korpo, ke ŝi eĉ estis submergita.

Denove kaj denove la reĝino kondukis la junulinon en la profundon, kaj denove el ĝi supren, ĝis la mistera hanto de la eventoj komencis tiel agaci miajn nervojn, ke mi povus mem salti en la basenon por savi la infanon, se mi ne estus teninta firman memregadon.

Unufoje, ili estis multe pli longe subakve ol antaŭe, kaj kiam ili venis al la akvosupraĵo, mi hororiĝis vidi unu el ŝiaj brakoj foresti—tute forronĝita ĉe la ŝultro—sed neniel la kompatindulino signalis, ke ŝi spertas doloron. Nur la hororo en ŝiaj okuloj ŝajnis pli intensa.

La postan fojon, la alia brako estis for, poste la mamoj, poste parto de la vizaĝo—estis repuŝa vidaĵo. La kompatindaj homoj sur la insuloj, atendante sian sorton, provis kovri siajn okulojn per la manoj por forbari la abomenindan vidaĵon, sed jam mi vidis ankaŭ ilin enfali la hipnotan sorĉon de la rampuloj, tiel, ke ili povis nur kaŭri terurigitaj, kun la okuloj gluitaj al la abomenaĵo okazanta antaŭ ili.

Fine, la reĝino troviĝis multe pli longe subakve ol iam antaŭe, kaj kiam ŝi venis supren, ŝi venis sola kaj naĝis dormeme al sia rokego. La momento, kiam ŝi surgrimpis ĝin, ŝajnis signalo al la aliaj maharoj, ke ili eniru la basenon, kaj tiam komenciĝis multe pli grandskala ripetiĝo de la mistera sorĉaĵo, en kiun la reĝino

gvidis sian viktimon.

Nur la virinoj kaj infanoj fariĝis predo de la maharoj—ili estis la plej malfortaj kaj molaj—kaj satmanĝinte je la homa karno, kio signifis por kelkaj manĝi du aŭ tri sklavojn, restis nur ĉirkaŭ dudek plenkreskaj viroj, kaj mi kredis, ke ial oni restigos ilin vivaj, sed tute alie okazis, ĉar kiam la lasta maharo grimpis sur sian rokon, la tipdaroj de la reĝino sagis en la aeron, ĉirkaŭflugis la templan internon unufoje, kaj tiam, siblante kiel vapormotoroj, ili impetis kontraŭ la restintajn sklavojn.

Ĉi-foje ne okazis hipnotado—realiĝis nur simpla, sovaĝa brutaleco de rabobestoj, kiuj ungas, ŝiras kaj glutas sian viandon, sed eĉ tio estis malpli forpuŝa ol la supernatura procedo de la maharoj. Dum la tipdaroj finforglutis la lastajn sklavojn, la maharoj jam dormis sur siaj rokegoj, kaj momenton poste, la grandaj pterodaktiloj reflugis al sia loko flanke de la reĝino, kie ili mem ekdormis.

“Mi kredis, ke la maharoj malofte aŭ neniam dormas,” mi diris al Ĵa.

“Ili faras multon en ĉi tiu templo, kion ili ne faras aliloke,” li respondis. “La maharoj de Futra laŭnidire ne manĝas homan karnon, sed oni alportas milojn da sklavoĵoj ĉi tien, kaj preskaŭ ĉiam troviĝas maharoj por manĝi ilin. Mi supozas, ke ili pro tio ne venigas siajn sagotojn ĉi tien, ĉar ili hontas pro tiu kutimo, pri kiu ili supozigas, ke nur la plej postiĝintaj el iliaj samrasanoj praktikas ĝin. Sed mi vetus mian pirogon kontraŭ rompita remilo, ke ne ekzistas eĉ unu maharo, kiu rifuzas homviandon, kiam ajn ŝi povas akiri ĝin.”

“Kial ili malŝatu manĝi la karnon de homoj,” mi demandis, “se ili efektive rigardas nin kiel malsuperajn bestojn?”

“Ili laŭdire rigardas kun abomeno la manĝantojn de homa karno ne tial, ke ili konsideras nin egaluloj,” respondis Ĵa, “sed nur, ĉar ni estas varmsanguloj. Ili eĉ ne pripensus manĝi dagaĵon, kiu por ni estas delektajo, same kiel mi ne manĝus serpenton. Fakte, malfacilas klarigi, kial ekzistas ĉe ili tiaj inklinoj.”

“Mi volus scii, ĉu ili lasis eĉ unu homon vivanta,” mi scivolis, forte elkliniĝante el la aperturo en la roka muro por pli bone ekzameni la templon. Rekte sub mi, la ondoj plaŭdetis ĝis la bazo de la muro pro breĉo inter la rokoj tiuloke kaj ankaŭ en kelkaj aliaj lokoj ĉirkaŭ la periferio de la templo.

Miaj manoj ripozis sur peceto de granito, kiu konsistigis parton de la muro, kaj mia tuta pezo sur ĝi montriĝis troŝarĝo. Ĝi elrompiĝis, kaj mi impetis antaŭen. Per nenio mi povis savi min, kaj mi plonĝis kapantaŭe en la akvon sub mi.

Bonŝance, la baseno estis profunda tie, kaj mi ne vundiĝis pro la falo, sed dum mi altiĝis al la akvosupraĵo, mia spirito pleniĝis de teruro pro mia situacio, ĉar mi pripensis la abomenindan pereon, kiu atendos min tuj, kiam la okuloj de la rampuloj trafos la estaĵon, kiu perturbis ilian dormon.

Kiel eble plej longe mi restis submergita kaj dume rapide naĝis en la direkto de la insuloj, por ke mi plejeble longe restu viva. Fine, mi devis supreniri por preni aeron, kaj kiam mi ĵetis simplenan rigardon en la direkto de la maharoj kaj la tipdaroj, mi preskaŭ senkonsciiĝis, vidante, ke ne restis eĉ unusola sur la rokoj, kie mi ilin laste vidis, kaj kiam mi perokule travagis la templon, mi ne povis percepti iun ajn el ili en ĝia interno.

Mi estis dum momento konsternita pri la aferstato, ĝis kiam mi rememoris, ke la maharoj, ĉar surdaj, ne povis vekiĝi pro la bruo farita de mia korpo, kiam ĝi trafis la akvon, kaj krome, ke pro la foresto de la tempo en Pelucidaro ne eblas scii, kiel longe mi estis subakve. Estus malfacile kalkuli ĝin laŭ surteraj kutimoj kaj normoj—la tempopason—kaj ekkalkulinte, mi komprenis, ke mi estis subakve eble sekundon, eble monaton, aŭ eble eĉ tute ne. Oni ne povas eĉ koncepti la eksternormalajn kontraŭdirojn kaj neblaĵojn, kiuj estiĝas, kiam mankas ĉiu el la metodoj de tempomezurado, kiujn ni havas surtere.

Tuj mi volis gratuli min okaze de la miraklo, kiu donis al mi portempan saviĝon, kiam la memoro pri la hipnotaj potencoj de la maharoj plenigis min je anticipa timo, ke ili eble en tiu momento aplikas sian misteran arton kontraŭ mi, kun la efiko, ke mi nur imagas min sola en la templo. Je tiu penso, frida ŝvito ekfluis el ĉiuj poroj de mia haŭto, kaj dum mi grimpis el la akvo sur unu el la insuletojn, mi tremis kiel folio—vi ne povas imagi la hororegon, kiun eĉ la nura penso pri la fiaj maharoj de Pelucidaro estigas en la spirito de homo—kaj aldone al tio senti sin stirata de tiuj aĉaj, ŝlimaj kaj naŭzaj estaĵoj, kiuj pretas treni homon sub la akvon por manĝi lin! Terurveka afero.

Sed ili ne venis, kaj fine mi konkludis, ke mi estas vere sola en la templo. Kiel longe mi restos sola: jen la sekvanta demando, kiu trafis en mian kapon, dum mi furioze ĉirkaŭnaĝis denove, serĉante manieron fuĝi.

Plurfoje mi vokis al Ĵa, sed laŭŝajne li foriris post mia falo en la basenon, ĉar miaj krioj ne elvokis respondon. Sendube li sentis sin tiel certa pri mia mortonteco, kiam li vidis min fali el nia kaŝejo, kiel mi tiam sentis, kaj timante mem esti eltrovita, rapidis el la templo al sia vilaĝo.

Mi sciis, ke la konstruaĵo devas havi enirejon flanke de la tegmentaj enirejoj, ĉar ne ŝajnis kredeble, ke la miloj da sklavoj, kiujn oni venigadis, por ke la maharoj satiĝu je la de ili avidata homviando, estus altransportitaj tra la aero, do mi pluserĉis, ĝis fine min rekompencis la malkovro de kelkaj lozaj granitaj blokoj en la masonaĵo je unu flanko de la templo.

Malgranda peno montriĝis sufiĉa por deloki sufiĉe da ŝtonoj, por ke mi trarompu vojon en la maldensejon, kaj momenton poste mi jam tragalopis la interspacon al la densa ĝangalo post ĝi.

Tie mi falis, anhelante kaj tremante, sur la herbtapiŝon sub la gigantaj arboj, ĉar mi sentis min kvazaŭ fuĝinta el la ridetanta faŭko de la morto kaj el la profundo de mia propra tombo. Kia ajn danĝero kaŝiĝos en tiu insula ĝangalo, neniuj povos esti tiel timinda kiel tiuj, de kiuj mi ĵus forkuris. Mi sciis, ke mi povos renkonti la morton kun kuraĝo, se ĝi nur venos en la formo de iu konata besto aŭ de homo —kio ajn, sed nur ne la turpaj kaj misteraj maharoj.

9-a ĉapitro

LA VIZAĜO DE LA MORTO

Ŝajne mi ekdormis pro lacego. Post la vekiĝo mi estis tre malsata, kaj okupinte min dum iom da tempo per fruktoserĉado, mi ekmarŝis tra la ĝangalo por trovi la plaĝon. Mi sciis, ke la insulo estas sufiĉe malgranda, por ke mi facile trovu la maron, se mi nur irus rektlinie, sed ĝuste tio estis la problemo, ke mankis rimedo konstati la direkton kaj iradi laŭ ĝi. La suno ja estis ĉiam super mia kapo, kaj la arboj estis tiel densaj, ke mi ne povis vidi iun ajn malproksiman objekton, kiu gvidus min laŭ rekta linio.

Sed kiel okazis, mi ŝajne marŝis longan distancon, ĉar mi manĝis kvarfoje kaj dormis dufoje antaŭ ol atingi la maron, sed post la finfina alveno mia plezuro je ĝia ekvido ankoraŭ pliiĝis pro la hazarda eltrovo de pirogo kaŝita inter la arbustoj, kiujn mi trastumblis tuj antaŭ ol veni sur la plaĝon.

Mi povas certigi, ke ne necesis longa tempo por treni la rustikan boaton ĝis la akvo kaj ŝovi ĝin for de la akvobordo. Mia travivaĵo kun Ĵa instruis min, ke se mi ŝtelu la pirogon de aliulo, mi faru tion rapide kaj mi hastu meti distancon inter mi mem kaj ĝia posedanto.

Estis evidente, ke mi eliris sur la alia flanko de la insulo, tiu flanko, ĉe kiu Ĵa kaj mi eniris ĝin, ĉar mi tute ne povis vidi la ĉefteron. Longe mi ĉirkaŭremis la bordon, kvankam je konvena distanco de ĝi, ĝis kiam mi ekvidis la ĉefteron en la malproksimo. Vidinte ĝin, mi rapidis direkti mian vojon al ĝi, ĉar delonge mi estis rezoluta, ke mi reiros al Futra kaj refoje malliberiĝos por esti denove kun Perry kaj Gak la Vila.

Mi opiniis min ŝtipkapulo, ke mi siatempe entreprenis fuĝi sola, des pli, ĉar ni jam havis bone trapensitajn planojn por fuĝi kune al la libereco. Mi sciis, kompreneble, pri la granda malverŝajno de sukceso en nia projektita entreprenaĵo, sed mi sciis, ke mi neniam povos ekŝati la liberecon sen Perry, tiel longe kiel li vivos, kaj mi sciiĝis, ke la ebleco retrovi lin estas malpli ol eta.

Se Perry mortus, mi volonte luktus per mia forto kaj intelekto kontraŭ la sovaĝa pramondo, en kiu mi troviĝis. Mi povus loĝi kiel ermito en iu ŝtonplena kaverno, ĝis mi trovus manieron por ekipi min per la krudaj armiloj de la ŝtonepoko, kaj poste mi komencus la serĉon je ŝi, kies imago nun konstante akompanis min dum la maldormaj horoj, kaj kiu estis la ĉefa kaj amata temo de miaj sonĝoj.

Sed se mi ne malpravus, Perry vivis ankoraŭ, kaj estis mia devo kaj volo denove esti kun li, por ke ni kune alfrontu la danĝerojn kaj sortoturniĝojn de la kurioza mondo, kiun ni eltrovis. Kaj ankaŭ Gak, tiu granda, hirta viro ekokupis lokon en la koro de ni ambaŭ. Eble kruda, ankaŭ brutala, se juĝi lin tro strikte laŭ la normoj de la kaduka civilizo de la dudeka jarcento, sed tamen li estis nobla, digna, kavalireca kaj aminda.

La hazardo portis min al ĝuste tiu plaĝo, sur kiu mi trovis la pirogon de Ĵa, kaj post nelonge mi suprengrimpis la krutan bordon, retrospurante mian vojon el la ebenaĵo de Futra. Sed mi ekhavis problemon, kiam mi eniris la kanjonon trans la altaĵo, ĉar tie mi trovis, ke kelkaj padoj interkruciĝas tie, kie mi transiris la akvofluan dislimon, kaj mi tute ne kapablis rememori, kiun mi uzis.

Mi povis nur elekti hazarde, do mi ekiris laŭ tiu vojo, kiu ŝajnis plej facile irebla, kaj tiumaniere mi faris la saman eraron, kiun multaj el ni faras, elektante vojon, kiun sekvi en nia vivo, kaj denove mi lernis, ke ne ĉiam plej konvenas preni la vojon de malplej granda rezisto.

Post ok manĝoj kaj du dormoj, mi konvinkiĝis, ke mi estas sur la malĝusta vojo, ĉar inter Futra kaj la interna maro mi la antaŭan fojon tute ne dormis kaj nur unufoje manĝis. Retropaŝi al la supro de la akvodislimo kaj esplori alian kanjonon ŝajnis la sola solvo de mia problemo, sed subita larĝiĝo kaj ebeniĝo de la kanjono tuj antaŭ mi ekaŭguris, ke ĝi baldaŭ elkondukos sur ebenan terenon, kaj forte tirite de la esplorista urĝo, mi decidis antaŭeniri kurtan distancon, antaŭ ol retroiri.

La posta turniĝo de la kanjono kondukis min al ĝia elirejo, kaj antaŭ mi mi vidis mallarĝan ebenaĵon, kiu etendiĝis ĝis la oceano. La dekstra flanko de la kanjono etendiĝis ĝis la akvorando, kaj la valo kuŝis maldekstre, poiome deklivanta ĝis la maro, kie ĝi estigis larĝan, ebenan plaĝon.

Aroj de strangaj arboj punktis la pejzaĝon tie kaj aliloke, preskaŭ ĝis la akvorando, kaj grandaj arboj kaj filikoj kreskis inter ili. Juĝante laŭ la plantoj, mi

konvinkiĝis, ke la tereno inter la oceano kaj la antaŭmontetoj estas marĉa, kvankam tuj antaŭ mi ĝi ŝajnis seka ĝis la sabla strio, sur kiu la maro ondis antaŭen kaj reen.

La scivolemo motivis min marŝi al la plaĝo, ĉar la vidaĵo estis tre bela. Dum mi preteriris la densan kaj implikitan vegetaĵaron de la marĉo, mi opiniis vidi moviĝeton inter la filikoj maldekstre, sed kvankam mi haltis momenton por rigardi, ĝi ne ripetiĝis, kaj se vere io kaŝiĝis tie, miaj okuloj ne povis trapenetri la densan vegetaĵaron por rekoni ĝin.

Poste mi staris sur la plaĝo kaj spektis la ampleksan kaj solecigantan maron, sur kies neallogan surfacon ankoraŭ neniu homo aŭdacis elnavigi por eltrovi la ekzotikajn kaj misterajn landojn, kiuj kuŝis transe, aŭ la mirindaĵojn, riĉaĵojn kaj aventurojn, kiujn ĝiaj nevideblaj insuloj tenis. Kiaj sovaĝaj popoloj, kiaj ferocaj kaj fortaj bestoj en ĝuste tiu momento rigardis la albatadon de ĝiaj ondoj al ĝia transa bordo! Ĝis kie ĝi etendiĝis? Perry diris al mi, ke la maroj de Pelucidaro estas malgrandaj, kompare kun tiuj de la ekstera mondo, sed tamen ĉi tiu granda oceano eble etendiĝis milojn da mejloj. Dum nekalkuleblaj epokoj ĝi jam kirliĝis laŭlonge de siaj sennombraj mejloj da marbordo, restante ĝis hodiaŭ, malgraŭ ĉio, tute nekonata, escepte de la strio videbla de sur ĝiaj plaĝoj.

La fascino de spekulativado iĝis en mi tre forta. Estis, kvazaŭ mi estus retransportita al la praepoko de nia propra ekstera mondo, por rigardi ĝiajn landojn kaj marojn, tutajn epokojn antaŭ ol homoj moviĝadis sur ili. Jen nova mondo, tute virga. Ĝi alvokis min esplori. Mi revadis pri la ekscito kaj aventuro atendonta min, se nur Perry kaj mi povos fuĝi de la maharoj, kiam ia cirkonstanco, verŝajne mallaŭta sono, tiris mian atenton al mia dorsa flanko.

Dum mi turniĝis, abstraktaj meditoj pri romantiko, aventuroj kaj eltrovoj forflugis vid-al-vide al la konkreta enkorpiĝo de ĉiuj tri, kiun mi vidis ataki.

Granda, ŝlima amfibio ĝi estis, kun bufeca korpo kaj la fortaj makzeloj de aligato. Ĝia enorma korpo ŝajnis pezi tunojn, sed tamen ĝi moviĝis rapide kaj senbrue miadirekte. Ĉe unu flanko estis la krutaĵo, kiu etendiĝis de la kanjono en la maron, ĉe la alia flanko la timinda marĉo, el kiu la bestego ŝteliris al mi, malantaŭe kuŝis la granda, nemapita maro, kaj antaŭ mi, en la mezo de la mallarĝa vojo, kiu kondukus al rifuĝo, staris tiu granda monto de terura kaj minacanta karno.

Unusola ekrigardo al la kreitaĵo sufiĉis por certigi min, ke mi staras antaŭ unu el tiuj delonge malaperintaj, praepokaj bestoj, kies fosiliaj postrestaĵoj troveblas en la krusto de la ekstera mondo, kiuj devenas eĉ jam el la triasa epoko, granda labirintodono^[17], kaj aliflanke mi, nearmita, kaj escepte de zontuko, tiel nuda kiel ĉe mia naskiĝo. Mi povis imagi, kion sentis mia unua praulo en tiu fora, fruepoka tago, kiam li renkontis unuafoje la teruran antaŭulon de la besto, kiu puŝis min en senlirejon apud la maltrankvila, mistera maro.

Sendube li forfuĝis, ĉar alie mi estus nek en Pelucidaro nek aliloke, kaj tiumomente mi deziris, ke li estu dotinta min, inter la diversaj atributoj, kiujn mi supozeble heredis de li, per la specifa apliko de la memprotekta instinkto, kiu savis lin de la sorto, kiu ŝajnis trafonta min en tiu tago.

Rifuĝi en la marĉon aŭ en la oceanon estus kiel salti en kuŝejon de leonoj por savi sin de unu leono ekster ĝi. Kaj la maro kaj la marĉo estis sendube plenaj de tiuj muskolozaj, karnomanĝantaj amfibioj, kaj se ne, tiu, kiu minacis min, povus ĉasi min egale facile en la maron aŭ en la marĉon.

Ŝajnis, ke mi povos fari nenion, krom stari inerte kaj atendi la morton. Mi pensis pri Perry—kaj kiel li scivolemos pri mia sorto. Mi pensis pri miaj amikoj de la ekstera mondo kaj kiel ili pluvivados en kompleta nescio pri la eksternorma kaj teruraĉa sorto, kiu trafis min, ne divenante la alimondan medion, en kiu okazis la timinda agonio de mia estingiĝo. Pensinte tion, mi ekkomprenis, kiel sensignifa por la vivo kaj feliĉo de la mondo estas la ekzisto de iu ajn unuopulo. Oni povas pereji sen eĉ momenta averto, kaj dum unu kurta tago la amikoj de la mortinto preparolos lin per dampita voĉo. La postan matenon, dum la unua vermo laboradas por kontroli la konstruon de la ĉerko, la amikoj ekludas je golfo, suferante pli grandan ĉagrenon pro mistrafita pilko, ol ili sentis afliktiĝon pro la tro frua—el la konjektebla vidpunkto de la mortinto—pereo.

La labirintodono nun proksimiĝis pli malrapide. Ĝi ŝajnis kompreni, ke fuĝi al mi ne eblis, kaj mi pretus ĵuri, ke ĝia granda, dentegoza makzelparo ridetis, kiam ĝi plezure pritaksis mian situacion, aŭ ĉu eble ĝi ridetis pro la atendata sukoplana frandaĵo, kiu baldaŭ pulpiĝos inter tiuj elstarantaj dentoj.

Li estis proksimume kvindek futojn for, kiam mi aŭdis voĉon voki min el la direkto de la krutaĵo maldekstre de mi. Mi rigardis kaj preskaŭ ĝojkriis pro la vidaĵo, kiu trafis miajn okulojn, ĉar tie staris Ĵa kaj verve mangestadis, urĝante min forkuri al la bazo de la krutaĵo.

Mi tute ne kredis, ke mi kapablos eskapi la monstron, kiu elektis min por sia matenmanĝo, sed mi almenaŭ ne mortus sola. Homaj okuloj rigardus mian finon. Ne tre trankviliga afero, mi supozas, sed mi ĉerpis iomete da komforto el la pripenso pri tio.

Kuri ŝajnis ridinde, precipe al tiu apika kaj ne surgrimpebla krutaĵo, sed mi tamen kuris, kaj dum tio mi vidis Ĵa grimpi malsupren sur la apika rokaro, tiel lerte kiel simio, tenante sin je malgrandaj elstaraĵoj kaj je la fortikaj grimpoplantoj tie kaj tie enradikiĝintaj.

La labirintodono evidente pensis, ke Ĵa alvenas por duoblige lian porcion de homa viando, do li ne rapidis ĉasi min al la krutaĵo, por ne fortimigi la alian frandaĵon. Anstataŭ tio, li nur posttrotetis min.

Proksimiĝante al la bazo de la krutaĵo, mi ekvidis, kion Ĵa intencas, sed mi dubis, ke tio finiĝos sukcese. Li jam alvenis ĝis dudekfuta alteco super la bazo, kaj tie, tenante sin per unu mano je roka eĝo kaj malfirme apogante la piedojn sur kelkaj arbustetoj, kiuj elkreskis el la solida roko, li suben mallevis la pinton de sia longa lanco, ĝis ĝi pendis ses futojn super la tero.

Suprengrimpi per tiu maldika stango sen fortiri Ĵa, kio ja rezultigus por ni ambaŭ tiun pereon, de kiu la kuprulo provis ĝuste savi min—tio ŝajnis neeblaĵo, kaj proksimiĝante al la lanco, mi diris al li tion, kaj ke mi ne volos riski lian vivon per la provo savi mian.

Sed li insiste asertis scii, kion li faras, kaj ke li mem ne estas en danĝero.

“Vi estas en danĝero, ĉar se vi ne moviĝos multe pli rapide ol nun, la *sitiko* atingos vin kaj retiros vin, antaŭ ol vi eĉ je duono suprengrimpos la lancon—se ĝi baŭmos, ĝi povos tre facile atingi vin ie ajn sub mia pozicio.”

Nu, mi opiniis, ke Ĵa devas scii, kion li faras, do mi ekkaptis la lancon kaj ekgrimpiis al la ruĝulo per plejeblo rapido, kiu tamen malsimilis al tiu de miaj simiaj prauloj. Mi supozas, ke la debilcerba sitiko—kiel Ĵa nomis ĝin—subite ekkomprenis nian intencon, kaj ke ĝi perdos sian manĝon, anstataŭ havi la esperatan duoblan porcion.

Kiam ĝi vidis min suprengrimpi per la lanco, ĝi ellasis siblon, kiu preskaŭ tremigis la teron, kaj per mirinda rapido kuratakis min. Nun mi atingis la supron de la lanco, aŭ pli ĝuste, preskaŭ atingis. Post pliaj ses coloj mi povus ekkapti la

manon de Ĵa, sed tiam mi sentis subitan tiregon de sube, kaj per timplena okulumo malsupren mi ekvidis la fortajn makzelojn de la monstro fermiĝi ĉirkaŭ la akra pinto de la armilo.

Mi haste penegis atingi la manon de Ĵa, kaj la sitiko faris fortegan tiron, kiu preskaŭ deskuis Ĵa de sur lia malfirma alteno sur la roka eĝo. La lanco glitis el liaj fingroj, kaj ankoraŭ tenante ĝin, mi plonĝis la piedojn antaŭe al mia mortigonto.

Ŝajnas, ke ĝuste kiam ĝi sentis la lancon gliti el la fingroj de Ĵa, la bestego apertis siajn makzelojn por kapti min, ĉar kiam mia falo ĉesis, mi ankoraŭ tenis min je la malakra ekstremo de la armilo, kaj la pinto ankoraŭ restis en ĝia buŝo. Montriĝis, ke la akra pinto tute trapikis ĝian malsupran makzelon.

Pro la doloro ĝi klakfermis sian buŝon. Mi falis sur ĝian nazon, perdis mian altenon al la lanco, ruliĝis laŭlonge de ĝiaj vizaĝo kaj kapo, trans ĝia nuko sur ĝian larĝan dorson, kaj de tie mi falis teren.

Momenton post la alteriĝo mi restariĝis kaj frenezece kuris al la pado, sur kiu mi eniris tiun malbenitan valon. Unu transŝultra rigardo vidigis al mi la sitikon frapadi la lancon pikitan tra ĝia malsupra makzelo, kaj ĝi estis tiel okupita per tio, ke mi jam gajnis rifuĝon sur la supro de la krutaĵo, kiam ĝi denove pretis postĉasi.

Ne povante percepti min perokule en la valo, ĝi siblante galopis en la altkreskan plantaron de la marĉo, kaj tie mi laste vidis ĝin.

Subnoto

[17] prabesto-specio.

10-a ĉapitro

EN FUTRA DENOVE

Mi rapidis al la rando de la krutaĵo super Ĵa kaj helpis lin atingi firman piedotenon. Li rifuzis aŭskulti, kiam mi dankesprimis pro lia preskaŭ abortinta provo savi min.

“Mi rezignis pri vi kaj taksis vin perdita, kiam vi falis en la maharan templon,” li diris, “ĉar eĉ mi ne povis savi vin el iliaj manoj. Do vi povas imagi mian miron, kiam mi vidis pirogon tiritan sur la plaĝon de la ĉeftero kaj trovis tie ĝuste vian piedspuron sur la sablo.

“Mi tuj ekiris serĉi vin, sciante, ke vi estas tute senarmila kaj sendefenda kontraŭ la multaj embuskantaj danĝeroj sur la ĉeftero, ne nur sovaĝaj bestoj kaj rampuloj, sed ankaŭ homoj. Mi tute facile postspuris vin ĝis ĉi tie. Mi alvenis tre ĝustatempe.”

“Sed kial vi faris ĝin?”, mi demandis, konsternita pro tiu amika ago fare de viro el alia mondo kaj de malsama raso kaj koloro.

“Vi savis mian vivon,” li respondis, “kaj de tiam estas mia devo protekti kaj amike trakti vin. Mi ne estus vera mezopo, se mi evitus mian evidentan devon—en ĉi tiu okazo estis plezuro, ĉar mi ŝatas vin. Eble vi venu vivi kun mi. Vi iĝos membro de mia tribo. Ĉe ni la ĉasaĵo kaj fiŝoj plej abundas, kaj vi povos elekti virinon el la plej belaj de Pelucidaro. Ĉu vi venos?”

Tiam mi rakontis al li pri Perry kaj Dian la Bela, kaj ke mia unua devo estas al ili. Nur poste mi revenos viziti lin—se nur eblos trovi lian insulon.

“Estas facile, amiko,” li diris. “Vi nur iru al la bazo de la plej alta monto en la Montoj de la Nuboj. La rivero tie fluas al la Lural-az. Rekte trans la buŝo de la rivero vi vidos tri grandajn insulojn, pro malproksimo apenaŭ distingeblajn, kaj la plej maldekstra, kiam oni rigardas de la buŝo de la rivero, estas Anorok, kie mi

regas la tribon Anorok.”

“Sed kiel mi trovos la Montojn de la Nuboj?”, mi demandis.

“Laŭdire ili estas videblaj el duono de Pelucidaro,” li respondis.

“Kiel granda estas Pelucidaro?”, mi demandis, scivola, kian teorion tiuj primitivuloj havas pri la formo kaj konsisto de sia mondo.

“La maharoj asertas ĝin sfera, kiel la interno de tola-ŝelo”, li klarigis, “sed tio estas ridinda, ĉar se vera, ni refalus, se ni vojaĝus en iu ajn direkto, kaj la tuta akvo de Pelucidaro fluus al unu loko kaj dronigus nin. Ne, Pelucidaro estas tute plata kaj etendiĝas neniun-scias-ĝis-kie ĉiudirekte. Ĉe la rando, kiel raportis kaj pludiris al mi miaj prapatroj, estas granda muro, kiu retenas la Teron kaj akvon de forfalo en la brulantan maron, sur kiu flosas Pelucidaro; sed mi neniam iris tiel malproksimen de Anorok por propraokule vidi tiun muron. Tamen, estas tute racie kredi tion vera, dum enestas neniam da racio en la stulta kredo de la maharoj. Laŭ ili, pelucidaranoj sur la kontraŭa flanko ĉiam troviĝas inversigitaj!”, kaj Ĵa eksplode ridis pri la nura ideo.

Klare videble, la homa popolo en la interna mondo ne multe evoluis koncerne klerecon, kaj fonto de mizero estis la konstato, ke la malbelaj maharoj tiom superas ilin. Mi primeditis, kiom da epokoj Perry kaj mi bezonus por levi tiujn homojn el sia nescio, se trafus nin tiu tasko.

Kaj tiam venis en mian kapon, ke tio estas favora okazo—ke mi povus fari malgrandan komencon ĉe Ĵa, mia amiko, kaj per tio kontroli la efikon de mia instruado al pelucidarano.

“Ĵa,” mi diris, “kion vi dirus, se mi informus vin, ke la mahara teorio pri la formo de la mondo estas ĝusta?”

“Mi dirus,” li respondis, “ke vi aŭ estas stultulo aŭ prenas min por stultulo.”

“Sed Ĵa,” mi insistis, “se ilia teorio estas malĝusta, kiel vi klarigas, ke mi povis trapasi la Teron de la ekstera krusto al Pelucidaro. Se via teorio ĝustas, ekzistas nur maro de flamoj sub ni, en kiu neniun popolo povus vivi, sed mi venas el granda mondo tie, plena da homoj, bestoj, birdoj kaj fiŝoj en vastaj oceanoj.”

“Vi loĝas sur la suba flanko de Pelucidaro kaj ĉiam marŝas kun la kapo

malsupre?”, li rikanis. “Kaj se mi kredus tion, amiko, mi estus vere freneza.”

Mi klopodis klarigi al li la graviton, kaj per la ekzemplo de faligita frukto mi ilustris la neeblecon, ke korpo falu de sur la Tero en kiuj ajn cirkonstancoj. Li aŭskultis tiel atenteme, ke mi supozis fari veran impreson, tiel, ke naskiĝas en li pensfadeno, laŭ kiu li kondukiĝos al parta ekkono de la vero. Sed mi eraris.

“Via propra ilustraĵo,” li diris finfine, “pruvas la falsecon de via teorio.” El sia mano li faligis frukton al la tero. “Vidu,” li diris, “sen apogo, eĉ tiu frukteto falas, ĝis ĝi trafas ion, kio haltigas ĝin. Se Pelucidaro ne estus subtenata sur la maro de flamoj, ankaŭ ĝi falus, kiel la frukto—vi pruvis ĝin mem!” Li venkis tiufoje—mi vidis tion en liaj okuloj.

La tasko ŝajnis nefarebla, do mi rezignis pri ĝi, almenaŭ provizore, ĉar kiam mi konsideris la necesan klarigon pri nia sunsistemo kaj la universo, mi ekkomprenis la vanecon provi bildigi al Ĵa aŭ iu ajn alia pelucidarano la sunon, la lunon, la planedojn kaj la sennombrajn stelojn. Kiuj naskiĝis en la interna mondo, konceptus tiajn aferojn tiel malbone, kiel niaj malfortaj mensoj povas prezenti al si konceptojn kiel “spaco” kaj “eterneco”.

“Nu, Ĵa,” mi diris, “egale, ĉu ni marŝas kun la piedoj supre aŭ malsupre, jen ni estas, kaj la plej grava demando ne estas, de kie ni venis, sed kien ni iras nun. Mi estus tre dankema, se vi povus gvidi min al Futra, kie mi redonos min en la manojn de la maharoj, por ellabori kun miaj amikoj la fuĝplanon, kiun la sagotoj interrompis, kiam ili amasigis nin kaj pelis nin al la areno por spekti la punon al la sklavoj, kiuj mortigis la gardiston. Prefere mi neniam estus forlasinta la arenon, ĉar miaj amikoj kaj mi eble jam nun efektivigus nian fuĝon, dum ĉi tiu malfruiĝo eble signifos frakasiĝon al niaj planoj, kies plenumiĝo dependas de la plua dormo de la tri maharoj kuŝantaj en la kavo sub la konstruaĵo, kie ni estis malliberuloj.”

“Vi volas reiri al kaptiteco?” kriis Ĵa.

“Miaj amikoj estas tie,” mi respondis, “krom vi, miaj solaj amikoj en Pelucidaro. Kion alian mi faru en tiaj cirkonstancoj?”

Dum momento li meditis en silento. Tiam li malgaje balancis sian kapon.

“Kuraĝa homo kaj bona amiko devus tion fari”, li diris, “sed ĝi ŝajnas tute stulta, ĉar la maharoj tutcerte kondamnos vin al morto pro la forkuro, do vi plenumos

nenion por viaj amikoj per reveno. Neniam dum mia tuta vivo mi aŭdis pri eksa malliberulo, kiu memvole revenis al la maharoj. Nur malmultaj eskapas ilin, kvankam kelkaj sukcesas, kaj tiuj preferus morti ol esti rekaptitaj.”

“Mi ne vidas alian vojon, Ĵa,” mi diris, “kvankam mi certigas al vi, ke mi preferus iri al Ŝeolo pro Perry ol al Futra. Sed Perry estas tro pia, ol ke mi iam verŝajne devus savi lin el tiu loko.”

Ĵa demandis al mi, kio estas Ŝeolo, kaj post kiam mi laŭpove klarigis, li diris: “Vi parolas pri Molop-az, la flamanta maro sub Pelucidaro. Ĉiuj mortintoj, kiujn oni metas en la teron, iras tien. Pecon post peco ilin forportas al Molop-az la demonetoj, kiuj loĝas tie. Ni scias tion, ĉar kiam oni malfermas tombojn, la kadavroj troviĝas aŭ parte aŭ tute forportitaj. Tial, ni anorokanoj metas niajn mortintojn en altajn arbojn, kie la birdoj povas trovi ilin kaj porti ilin pecon post peco al la Mortomondo super la Lando de Vasta Ombro. Se ni mortigas malamikon, ni metas lian korpon en la teron, por ke ĝi iru al Molop-az.”

Dum ni parolis, ni marŝadis supren tra la kanjono, per kiu mi malsupreniris al la granda oceano kaj la sitiko. Ĵa faris sian eblon por persvadi min ne reiri al Futra, sed kiam li konstatis mian neŝanceblan intencon iri, li konsentis gvidi min al loko, de kiu mi povos vidi la ebenaĵon, kie kuŝas la urbo. Mi miris trovi tute mallonga la distancon ek de la plaĝo, kie mi retrovis Ĵa. Mi evidente malŝparis multe da tempo, sekvante la kurbiĝojn de serpentuma kanjono, dum trans la altaĵo kuŝis Futra, al kiu mi ŝajne plurfoje proksimiĝis.

Kiam ni atingis la verdon de la altaĵo kaj ekvidis la granitajn pordegoturojn, nur punktojn sur la florplena ebenejo malsupre, Ĵa lastfoje penis persvadi min rezigni pri mia freneza celo kaj reveni kun li al Anorok, sed mia decido restis firma, do li fine adiaŭis min, plene certa, ke li rigardas min la lastan fojon.

Mi bedaŭris disiĝi de Ĵa, ĉar mi jam tre forte amikiĝis kun li. Kun lia kaŝita urbo sur la insulo Anorok kiel bazo kaj liaj sovaĝaj militistoj kiel eskorto, Perry kaj mi povus fari multe da esplorado, kaj mi esperis poste reiri al Anorok, se nia fuĝplano sukcesus.

Sed restis unu gravega afero unue farenda—almenaŭ por mi la plej grava afero—trovi Dian la Bela. Mi volis senkulpigi min pro la insulto, kiun mi pro nescio faris al ŝi, kaj mi volis, nu, mi volis revidi ŝin kaj esti kun ŝi.

Laŭ la montodeklivo mi malsupreniris sur la ravan florkampon kaj transiris la

ondantan pejzaĝon al la senombraj obeliskoj, kiuj gardas la vojojn al la subtera Futra. Kvaronan mejlon de la plej proksima enirejo, min ekvidis la sagota gardistaro, kaj kvar el la gorilohomoj fulmrapide sturmis al mi.

Kvankam ili minacis per siaj lancoj kaj kriis kiel sovaĝuloj, mi tute ne atentis ilin kaj trankvile plumarŝis al ili, kvazaŭ nekonscia pri ilia ekzisto. Mia konduto efikis al ili ĝuste laŭ miaj esperoj, ĉar kiam ni interproksimiĝis, ili ĉesigis sian sovaĝan kriadon. Ili evidente atendis, ke vidinte ilin, mi tuj turniĝos kaj forkuros, tiel donante al ili tion, kion ili plej ŝatis: moviĝantan celobjekton, al kiu ĵeti siajn lancojn.

“Kion vi faras ĉi tie?” kriis unu, kiu poste rekonis min. “Ho! Estas la sklavo, kiu pretendas esti el alia mondo—kaj kiu fuĝis, kiam la dago amokis en la amfiteatro. Sed kial vi revenis, post via sukcesa fuĝo?”

“Mi ne ‘fuĝis’,” mi respondis. “Mi forkuris nur por eviti la dagon, kiel aliaj, kaj venis en longan montpasejon, konfuziĝis kaj perdis la vojon en la antaŭmontetoj ekster Futra. Kaj nur nun mi trovis la revenan vojon.”

“Kaj vi revenas libervole al Futra!” ekkriis unu gardisto.

“Al kiu alia loko mi iru?” mi demandis. “Mi estas fremdulo en Pelucidaro kaj ne konas alian lokon ol Futra. Kial mi ne dezirus esti en Futra? Ĉu oni ne bone nutras kaj bone traktas min? Ĉu mi ne estas feliĉa? Kiu povus deziri pli bonan sorton?”

La sagotoj gratis al si la kapon. Ĉio ĉi estis io nova por ili, do, ĉar ili estis nur stultaj brutoj, ili kondukis min al siaj mastroj, kiuj laŭ ili pli kompetente solvos la enigmon de mia reveno, ĉar por ili mem ĝi restis ankoraŭ enigmo.

Mi diris tion al la sagotoj por kaŝi la spuron de mia fuĝplano. Se ili kredus min sufiĉe kontenta pri mia sorto en Futra por libervole reveni post tiel bonega ebleco eskapi de ili, ili ne kredus, eĉ dum momento, ke mi okupiĝos pri la aranĝado de denova fuĝo tuj post mia reveno al la urbo.

Do ili kondukis min antaŭ ŝliman maharon, kiu tenis sin sur ŝlima roko en la granda ĉambro, kiu estis ĝia oficejo. Per siaj fridaj reptiliaj okuloj la estaĵo ŝajnis trabori la maldikan plakon de mia trompado kaj legi miajn plej intimajn pensojn. Ĝi atentis la historion, kiun la sagotoj diris pri mia reveno al Futra, rigardante la lipojn kaj fingrojn de la gorilohomoj dum la rakontado. Poste ĝi pridemandis

min pere de unu sagoto.

“Vi diras, ke vi revenis al Futra memvole, ĉar vi kredas vin pli sekura ĉi tie ol aliloke—ĉu vi ne scias, ke vi povus ĉiam ajn esti selektita por perdi vian vivon en la intereso de la avanaj sciencaj esploroj, pri kiuj niaj kleruloj daŭre okupiĝas?”

Mi nenion sciis pri tia afero, sed mi opiniis plej saĝe, ke mi ne konfesu tion.

“Mi ne estus en pli granda danĝero ĉi tie,” mi diris, “ol nuda kaj nearmita en la sovaĝaj ĝangaloj aŭ la solecaj ebenaĵoj de Pelucidaro. Fakte, mi kredas min tre bonŝanca entute reveni al Futra. Unufoje mi apenaŭ evitis la morton inter la dentoj de grandega sitiko. Ne, mi certe estas pli sekura en la manoj de la inteligentaj estaĵoj, kiuj regas Futra. Tiel estas almenaŭ en mia propra mondo, kie homoj kiel mi regas ĉion. Tie, la plej altaj homaj popoloj protektas kaj gastigas la fremdulojn ĉe si, kaj estante fremdulo ĉi tie, mi kompreneble atendis ricevi simile komplezan traktadon ĉi tie.”

La maharo silente rigardis min dum iom da tempo post miaj eldiroj, kaj la sagoto tradukis miajn vortojn al sia mastro. La estaĵo ŝajnis profunde pensi. Fine li komunikis ian mesaĝon al la sagoto. Tiu lasta turniĝis, gestis, ke mi sekvu, kaj foriris el la ĉeesto de la rampulo. Malantaŭ mi kaj ambaŭflanke de mi marŝis la ceteraj gardistoj.

“Kion ili faros al mi?” mi demandis al la ulo dekstre de mi.

“Vi aperos antaŭ la erudiciuloj, kiuj pridemandos vin pri la stranga mondo, el kiu vi pretendas veni.”

Post momento de silento li denove turnis sin al mi.

“Ĉu vi eble scias,” li demandis, “kion la maharoj faras al sklavoj, kiuj mensogas al ili?”

“Ne,” mi respondis, “kaj tio tute ne interesas min, ĉar mi tute ne intencas mensogi al la maharoj.”

“Do vi gardu vin antaŭ tio, ke vi rerakontu la fabelon, kiun vi ĵus diris al Sol-to-to—ha, alia mondo, kie regas homoj!” li rikanis definitivece.

“Sed estas vero,” mi insistis. “De kiu alia loko mi venis? Mi ne estas el Pelucidaro. Ĉiu povas vidi tion eĉ per duono de okulo.”

“Nu, estas via malbona ŝanco,” li rimarkis seke, “ke oni eble juĝos vin ne per tuta, sed duona okulo.”

“Kion ili faros al mi,” mi demandis, “se ili rifuzos kredi min?”

“Eble ili kondamnos vin al la areno, aŭ al la fosaĵoj por la eksperimentoj de la erudiciuloj,” li respondis.

“Kaj kion ili faros al mi tie?” mi persistis.

“Neniu scias, krom la maharoj kaj tiuj, kiuj iras al la fosaĵoj kun ili, sed ĉar la lastaj neniam revenas, ilia scio ne multe utilas al ili. Onidire, la erudiciuloj distranĉas siajn esplorobjektojn ankoraŭ vivaj, kaj lernas per tio multajn utilajn aferojn. Sed supozeble tio ne montriĝas tre utila al tiu, kiun oni distranĉas. Kompreneble, tio estas nur konjektoj. Postnelonge, vi verŝajne scios multe pli pri ĝi ol mi,” kaj li ridetis, dum li parolis. La sagotoj disvolvis jam grandan humursenton.

“Kaj se estos la areno,” mi daŭrigis, “kio tiam?”

“Vi vidis tiujn du, kiuj alfrontis la taragon kaj la dagon tiam, kiam vi forkuris?” li diris.

“Jes.”

“Via morto en la areno similus al tiu, kiun oni planis por ili,” li klarigis, “kvankam oni eble uzus alispecajn bestojn, kompreneble.”

“Ĉu la morto estas certa en ĉiu okazo?” mi demandis.

“Kio okazas al tiuj, kiuj foriras al la erudiciuloj, mi ne scias, kaj neniu alia scias,” li respondis, “sed tiuj, kiuj iras al la areno povas eliri vivaj kaj tiumaniere regajni sian liberon, kiel okazis al tiuj du, kiujn vi vidis.”

“Ili regajnis sian liberon? Kiel?”

“Estas kutimo de la maharoj liberigi tiujn, kiuj restas vivaj en la areno post la

foriro aŭ morto de la bestoj. Tiel okazis, ke pluraj potencaj militistoj el tre malproksimaj landoj, kiujn ni kaptis en niaj sklavkaptaj misioj, batalis kaj mortigis la bestegojn, kiujn oni ellasis kontraŭ ilin, kaj tiel regajnis sian liberon. Tiufoje, kiam vi spektis, la bestoj mortigis unu la alian, sed la rezulto estas la sama—oni provizis la viron kaj virinon per armiloj kaj liberigis ilin, kaj ili ekvojaĝis hejmen. Sur la maldekstra ŝultro de ambaŭ oni bruligis markon—la markon de la maharoj—kiu por ĉiam protektos ilin de la sklavkaptaj bandoj.”

“Do mi havus etan ŝancon pluvivi, se ili sendus min al la areno, sed absolute neniun, se la erudiciuloj trenos min al la fosaĵoj?”

“Vi tute pravas,” li respondis, “sed ne sentu vin feliĉa, se oni sendos vin al la areno, ĉar apenaŭ unu el mil eliras viva.”

Je mia miro, oni resendis min al la sama konstruaĵo, kie mi estis tenata kun Perry kaj Gak antaŭ ol fuĝi. Ĉe la pordo oni transdonis min al la gardistaro tie.

“Oni sendube baldaŭ vokos lin al la enketistoj,” diris tiu, kiu revenigis min, “do tenu lin preta.”

Aŭdinte pri mia memvola reveno al Futra, miaj nunaj gardistoj evidente kredis sendanĝere lasi min libera en la konstruaĵo, kiel okazis kutime antaŭ mia eskapo, do oni ordonis al mi denove eklabori je mia antaŭa tasko.

Mia unua faro estis elspuri Perry, kiun mi trovis, kiel kutime, absorbita pri la dikaj volumegoj, kiujn li laŭordone devus nur senpolvigi kaj rearanĝi sur novaj bretoj.

Kiam mi eniris la ĉambron, li ekrigardis min, afable kapsalutis kaj tuj rekomencis sian laboron, kvazaŭ mi tute ne estus forestinta. Lia indiferenteco kaj mirigis kaj ĉagrenis min. Kaj jen mi riskis morti por reveni al li, sole pro miaj devosento kaj amo!

“Perry!” mi ekkriis, “Ĉu vi ne havas vortojn por mi post mia longa foresto?”

“Longa foresto!” li ripetis kun videbla miro. “Kion vi volas diri?”

“Ĉu vi frenezas, Perry? Ĉu vi volas diri, ke mi ne mankis al vi, de kiam ni disiĝis pro la atakanta dago en la areno?”

“De kiam!” li ripetis. “Homo, mi ĵus revenis de la areno! Vi revenis preskaŭ tiel frue kiel mi. Efektive, se vi forestus multe pli longe, mi certe ektimus, kaj mi ja intencis demandi al vi, kiel vi fuĝis de la besto, tuj post kiam mi fintradukos ĉi tiun plej interesan eltiraĵon.”

“Perry, vi *estas* freneza,” mi ekkriis. “Scias nur Dio, kiel longe mi forestis. Mi iris al aliaj landoj, eltrovis novan genton de homoj en Pelucidaro, vidis la kulton de la maharoj en ilia kaŝita templo, kaj apenaŭ eskapis viva de ili kaj de granda labirintodono, kiun mi renkontis pli poste, post mia longa kaj teda vagado trans fremdan mondon. Mi mankis dum tutaj monatoj, Perry, kaj nun vi apenaŭ paŭzas de via laboro ĉe mia reveno, kaj vi insistas, ke ni apartiĝis nur momenton. Ĉu tiel vi traktas amikon? Mi miras pri vi, Perry, kaj se mi pensus eĉ dum momento, ke mi estas por vi tiel bagatela, mi ne revenus por riski pro vi morton en la manoj de la maharoj.”

La maljunulo rigardis min dum longa tempo, antaŭ ol ekparoli. Lia sulka vizaĝo montris konsternan mienon, kaj liaj okuloj esprimis doloran bedaŭron.

“David, mia filo,” li diris, “Kiel vi povus eĉ momente dubi mian amon al vi? Ĉi tie temas pri strangaĵo, kiun mi ne povas kompreni. Mi scias, ke mi ne estas freneza, kaj mi estas same tiel certa, ke ankaŭ vi ne; sed kiel ni klarigu la strangajn halucinojn, kiujn ni ambaŭ ŝajne havis pri la tempopaso post nia lasta intervidiĝo. Vi estas certa, ke pasis monatoj, dum mi estas samgrade certa, ke antaŭ unu horo mi sidis ĉe via flanko en la amfiteatro. Ĉu iel eblas, ke ni ambaŭ pravas, kaj samtempe ambaŭ eraras? Unue, diru al mi, kio estas la tempo, kaj eble per tio mi povus solvi nian problemon. Ĉu vi kaptas mian intencon?”

Mi ne kaptis ĝin kaj diris tion.

“Jes,” daŭrigis la maljunulo, “ni ambaŭ pravas. Por mi, klinita super mia libro ĉi tie, ne pasis multe da tempo. Mi faris malmulte aŭ nenion por malŝpari mian forton, do mi bezonis nek manĝon nek dormon, sed vi, kontraŭe, marŝis kaj batalis kaj foruzis forton kaj histon, kiu devas rekonstruiĝi per nutraĵo, do multajn manĝojn kaj dormojn post kiam vi laste vidis min, vi kompreneble mezuras la tempon grandparte laŭ tiuj agoj. Fakte, David, ne povas ekzisti tempo en Pelucidaro, kie mankas remedoj por mezuri aŭ registri ĝin. La maharoj mem ne konscias pri io kiel la tempo. Mi trovas ĉi tie en iliaj literaturaj verkoj nur unusolan gramatikan tempon, la prezencan. Ŝajnas, ke ĉe ili ekzistas nek preterito nek futuro. Kompreneble, niaj ekstermondaj mensoj ne kapablas

kompreni tian cirkonstancon, sed niaj lastaj traviaĵoj ŝajnas montri ĝian ekziston.”

La temo estis tro profunda por mi, kaj mi tion diris, sed Perry ŝajne nenion pli ĝuis ol spekulativi pri ĝi, kaj aŭskultinte kun intereso mian rakonton pri la travivitaj aventuroj, li reiris al la temo, kiun li facilparole pridetaladis, kiam sagoto envenis kaj interrompis lian saĝumadon.

“Venu!” ordonis la entrudulo, gestante al mi. “La enketistoj parolos kun vi.”

“Adiaŭ, Perry!” mi diris, manpremante al la grizulo. “Eble ekzistas nur prezenco kaj eble ne ekzistas la tempo, sed mi estas certa, ke mi baldaŭ komencos vojaĝon al la postvivo kaj neniam revenos. Se vi kaj Gak sukcesos fuĝi, mi petas, ke vi promesu elserĉi Dian la Bela, kaj diru, ke per miaj lastaj vortoj mi petis ŝian pardonon pro mia neintenca ofendo al ŝi, kaj ke mia sola deziro estis pluvivi sufiĉe longe por doni satisfakcion pro mia malbona faro al ŝi.”

Larmoj venis en la okulojn de Perry.

“Mi ne povas kredi, ke vi ne revenos, David,” li diris. “Estus terure eĉ pripensi mian pluan vivon sen vi, inter ĉi tiuj abomenaj kaj fiaj brutoj. Se ili forprenos vin, mi neniam fuĝos, ĉar mi sentas min pli sekura ĉi tie, ol mi estus kie ajn aliloke en ĉi tiu subtera mondo. Adiaŭ, mia filo, adiaŭ!” Tiam lia maljuna voĉo ŝanceliĝis kaj rompiĝis, kaj kiam li kaŝis sian vizaĝon per siaj manoj, la sagota gardisto krude ekkaptis mian ŝultron kaj ŝovis min el la kamero.

11-a ĉapitro

KVAR MORTAJ MAHAROJ

Momenton poste, mi staris antaŭ deko da maharoj—la sociaj enketistoj de Futra. Ili prezentis al mi multajn demandojn, pere de sagota interpretisto. Mi respondis ĉiujn vere. Ŝajnis precipe interesi ilin mia rakontado pri la ekstera mondo kaj la stranga veturilo, kiu portis Perry kaj min al Pelucidaro. Mi kredis, ke mi ilin konvinkis, kaj post longa sidado en silento post la enketo, mi atendis, ke oni ordonos al mi reiri al mia loĝejo.

Dum tiu ŝajna silento ili diskutis pere de sia stranga, neparola lingvo la meriton de mia historio. Fine, la estro de la tribunalo komunikis la rezulton de la kunsido al la oficiro, kiu estris la sagotan gardistaron.

“Venu,” li diris al mi, “vi estas kondamnita al la eksperimentaj fosaĵoj, ĉar vi aŭdacis insulti la inteligentecon de la potenculoj per la ridinda historio, kiun vi tiel malprudente rakontis al ili.”

“Ĉu vi volas diri, ke ili ne kredis min?”, mi demandis, tute mirigita.

“Kredi vin!”, li diris. “Ĉu vi volas diri, ke vi atendis, ke iu ajn kredus tiel neeblan mensogon?”

Estis senespere, do mi marŝis en silento flanke de mia eskorto tra la mallumaj koridoroj kaj pasejoj al mia terura perejo. En malalta urbnivelo ni venis al pluraj lumigitaj kameroj, en kiuj ni vidis plurajn maharojn okupi sin pri diversaj taskoj. Mia eskorto kondukis min al unu el tiuj kameroj, kaj antaŭ ol foriri ili katenis min al flanka muro. Aliaj homoj estis simile katenitaj tie. Sur longa tablo kuŝis viktimo, kiam oni kondukis min en la kameron. Kelkaj maharoj ĉirkaŭstaris la kompatindulon, tenante lin al la tablo, por ke li ne moviĝu. Alia, tenante akran tranĉilon en sia trifingra antaŭpiedo, tranĉe malfermis la bruston kaj abdomenon de la viktimo. Oni uzis nenian anestezilon, kaj estis terure aŭdi la kriojn kaj ĝemojn de la torturato. Vere, tio estis venĝosimila vivisekcio. Malvarma ŝvito

ekfluis el miaj poroj, kiam mi ekkomprenis, ke baldaŭ venos mia vico. Kaj ne forgesu, ke kie ne ekzistas la tempo, mi povus facile imagi, ke mia suferado daŭras monatojn, antaŭ ol la morto finfine liberigus min!

La maharoj tute ne atentis min, kiam oni kondukis min en la kameron. Tiel profundiĝintaj en sia laboro ili estis, ke mi certis, ke ili eĉ ne scias, ke la sagotoj eniris kun mi. La pordo estis proksima. Se nur mi povus atingi ĝin! Sed tiuj pezaj katenoj malebligis ion ajn tian. Mi ĉirkaŭrigardis, serĉante rimedon por liberiĝi el la ĉenoj. Sur la planko inter mi kaj la maharoj kuŝis eta ĥirurgiilo, kiun unu el ili kredeble faligis. Ĝi aspektis ne malsimile al butonhoko, sed ĝi estis multe pli eta, kaj havis akrigitan pinton. Centfoje dum mia knabaĝo mi malŝlosis serurojn per butonhokoj. Se nur mi povus atingi tiun peceton de polurita ŝtalo, mi eble povus almenaŭ portempe forfuĝi.

Rampante ĝis la limo de mia ĉeno, mi trovis, ke etendante unu manon tiom, kiom mi povis, miaj fingroj restis ankoraŭ unu colon for de la celata ilo. Estis turmente! Mi streĉis ĉiun fibron, sed mi ne povis atingi ĝin.

Fine mi turniĝis, kaj etendis unu piedon al la objekto. Mia koro saltis en mian gorĝon! Mi povis apenaŭ ektuŝi ĝin! Sed eble en mia peno tiri ĝin al mi, mi nevole ŝovus ĝin ankoraŭ pli malproksimen, kie ĝi estus neatingebla! Malvarma ŝvito ekfluis sur min el ĉiu poro. Malrapide kaj zorgeme mi faris la penadon. Miaj piedfingroj falis sur la malvarman metalon. Poiome mi movis ĝin al mi, ĝis mi kredis ĝin atingebla de mia mano, kaj momenton poste, mi returniĝis, kaj la kara ilo estis en mia mano.

Mi diligente eklaboris je la mahara seruro, kiu tenis mian ĉenon. Estis ridinde simple. Eĉ infano povus tiel malŝlosi ĝin, kaj post momento mi estis libera. La maharoj nun ŝajne finis sian laboron ĉe la tablo. Unu jam forturniĝis kaj ekzamenis aliajn viktimojn, ŝajne intencante elekti la sekvontan operacioton.

La dorsoj de la ĉetabluloj estis turnitaj al mi. Se ne estus la estaĵo, kiu marŝis al ni, mi povus fuĝi tuj tiumomente. Malrapide, la estulo alproksimiĝis al mi, kiam ĝian atenton allogis granda sklavo ĉenita kelkajn jardojn dekstre de mi. Tie, la reptilio ekhaltis kaj komencis zorge ekzameni la kompatindulon, kaj farante tion, ĝi turnis sian dorson al mi dum momento, kaj ĝuste tiam mi faris du saltegojn, kiuj portis min el la kamero en la koridoron trans ĝi, laŭ kiu mi kuris tiel rapide kiel mi kapablis. Kie mi estas kaj kien mi iras—tion mi ne sciis. Mia sola penso estis plejeble malproksimigi min de tiu timinda torturkamero.

Poste, mi reduktis mian rapidecon al vigla marŝado, kaj pli poste, ektimante la danĝeron, ke min trafus nova malagrabra situacio, se mi malzorgus, mi moviĝis ankoraŭ pli malrapide kaj zorgeme. Post tempeto mi venis al koridoro, kiu ŝajnis iel mistere konata al mi, kaj iom poste, hazarde rigardante en kameron flanke de la koridoro, mi vidis tri maharojn volviĝintajn en dormado sur lito el feloj. Mi preskaŭ jubilis laŭte pro ĝojo kaj trankviliĝo. Estis la sama koridoro kaj la samaj maharoj, al kiuj mi intencis asigni tiel gravan rolon en nia fuĝo el Futra. La Providenco vere gravis min, ĉar la reptilioj ankoraŭ dormis.

Nun la unusola granda danĝero estis la reiro al la superaj niveloj por serĉi Perry kaj Gak, sed ĉar nenio alia estis farebla, mi rapidis supren. Kiam mi atingis la frekventatajn partojn de la konstruaĵo, mi trovis grandan ŝarĝon da feloj en angulo, kaj tiujn mi levis al mia kapo, portante ilin tiel, ke la randoj kaj anguloj pendis ĉirkaŭ miaj ŝultroj, tute kaŝante mian vizaĝon. Tiel kamuflite, mi trovis Perry kaj Gak kune en la kamero, kie ni manĝadis kaj dormadis.

Ne necesas diri, ke ambaŭ ĝojis vidi min, kvankam ili kompreneble sciis nenion pri la sorto, al kiu kondamnis min la juĝistoj. Ni decidis perdi neniom da tempo antaŭ ol efektiviĝi nian fuĝplanon, ĉar mi ne povus esperi resti longe kaŝita de la sagotoj, kaj mi ne bone povus porĉiame porti tiun amason da feloj sur mia kapo sen vekti suspekton. Tamen, estis kredeble, ke per ĝi mi povus sendanĝere trairi la plenajn koridorojn kaj kamerojn de la superaj niveloj, do mi ekiris kun Perry kaj Gak—ĉe kio la fetoro de la malbone tanitaj feloj dume preskaŭ sufokis min.

Kune, ni iris al la unua vico da koridoroj sub la ĉefetaĝo de la konstruaĵoj, kaj tie Perry kaj Gak haltis por atendi min. La konstruaĵoj estas fositaj el la formacio de solida kalkŝtono. Ilia arkitekturo estas pro absolute nenio rimarkinda. La ĉambroj estas foje rektangulaj, foje rondaj, kaj foje ovalaj. La koridoroj, kiuj ilin kunigas, estas mallarĝaj kaj ne ĉiam rektaj. La kameroj estas lumigitaj per difuzita sunlumo reflektita tra tuboj similaj al tiuj, per kiuj oni lumigis la avenuojn. Ju pli malaltaj la kamervicoj, des pli mallume. La plejmulto de la koridoroj estas tute nelumigitaj. La maharoj povas vidi tre bone en duonmallumo.

Survoje al la ĉefetaĝo ni renkontis multajn maharojn, sagotojn kaj sklavojn; sed neniu atentis nin, ĉar ni iĝis parto de la ordinara vivo en la koridoro. Estis nur unusola enirejo kondukanta el la loko al la avenuo, kaj ĝi estis bone gardata de sagotoj—sole ĉi tiun pordon ni ne rajtis trapasi. Fakte, estis malpermesite al ni ankaŭ eniri la subajn koridorojn kaj apartamentojn, krom je apartaj okazoj, kiam

oni ordonis al ni tion fari; sed ĉar ili konsideris nin malsupera specio sen inteligenteco, ili ne havis kaŭzon timi, ke ni per tio povus fari ian malbonon, do oni ne malhelpis al ni eniri la koridoron, kiu kondukis malsupren.

Volvitajn en felo, mi portis tri glavojn kaj la du pafarkojn kaj la sagojn, kiujn Perry kaj mi faris. Ĉar multaj sklavoportis fele volvitajn ŝarĝojn ĉiudirekte, neniuj trovis mian ŝarĝon menciinda. Kie mi lasis Gak kaj Perry, ne estis aliaj estuloj videblaj, do mi tiris unu glavon el la pakaĵo, kaj lasante la ceterajn armilojn ĉe Perry, mi ekiris sola al la malsuperaj niveloj.

Veninte en la apartamenton, en kiu dormis la tri maharoj, mi silente eniris piedpinte, ne memorante, ke la kreitaĵoj ne kapablas aŭdi. Per rapida trapiko tra la koro mi mortigis la unuan, sed mia dua trapiko ne estis tiel bontrafa, tiel ke antaŭ ol mi povis mortigi la venontan el miaj viktimoj, ĝi ĵetis sin kontraŭ la tria, kiu rapide suprensaltis, kontraŭstarante min per vaste malfermitaj makzeloj. Sed batalado ne estas okupo, kiun la mahara raso ŝatas, kaj kiam la estulo vidis, ke mi jam senvivigis du el ĝiaj kunuloj kaj ke mia glavo estas ruĝa de ilia sango, ĝi haste forkuris de mi. Sed mi estis tro rapida por ĝi, do, duone saltante, duone flugante, ĝi forhastis laŭ alia koridoro, dum mi sekvis tuj post ĝi.

Ĝia eskapo signifus la tutan ruiniĝon de niaj planoj, kaj tre probable mian tujan morton. Tiu penso donis flugilojn al miaj piedoj; sed eĉ en la plej bona kazo mi povis nur egali la rapidecon de la saltanta estulo antaŭ mi.

Tute subite ĝi forturnis sin en apartamenton dekstre de la koridoro, kaj enrapidante momenton poste, mi frontis du el la maharoj. Tiu, kiu estis tie, kiam ni eniris, okupis sin per kelkaj metalaj ujoj, en kiujn oni metis pulvorojn kaj fluaĵojn, se juĝi surbaze de la vico de flakonoj kuŝantaj sur la benko, ĉe kiu ĝi laboris. Mi tuj komprenis, en kiun lokon mi estis veninta. Jen ĝuste tiu ĉambro, pri kiu Perry donis al mi detalajn instrukciojn, per kiuj mi trovu ĝin. Ĝi estis la subtera kamero, en kiu oni kaŝis la Grandan Sekreton de la mahara raso. Kaj sur la benko, flanke de la flakonoj, kuŝis la fele bindita libro, kiu entenis la solan kopion de la afero, kiun mi devis elserĉi post la mortigo de la tri dormataj maharoj.

Ne estis alia elirejo el la ĉambro ol la pordo, en kiu mi nun staris, frontante la du timindajn reptiliojn. Mi sciis, ke pelitaj en angulon ili batalus kiel demonoj, kaj ili estis bone ekipitaj por batali, se ili nepre devus. Kune, ili impetis sur min, kaj kvankam mi tuj trapikis la koron de unu el ili, la alia alfiksis siajn brilajn

dentegojn sur mian glavbrakon super la kubuto, kaj tiam komencis per siaj akraj ungegoj rastgrati mian korpon, ŝajne por elŝiri miajn internaĵojn. Mi konstatis, ke estas senutile esperi liberigi mian brakon el tiu potenca, premega kaptiĝo, kiu ŝajnis detranĉi mian brakon de mia korpo. La doloro, kiun mi suferis, estis intensa, sed ĝi servis nur por sproni min al pli grandaj penoj por venki mian kontraŭulon.

Tien kaj reen sur la planko ni luktis—la maharo donis al mi terurajn, tranĉajn batojn per siaj antaŭpiedoj, dum mi klopodis ŝirmi mian korpon per mia maldekstra mano, samtempe provante trovi okazon por transdoni mian klingon el mia nun senutila glavmano al ties rapide malfortiĝanta parulo. Finfine mi sukcesis, kaj per tio, kio ŝajnis esti mia lasta unco da forto, mi pikis la klingon tra la malbela korpo de mia malamiko. Tiel sensone kiel ĝi batalis, ĝi mortis, kaj kvankam malforta pro doloro kaj sangoperdo, mi kun emocio de triumfa fiereco transpaŝis ĝian konvulsie rigidiĝantan kadavron kaj ekkaptis la plej potencon sekreton de tiu mondo. Unu sola ekrigardo certigis min, ke ĝi estas ĝuste tiu afero, kiun Perry priskribis al mi.

Kaj ekkaptante ĝin, ĉu mi prepensis, kion tio signifas por la homaro de Pelucidaro—ĉu fulmis tra mia menso la penso, ke sennombraj ankoraŭ nenaskitaj generacioj de mia propra specio havos kaŭzon adori min pro la afero, kiun mi plenumis por ili? Ĉu? Ne esti tiel. Mi pripensis belan ovalan vizaĝon, rigardantan el kristale puraj okuloj tra ondanta amaso da nigregaj haroj. Mi pripensis ruĝegajn lipojn, de Dio faritaj por kisado. Kaj mi tute subite, sen rekta instigo, starante sola en la sekreta kamero de la maharoj de Pelucidaro, eksciis, ke mi amas Dian la Bela.

12-a ĉapitro POSTĈASO

Dum momento mi staris tie, pensante pri ŝi, kaj tiam mi sopirĝemante metis la libron malantaŭ la rimenon, kiu tenis mian zontukon, kaj turniĝis por forlasi la apartamenton. Malsupre de la koridoro, kiu kondukas supren el la malsupraj kameroj, mi fajfis per la antaŭaranĝita signalo, kiu anoncis al Perry kaj Gak, ke mi estis sukcesinta. Momenton poste, ili staris ĉe mia flanko, kaj je mia miro mi vidis, ke Huĝa la Ruza akompanas ilin.

“Li kuniĝis kun ni,” klarigis Perry, “kaj ne permesis nei. Tiu ulo estas vulpo. Li flaras eskapon, kaj prefere ol malsukcesigi nian ŝancon nun, mi diris, ke mi kondukos lin al vi, por ke vi decidu, ĉu li akompanu nin.”

Mi ne havis amon por Huĝa, kaj mi ne fidis lin. Mi certis, ke li perfidus nin, se li kredus tion profitodona; sed mi vidis neniun elturniĝon, kaj la fakto, ke mi mortigis kvar maharojn, anstataŭ kiel planite nur tri, ebligis inkluzivi la viron en nia fuĝplano.

“Nu, bone,” mi diris, “vi povos akompani nin, Huĝa, sed je la unua signo de perfido, mi trapikos vin per mia glavo. Ĉu vi komprenas?”

Li diris, ke jes.

Iom poste ni estis forigintaj la haŭtojn de sur la kvar maharoj, kaj tiel bone ni sukcesis rampi en ilian internon, ke nia ŝanco eskapi nerimarkite el Futra ŝajnis bonega. Ne estis facila tasko kunfiksi la haŭtojn tie, kie ni ilin tratranĉis ĉe la ventro por forigi ilin de la internaĵoj, sed mi restis ekstere, ĝis ĉiuj aliaj kun mia helpo estis enkudritaj, kaj lasis aperturon en la brusto de la haŭto de Perry, tra kiu li povis elmeti la manojn por enkudri min, kaj tiel ni vere povis multe pli bone plenumi nian planon, ol mi esperis. Ni sukcesis teni la kapojn levitaj, metante niajn glavojn tra la koloj, kaj sammaniere ni povis ilin movi laŭ viveca maniero. Nia plej granda malfacilaĵo estis la palmopiedoj, sed eĉ tiun problemon

ni fine solvis, tiel ke kiam ni moviĝis, ni aspektis tute naturaj. Truetoj pikitaj en la pufaj gorĝoj, en kiujn ni metis niajn kapojn, permesis al ni vidi sufiĉe bone por konduki nin mem antaŭen.

Tiel ni ekiris supren al la ĉefetaĝo de la konstruaĵo. Gak iris antaŭe en la stranga parado, poste sekvis Perry, sekvita de Huĝa, dum mi iris malantaŭe, admoninte Huĝan, ke mia glavo estis tiel aranĝita, ke mi povus piki ĝin tra la kapo de mia kostumo en lian internaĵon, se li montrus hezitemon.

Kiam la bruo de rapidantaj piedoj avertis min, ke ni eniras la plenajn koridorojn de la ĉefetaĝo, mia koro saltis ĝis mia buŝo. Tute sen hontosento mi konfesas, ke mi timis—neniam antaŭe aŭ poste en mia vivo mi spertis tian suferegon de animbrula timo kaj necerteco, kia min frapis. Se eblus ŝviti sangon, mi ŝvitis ĝin tiam.

Malrapide, laŭ la paŝmaniero kutima ĉe la maharoj, kiam ili ne uzas siajn flugilojn, ni trampis amasojn da okupitaj sklavoĵoj, sagotoj kaj maharoj. Post tempo, kiu ŝajnis eterneco, ni atingis la eksteran pordon, kiu kondukas en la ĉefan avenuon de Futra. Multaj sagotoj staris ĉirkaŭ la vojkruciĝo. Ili ekrigardis Gak, kiam li silente paŝis inter ili. Tiam pasis Perry, kaj tiam Huĝa. Nun estis mia vico, kaj en subita atako de glaciiga teruro, mi konstatis, ke la varma sango el mia vundita brako gutas malsupren tra la morta piedo de la mahara haŭto, kiun mi portis, kaj lasis sian sangan spuron sur la pavimo, ĉar mi vidis, ke sagoto atentigis sian kunulon pri ĝi.

La gardisto paŝis antaŭ min, kaj fingromontrante al mia sanganta piedo, alparolis min per la gestolingvo, kiun tiuj du specioj uzas kiel komunikilon. Eĉ se mi sciis, kion li diris, mi ne povus respondi per la mortaĵo, kiu min kovris. Mi foje vidis grandan maharon glaciigi tromemfidan sagoton per sia nura rigardo. Tio ŝajnis mia sola espero, do mi ĝin provis. Haltiĝinte, mi movis mian glavon tiel, ke estiĝis la impresio, ke la morta kapo explore rigardas la gorilo-homon. Dum longa momento, mi staris tute senmova, rigardante la ulon per tiuj mortaj okuloj. Poste mi mallevis la kapon, kaj malrapide daŭrigis paŝi antaŭen. Dum momento, ĉio dependis de tio, sed antaŭ ol mi lin tuŝis, la gardisto paŝis flanken, kaj mi pasis en la avenuon.

Ni iris antaŭen sur la larĝa strato, sed nun ni estis ekster danĝero pro la multnombreco de niaj malamikoj, kiuj nin ĉirkaŭis ĉiuflanke. Bonŝance, estis granda procesio da maharoj irantaj al la malprofunda lago, kiu kuŝas je unu

mejlo aŭ iom pli for de la urbo. Ili iradas tien por praktiki siajn amfibiajn emojn, plonĝante por kapti fiŝetojn kaj ĝuante la malvarman profundon de la akvo. Ĝi estas lago de nesala akvo, malprofunda kaj sen la pli grandaj reptilioj, kiu malebligas uzadon de la grandaj maroj de Pelucidaro al ĉiuj, krom si mem.

En la mezo de la amaso, ni pasis supren laŭ la ŝtupoj kaj eliris eksteren sur la ebenaĵon. Dum iom longa distanco, Gak sekvis la rivereton, kiu fluas al la lago, sed fine, ĉe la fundo de ravineto, li ekhaltis, kaj tie ni restis, ĝis ĉiuj estis preterpasintaj kaj ni estis solaj. Tiam, ankoraŭ en la niaj kostumoj, ni ekiris rekte for de Futra.

La varmego de la vertikalaj sunradioj rapide faris niajn abomenajn karcerojn neelteneblaj, do transirinte malaltan altaĵon kaj enirinte ŝirmodonan arbaron, ni fine formetis la maharajn haŭtojn, per kiuj ni venis ĝis tie en sekureco.

Mi ne tedos vin pri la detaloj de tiu amara kaj suferiga fuĝo. Kiel ni vojaĝis per obstina kurado, ĝis ni falis teren pro laco. Kiel nin atakis strangaj kaj timindaj bestoj. Kiel ni apenaŭ eskapis la kruelajn dentegojn de leonoj kaj tigroj, kies grandeco etigus ĝis ridinda sensignifeco la plej grandajn felisojn de la ekstera mondo.

Plu kaj plu ni rapidis, kun unusola intenco: plejeble malproksimigi nin de Futra. Gak kondukis nin al sia propra lando—la lando Sari. Montriĝis neniu signo de postĉaso, kaj tamen ni certis, ke ie malantaŭ ni persistaj sagotoj sekvas nian spuron. Gak diris, ke ili neniam malsukcesis ĉase eltrovi siajn ĉasatojn, ĝis ili kaptis tiujn aŭ estis mem retretigitaj de pli forta militistaro.

Nia sola espero, li diris, estis atingi lian tribon, kies forto tute sufiĉis en la montara fortikejo por forbatali iun ajn nombron da sagotoj.

Kaj finfine, post laŭŝajne monatojn, kaj kiel mi nun scias, eble jaroj, ni venis ĝis loko, kie ni povis vidi la grizbrunan krutaĵon, kiu borderas la antaŭmontetojn de Sari. Kaj preskaŭ sammomente, Huĝa, kiu ĉiam rigardis tiom malantaŭen kiom antaŭen, anoncis, ke li povas vidi aron de viroj malantaŭ ni, superirante malaltan monteĝon. Estis la longe atendita postsekvantaro.

Mi demandis al Gak, ĉu ni povus atingi Sari sufiĉe frue por ilin eskapi.

“Eble,” li respondis, “sed vi trovos, ke la sagotoj povas iri per nekredebla rapideco, kaj ĉar ili estas preskaŭ nelacigeblaj, ili estas sendube multe pli freŝaj

ol ni. Plue—” li paŭzis, ekrigardante Perry.

Mi sciis, kion li pensis. La maljunulo estis preskaŭ elĉerpita. Dum granda parto de nia fuĝado, aŭ Gak aŭ mi duone apogis lin dum la marŝado. Kun tia handikapo, eĉ malpli rapidaj postsekvantoj ol la sagotoj povus facile ĝisatingi nin, antaŭ ol ni povus transiri la krudan altaĵon, kiun ni frontis.

“Vi kaj Huĝa iru antaŭe,” mi diris. “Perry kaj mi alvenos, se ni povos. Ni ne povas vojaĝi tiel rapide kiel vi, kaj ne necesas, ke vi mortu pro tio. Ĝi estas neevitebla. Ni devos ĝin fronti.”

“Mi ne forlasos kamaradon,” estis la simpla respondo de Gak. Mi ne sciis, ke tiu granda, vila praepoka viro havas tiel noblan karakteron interne de si. Mi ĉiam ŝatis lin, sed nun, aldoniĝis honoro kaj respekto al mia ŝato. Jes, ankaŭ amo.

Sed tamen mi pluurĝis lin antaŭen, insistante, ke se li povos atingi sian popolon, li eble povos venigi sufiĉe grandan militistaron por forpeli la sagotojn kaj savi Perry kaj min.

Sed ne, li rifuzis forlasi nin, kaj tiel finiĝis la diskuto, sed li sugestis, ke Huĝa rapidu antaŭen por averti la sarianojn pri la danĝero al la reĝo. Ne necesis multe da instigado por ekmarŝigi Huĝan—la nura ideo sufiĉis por forsendi lin salte antaŭen en la antaŭmontetojn, kiujn ni intertempe atingis.

Perry sciis, ke li endanĝerigas la vivon de Gak kaj mi, kaj la maljunulo preskaŭ insiste petegis, ke ni antaŭeniru sen li, kvankam mi sciis, ke li suferas veran angoron de teruro je la penso, ke li povus fali en la manojn de la sagotoj. Fine, Gak parte solvis la problemon, levante Perry per siaj potencaj brakoj kaj portante lin. Dum tiu agmaniero malrapidigis Gak, li povis tamen antaŭeniri pli rapide tiel, ol kiam li duone apogis la stumblantan maljunulon.

13-a ĉapitro

LA RUZULO

La sagotoj rapide proksimiĝis al ni, ĉar vidinte nin, ili multe akcelis sian rapidecon. Plu kaj plu ni stumblis supren laŭ la mallarĝa kanjono, kiun Gak elektis por proksimiĝi al la altaĵo de Sari. Ambaŭflanke altiĝis apikaj krutaĵoj el belega plurkolora roko, dum sub niaj piedoj la densa montoherbo prezentis molan kaj senbruan tapiŝon. De kiam ni eniris la kanjonon, ni tute ne vidis niajn postsekvantojn, kaj mi komencis esperi, ke ili perdis nian spuron, kaj ke ni atingos la nun rapide proksimiĝantajn krutaĵojn ĝustatempe por suprengrimpi ilin, antaŭ ol esti atingitaj.

Antaŭ ni, ni nek vidis nek aŭdis signon, kiu povus aŭguri la sukceson de la komisio de Huĝa. Intertempe li devus esti atinginta la antaŭpostenojn de la sarianoj, kaj ni devus almenaŭ aŭdi la sovaĝajn kriojn de la tribanoj, dum ili svarmas al siaj armiloj por respondi la reĝan helpalvokon. Post momento, la severaspektaj krutaĵoj antaŭ ni devus nigriĝi je praepokaj militistoj. Sed okazis nenio tia—efektive, la Ruzulo perfidis nin. Tiumomente, kiam ni atendis vidi sariajn lancportantojn kurataki malantaŭ Huĝa por helpi al ni, la poltrona perfidulo kaŝiradis ĉe la eksteraĵoj de la plej proksima saria vilaĝo, por ke li povu enveni de la alia flanko, kiam estos tro malfrue por savi nin, kaj pretendi, ke li perdiĝis inter la montoj.

Huĝa ankoraŭ tenis rankoron kontraŭ mi pro la bato, kiun mi donis por protekti Dian, kaj lia malica spirito permesis eĉ buĉoferi nin ĉiujn, por ke li sin venĝu kontraŭ mi.

Dum ni pliproksimiĝis al la barieraj krutaĵoj, kaj aperis neniu signo de savantaj sarianoj, Gak iĝis kaj kolera kaj timigita, kaj baldaŭ, kiam la bruoj de rapide proksimiĝanta postsekvantaro trafis niajn orelojn, li kriis al mi trans sia ŝultro, ke ni estas perditaj.

Rigardante malantaŭen, mi ekvidis la unuan el la sagotoj ĉe la fora ekstremo de

ampleksa etendiĝo de la kanjono, tra kiu ni ĵus pasis, kaj tiam subita turniĝo forigis el mia vido la malbelan bestaĉon, sed la laŭta ululo de triumfa rabio, kiu leviĝis malantaŭ ni, pruvis, ke la goriloviro vidis nin.

Denove, la kanjono abrupte turniĝis maldekstren, sed dekstre alia branĉo disetendiĝis malpli devie de la ĝenerala direkto, tiel, ke ĝi pli aspektis kiel la ĉefa kanjono ol la maldekstra branĉo. La sagotoj estis nun ne pli ol ducent kvindek jardojn malantaŭ ni, kaj mi vidis, ke estus senespere provi eskapi alie ol per ruzaĵo. Estis malgranda eblo savi Gak kaj Perry, kaj kiam mi atingis la disbranĉiĝon de la kanjono, mi riskis ĝin.

Haltante tie, mi atendis, ĝis la plej antaŭa sagoto kuris en mian vidkampon. Gak kaj Perry jam malaperis ĉirkaŭ angulo en la maldekstra kanjono, kaj kiam la sovaĝa krio de la sagoto anoncis, ke li min vidis, mi turniĝis kaj ekkuris laŭ la dekstra branĉo. Mia ruzo sukcesis, kaj la tuta bando de homĉasantoj impete postkuris min en unu kanjonon, dum Gak portis Perry ekster danĝeron laŭ la alia.

Kurado neniam estis mia plej bona atleta kapablo, kaj nun, kiam mia vivo mem dependis je rapidega kurado, mi ne povas diri, ke mi kuris pli bone ol tiam, kiam mia aĉa bazkurado^[18] elvokis sur min el la spektantaro la raŭkajn kaj riproĉajn kriojn “glaciĉaro” kaj “Voku taksion!”.

La sagotoj rapide proksimiĝis al mi. Precipe danĝera estis unu, pli rapida ol siaj kolegoj, kiu estis timinde proksima. La kanjono fariĝis nura rokoza fendo, krude altiĝanta je kruta deklivo al kio ŝajnis pasejo inter du ambaŭflankaj montopintoj. Kio kuŝis aliaflanke, mi eĉ ne povis diveni—eble apika krutaĵo de centoj da futoj en la valon sur la alia flanko. Ĉu eble mi kuris en senelirejon?

Konstatinte, ke mi ne povus esperi antaŭkuri la sagotojn ĝis la supro de la kanjono, mi decidis riski ĉion je klopodo haltigi ilin provizore, kaj tiucele mi deprenis mian krude faritan arkon kaj eltiris sagon el la fela sagujo, kiu pendis malantaŭ mia ŝultro. Dum mi per la dekstra mano almetis la sagon, mi haltis kaj pivote turniĝis al la goriloviro.

En la mondo de mia naskiĝo mi neniam manipulis sagon, sed ekde nia fuĝo el Futra mi provizis al la grupo malgrandajn ĉasaĵojn per miaj sagoj, kaj tiel, pro neceso, mi ekhavis ne malbonan celkapablon. Dum nia fuĝado el Futra, mi reŝnuris mian pafarkon per peco de fortika intesto prenita el grandega tigro, kiun

Gak kaj mi maltrankviligis kaj fine mortigis per sagoj, lanco kaj glavo. La malmola ligno de la arko estis ekstreme forta, kaj tio, kune kun la fortikeco kaj elasteco de mia nova ŝnuro, donis al mi neordinaran fidon je mia armilo.

Neniam mi bezonis pli stabilajn nervojn ol tiam—neniam estis pli bone regitaj miaj nervoj kaj muskoloj. Mi celis tiel zorge kaj senhaste, kvazaŭ mi alcelus celobjekton el pajlo. La sagoto neniam antaŭe vidis pafarkon, sed evidente lia malsprita intelekto subite ekkomprenis, ke la afero, kiun mi direktas al li estas ia aparato de mortigo, ĉar ankaŭ li ekhaltis, samtempe suprensvingante sian hakileton por ĵeto. Jen unu el la multaj metodoj, per kiuj ili uzas tiun armilon, kaj la celprecizo, kiun ili atingas eĉ en la plej malfavoraj cirkonstancoj estas preskaŭ mirakla.

Mia sago estis altirita en sia plena longeco—mia okulo alcelis ĝian akran pinton sur la maldekstra brusto de mia kontraŭulo; kaj tiam li ĵetis sian sian hakileton, kaj mi ellasis mian sagon. En tiu momento, kiam niaj ĵetaĵoj ekflugis, mi saltis flanken, sed la sagoto impetis antaŭen por sekvi sian atakon per lancoĵeto. Mi sentis la siblon de la hakileto, kiam ĝi preterskrapis mian kapon, kaj sammomente, mia sago trapikis la sovaĝan koron de la sagoto, kaj kun unu sola ĝemo, li ĵetiĝis preskaŭ ĝis miaj piedoj—ŝtone morta.

Proksime malantaŭ li estis du aliaj—eble je kvindek jardoj—sed la distanco donis al mi tempon por ekkapti la ŝildon de la morta gardisto, ĉar mia apenaŭa evito de la hakileto komprenigis al mi, kiel urĝe mi bezonas ĝin. Tiuj, kiujn mi ŝtelis en Futra, ni ne povis kunporti, ĉar ilia grandeco malebligis al ni kaŝi ilin en la maharaj haŭtoj, kiuj nin portis al sekureco ekster la urbo.

Bone metinte la ŝildon sur mian maldekstran brakon, mi elpafis alian sagon, kiu faligis duan sagoton, kaj poste, kiam la hakileto de ties kolego rapidis al mi, mi kaptis ĝin sur la ŝildo, kaj almetis alian sagon por li, sed li ne atendis por ricevi ĝin. Anstataŭ tio, li turniĝis kaj retretis al la amaso da gorilohomoj. Evidente, li jam vidis portempe sufiĉon de mi.

Denove mi ekkuris for, kaj la sagotoj ne ŝajnis tre avidaj daŭrigi la postĉason tiel proksime kiel antaŭe. Neĝenate, mi atingis la supron de la kanjono, kie mi trovis krutan, rokozan abismon profundan je ducent ĝis tricent futoj; sed maldekstre, mallarĝa kornico ĉirkaŭiris la kurbaĵon de la krutaĵosupro. Laŭlonge de ĝi mi iris antaŭen, kaj ĉe abrupta turniĝo, kelkajn jardojn post la fino de la kanjono, la vojo larĝiĝis, kaj maldekstre mi vidis la aperturon de granda kaverno. Antaŭ ĝi

la kornico pluiris, ĝis ĝi eliris el la vidkampo ĉirkaŭ alia elstaraĵo de la monto.

Tie mi sentis, ke mi povus defii armeon, ĉar la malamikoj povus ataki min nur po unu, kaj tiu unu ne povus scii, ke mi atendas lin, ĝis li plene montrus sin, ĉirkaŭirinte vojturniĝon. Ĉirkaŭ mi kuŝis disigitaj ŝtonoj de la krutaĵo, supere. Ili estis de diversaj grandoj kaj formoj, sed sufiĉe multaj havis oportunan grandecon, tiel ke mi povus uzi ilin anstataŭ miaj tre valoraj sagoj. Ariginte plurajn rokojn en amaseton, flanke de la faŭko de la kaverno, mi atendis la atakon de la sagotoj.

Dum mi staris tie, streĉa kaj silenta, atendente la unuan mallaŭtan sonon, kiu indikos la proksimiĝon de miaj malamikoj, eta bruo el la nigra profundo de la kaverno altiris mian atenton. Eble ĝin produktis la moviĝo de la granda korpo de iu bestego leviĝanta de sur la rokoza planko de sia loĝejo. Preskaŭ sammomente, mi kredis aŭdi la skrapon de ledaj sandaloj sur la kornico ĉirkaŭ la vojturniĝo. Dum la postaj kelkaj sekundoj, mia atento estis konsiderinde dividita.

Kaj tiam, el la inkeca nigro je mia dekstra flanko, mi vidis du flamantajn okulojn rigardadi en miajn. Ili situis pli ol du futojn pli alte ol mia kapo. Estas vere eble, ke la besto, kiu ilin posedis, staris sur altaĵo en la kaverno, aŭ ke ĝi eble baŭmis sur la postpiedoj; sed mi jam vidis sufiĉe multajn el la monstroj de Pelucidaro por scii, ke mi nun eble frontas novan kaj timegindan Titanon, kies dimensioj kaj feroco superas tiujn de ĉio antaŭe vidita.

Kio ajn ĝi estis, ĝi malrapide aliris la faŭkon de la kaverno, kaj nun, profundavoĉe kaj fortimige, ĝi eligis malaltan kaj minacan muĝon. Mi ne atendis pli longe por disputi pri la posedo de la kornico kun la kreitaĵo, kiu posedis tiun voĉon. La bruo ne estis laŭta—mi dubas, ĉu la sagotoj eĉ aŭdis ĝin—sed la sugesto pri latentaj eblecoj en ĝi estis sufiĉa, por ke mi sciu, ke ĝi povas deveni nur de enorma kaj feroca bestego.

Dum mi retroiris laŭ la kornico, mi baldaŭ preterpasis la faŭkon de la kaverno, kie mi ne plu povis vidi tiujn flamantajn okulojn, sed momenton poste, mi ekvidis la diablan vizaĝon de sagoto, dum ĝi singarde antaŭeniris, trapasante la turniĝon sur la krutaĵo sur la malproksima flanko de la kaverna faŭko. Kiam la ulo min vidis, li salte alkuris postĉase laŭlonge de la kornico, kaj post li venis tiom da kolegoj de li, kiom povis amasiĝi tuj malantaŭ li. Samtempe, la besto eliris el la kaverno, tiel, ke li kaj la sagotoj alfrontiĝis sur la mallarĝa kornico.

La besto estis enorma kavernurso, minaca per sia kolosa grandegeco, almenaŭ ok futojn alta ĉe la ŝultro, dum de la pinto de ĝia nazo ĝis la fino de ĝia stumpeca vosto ĝi estis plene dek du futojn longa. Kiam ĝi ekvidis la sagotojn, ĝi eligis plej timindan muĝon, kaj kun malfermita buŝo ĝi alsturmis ilin. Kun terurkrio, la plej antaŭa gorilohomo turniĝis por fuĝi, sed li kuris rekte kontraŭ siaj alimpetantaj kolegoj.

La hororo de la sekvantaj sekundoj estas nepriskribebla. La sagoto plej proksima al la kavernurso, trovinte sian forfuĝon barita, turniĝis, kaj intence saltis al terura morto sur la tranĉaj rokoj tricent futojn sube. Tiam, la enormaj makzeloj malfermiĝis kaj kaptis la postan—aŭdiĝis la naŭza sono de krakiĝantaj ostoj, kaj la disŝirita kadavro estis faligita de la rando de la krutaĵo. Kaj la potenca bestego eĉ ne interrompis sian konstantan antaŭeniron laŭ la kornico.

Kriĉantaj sagotoj nun freneze saltis de sur la krutegaĵo por ĝin eskapi, kaj laste, mi vidis ĝin ĉirkaŭiri la turniĝon, ankoraŭ ĉasante la demoralizitan restaĵon de la homĉasantaro. Dum longa tempo mi povis aŭdi la teruran muĝadon de la bestego, miksitan kun la krioj kaj kriĉoj de liaj viktimoj, ĝis la timigaj bruoj fine mallaŭtiĝis kaj malaperis en la malproksimeco.

Poste, mi informiĝis de Gak, kiu finfine atingis siajn tribanoj kaj revenis kun trupo por savi min, ke la *riso*, kiel oni nomas ĝin, postĉasis la sagotojn, ĝis ĝi ekstermis la tutan bandon. Gak estis certa, kompreneble, ke ankaŭ mi iĝis viktimo de la terura kreitaĵo, kiu en Pelucidaro estas vere la reĝo inter bestoj.

Ne volante reiri en la kanjonon, kie mi eble fariĝus predaĵo aŭ de la kavernurso aŭ de la sagotoj, mi antaŭeniris laŭ la kornico, kredante, ke ĉirkaŭirinte la monton, mi povus atingi la landon Sari el alia direkto. Sed mi ŝajne konfuziĝis pro la tordoj kaj turniĝoj de la kanjonoj kaj ravinoj, ĉar mi nek tiam venis al la lando Sari, nek dum longa tempo poste.

Subnoto

[18] ĉe bazopilko, kurado de unu bazo ĝis alia.

14-a ĉapitro EN LA ĜARDENO EDENA

Sen iu ajn orientiĝo el la ĉielo, ne estas mirige, ke mi konfuziĝis kaj perdiĝis en la konfuza labirinto de tiuj vastaj montetoj. Fakte, mi tute trapasis ilin kaj elvenis super la valo ĉe la alia flanko. Mi scias, ke mi vagadis longan tempon, ĝis laca kaj malsata mi trovis malgrandan kavernon sur la supraĵo de la kalkŝtona formacio, kiu anstataŭis la antaŭan granitan.

La kaverno, kiu ekplaĉis al mi, troviĝis en la mezo de la apika flanko de altega krutaĵo. La vojo al ĝi estis tia, ke mi sciis, ke neniuj bestoj povus frekventi ĝin, kaj ĝi ankaŭ ne estis sufiĉe granda por esti komforta loĝejo, krom por la pli malgrandaj mamuloj kaj reptilioj. Tamen, kun la plej granda singardemo mi rampis en ĝian malluman internon.

Tie mi trovis kameron iom grandan, lumigitan de mallarĝa fendo en la roko, supre, kio lasis la sunlumon enfiltriĝi sufiĉe hele por forigi la tutan senlumecon, kiun mi atendis. La kaverno estis tute malplena, kaj mankis signoj de lastatempa loĝateco. La aperturo estis relative malgranda, tiel ke per konsiderinda penado mi sukcesis alporti rokegon el la valo malsupre, kiu tute baris ĝin.

Tiam mi reiris al la valo por preni brakplenon da herbo, kaj dum tiu marŝo mi havis la bonŝancon faligi ortopion, kio estas la malgranda ĉevalo de Pelucidaro, eta besto proksimume tiel granda kiel terhundo, abunda en ĉiuj partoj de la interna mondo. Tiel, kun manĝaĵo kaj litaĵo, mi reiris al mia loĝejo, kie post manĝo de nekuirita viando, al kio mi estis nun jam alkutimiĝinta, mi trenis la rokegon antaŭ la enirejon kaj volve ekkuŝis sur lito el herbo—nuda, pratempa kavernulo, tiel sovaĝe primitiva kiel miaj historiaj prapatroj.

Mi vekiĝis ripozinta, sed malsata, kaj puŝinte la rokegon flanken, mi elrampis sur la etan rokozan kornicon, kiu estis mia kvazaŭa antaŭdoma portiko. Antaŭ mi etendiĝis malgranda, sed bela valo, tra kies centro klara kaj glimbrilanta rivero serpentumis al interna maro, kies blua akvo apenaŭ videbliĝis inter la du

montoĉenoj, kiuj brakumis ĉi tiun etan paradizon. La supraĵoj de la aliflankaj montetoj estis verdaj pro vegetaĵoj, kaj granda arbaro vestis ilin ĝis la bazoj de la ruĝaj, flavaj kaj kuproverdaj altegaj apikaĵoj, kiuj estis iliaj pintoj. La valo mem estis tapiŝita de denskreska herbo, dum tie kaj aliloke areoj kun sovaĝaj floroj estigis grandajn buntomakulojn sur la fona verde.

La fundon de la valo punktis aretoj de palmecaj arboj—plej ofte po tri aŭ kvar. Antilopoj staris sub ili, dum aliaj furaĝis for de la arboj aŭ gracie vagis al proksima transvadejo por trinki. De tiu belega besto estis kelkaj specioj, el kiuj la plej majesta iom similis al la giganta elando de Afriko, escepte de la spiralaj kornoj, kiuj komplete kurbiĝas malantaŭen super la oreloj kaj plu kurbiĝas antaŭen, sube, finiĝante per akraj kaj estiminde grandaj pintoj du futojn antaŭ la vizaĝo kaj super la okuloj. Ilia grandeco memorigis pri tiu de purrasa herforda virbovo, sed ili estis tre lertpaŝaj kaj rapidaj. Pro la larĝaj flavaj strioj sur la malhelkaŝtane koloritaj feloj, mi prenis ilin por zebroj, kiam mi ilin unuafoje vidis. Entute, ili estas admirindaj bestoj, kiuj aldonis perfektigan efekton al la stranga kaj bela pejzaĝo sternita antaŭ mia nova hejmo.

Mi jam decidis fari el la kaverno mian sidejon, kaj uzante ĝin kiel bazon, fari laŭsisteman esploradon de la ĉirkaŭa tereno, serĉante la landon Sari. Unue mi finmanĝis la restaĵon de la kadavro de la ortopio, kiun mi mortigis antaŭ mia lasta dormo. Poste mi kaŝis la Grandan Sekreton en profunda fendo en la malantaŭo de mia kaverno, rulis la rokegon antaŭ mian pordon, kaj kun miaj pafarko, sagoj, glavo kaj ŝildo, mi grimpis malsupren en la pacan valon.

La paŝtantaj gregoj moviĝis flanken, kiam mi ilin trapasis, plej multe la etaj ortopioj, kiuj montris la plej grandan malfidon, galopante ekster danĝeron. Ĉiuj bestoj ĉesis manĝi, kiam mi proksimiĝis, kaj moviĝinte al loko, kie ili sentis sin ekster danĝero, ili staris kaj ekzamenis min per seriozaj okuloj kaj etenditaj oreloj. Unufoje, unu el la maljunaj virantilopoj el la striohava speco malaltigis sian kapon kaj kolere muĝis—eĉ farante kelkajn paŝojn en mia direkto, tiel ke mi kredis lin sturmonta; sed post mia preterpaso, li daŭrigis manĝi, kvazaŭ nenio lin ĝenis.

Ĉe la malsupera ekstremo de la valo mi preterpasis kelkajn tapirojn, kaj trans la rivero mi vidis grandan sadokon, la enorman dukornan praulon de la nuntempa rinocero. Ĉe la fino de la valo, la krutaĵoj maldekstraflankaj pluiris ĝis la maro, tiel, ke por ilin ĉirkaŭpasi kiel mi deziris, necesis suprengrimpi ilin por serĉi kornicon, laŭ kiu mi povus daŭrigi mian vojaĝon. Ĉirkaŭ kvindek futojn de la

bazo, mi atingis elstarajon, kiu prezentis naturan vojon ĉe la fronto de la krutaĵo, kaj mi ĝin sekvis super la maro al la fino de la krutaĵo.

Tie, la elstarajo rapide deklivis al la supro de la krutaĵoj—evidentis, ke la tavolo, kiu formis ĝin, suprenpuŝiĝis tiel krutdeklive, kiam naskiĝis la montoj malantaŭ ĝi. Dum mi zorge grimpis supren laŭ la deklivo, subite tiris mian atenton supren ia stranga siblo, kaj io, kio similis svingegadon de flugiloj.

Kaj je la unua ekrigardo, trafis miajn teruroplenajn okulojn la plej timinda afero, kiun mi iam vidis, eĉ en Pelucidaro. Ĝi estis giganta drako, kian oni bildigas en la legendoj kaj fabeloj de Teraj popoloj. Ĝia grandega korpo estis laŭŝajne kvardek futojn longa, dum la verpertecaj flugiloj, kiuj ŝvebigis ĝin meze de la aero, etendiĝis plenajn tridek futojn. Ĝiaj plene malfermitaj makzeloj estis armitaj per longaj, akraj dentoj, kaj ĝiaj piedoj posedis terurajn ungegojn.

La sibla sono, kiu unue altiris mian atenton, produktiĝis el ĝia gorĝo, kaj ŝajnis esti direktita al io preter kaj sub mi, kion mi ne povis vidi. La elstarajo, sur kiu mi staris, abrupte finiĝis kelkajn paŝojn antaŭe, kaj kiam mi atingis la finon, mi vidis tion, kio kaŭzis la eksciton de la reptilio.

Iam en pasinteca epoko, tertremo kreis terfendon tiuloke, tiel ke antaŭ la loko, kie mi staris, la tertavoloj forglitis dudek futojn suben. Rezulte, la daŭrigo de mia elstarajovojo kuŝis dudek futojn sub mi, kie ĝia fino estis tiel abrupta kiel la fino, kie mi staris.

Kaj tie, laŭŝajne haltigita en sia fuĝo pro la negrimpebla rompiĝo en la elstarajo, staris la atakcelo de la kreitaĵo—junulino timkaŭranta sur la mallarĝa kornico, kun la vizaĝo profundigita en siaj brakoj, kvazaŭ por elfermi el ŝia vidado la timindan morton, kiu ŝvebis tuj super ŝi.

La drako rondflugis pli malalten, kaj ŝajnis pretiĝi por alsagi sian predon. Mi ne povis perdi tempon; estis apenaŭ momento por eĉ pesi miajn ŝancojn kontraŭ la terure armita bestego; sed la vido de tiu timigita junulino sub mi elvokis ĉion plej bonan en mi, kaj mia instinkto protekti la alian sekson, kiu verŝajne egalas la instinkton de memprotekto ĉe la prahomoj, tiris min kiel magneto al la flanko de la junulino.

Preskaŭ sen pensi pri la eblaj sekvoj, mi saltis desur la fino de la elstarajo, sur kiu mi staris, al la eta kornico dudek futojn sube. Sammomente, la drako sagatakis la junulinon, sed mia subita sursceniĝo ŝajne ektimigis ĝin, ĉar ĝi

turniĝis flanken, kaj tiam altiĝis denove super nin.

La bruo, kiun mi faris, alteriĝante ĉe ŝia flanko, konvinkis la junulinon, ke ŝia morto jam alvenis, ĉar ŝi kredis, ke mi estas la drako; sed finfine, kiam neniuj kruelaj dentegoj kroĉiĝis al ŝi, ŝi miroplene levis sian rigardon. Kiam ĝi trafis min, la esprimo, kiu venis en ŝiajn okulojn estus malfacile priskribebla, sed ŝiaj sentoj apenaŭ povis esti pli komplikaj ol miaj propraj—ĉar la larĝaj okuloj, kiuj rigardis en miajn, estis de Dian la Bela.

“Dian!” mi kriis. “Dian! Dank’ al Dio, ke mi alvenis ĝustatempe.”

“Vi?” ŝi flustris, kaj denove kaŝis sian vizaĝon, ne lasante min vidi, ĉu ŝi ĝojas aŭ koleras pri mia veno.

Denove la drako sin ĵetis al ni, kaj tiel rapide, ke mi ne havis tempon demeti mian pafarkon. Mi povis nur kapti ŝtonon kaj ĵetegi ĝin en la fie malbelan vizaĝon de la besto. Refoje, mia celado estis trafa kaj kun siblo de doloro kaj rabio, la reptilio ree turniĝis kaj flugis for.

Nun mi rapide enmetis sagon, por ke mi estu preta ĉe la venonta atako, kaj farante tion, mi rigardis la junulinon, tiel ke mi ŝin surprizis, dum ŝi faris kaŝan ekrigardon al mi; sed ŝi tuj denove kovris sian vizaĝon per la manoj.

“Rigardu min, Dian,” mi petegis. “Ĉu vi ne ĝojas vidi min?”

Ŝi rigardis rekte en miajn okulojn.

“Mi malamas vin,” ŝi diris, kaj kiam mi volis petegi ŝin juste aŭskulti min, ŝi fingromontris trans mian ŝultron. “Venas la tipdaro”, ŝi diris, kaj mi denove turniĝis por fronti la reptilion.

Do jen estis tipdaro. Mi povus esti diveninta. La kruela spurbesto de la maharoj. La delonge malaperinta pterodaktilo de la ekstera mondo. Sed ĉi-foje, mi ĝin atakis per armilo, kiun ĝi neniam antaŭe frontis. Mi elektis mian plej longan sagon, kaj per mia tuta forto mi fleksis la pafarkon, ĝis la pinto de la sago restis sur la polekso de mia maldekstra mano, kaj kiam la granda kreitaĵo pafiĝis al ni, mi pafis rekte al tiu malmola brusto.

Siblante kiel la sekurvalvo de vapormaŝino, la potenca bestego turne kaj torde falis en la maron sube, kun mia sago komplete profundiĝinta en ĝia kadavro. Mi

turniĝis al la junulino. Ŝi preterrigardis min. Evidente ŝi vidis la morton de la tipdaro.

“Dian,” mi diris, “ĉu vi ne diros, ke vi ne bedaŭras, ke mi vin trovis?”

“Mi malamas vin”, estis la sola respondo; sed mi kredis aŭdi malpli da abomeno ol antaŭe—sed eble mi nur imagis ĝin.

“Kial vi malamas min, Dian?” mi demandis, sed ŝi ne respondis al mi.

“Kion vi faras ĉi tie?” mi demandis, “kaj kio okazis al vi de kiam Huĝa vin liberigis de la sagotoj?”

Unue mi kredis, ke ŝi min tute ignoros, sed fine ŝi decidis alie.

“Mi denove forkuris de Jubal la Malbela,” ŝi diris. “Post mia forfuĝo de la sagotoj, mi revojaĝis sola al mia propra lando; sed pro Jubal mi ne kuraĝis eniri la vilaĝojn aŭ sciigi iujn el miaj geamikoj pri mia reveno, pro timo, ke Jubal informiĝos. Post longedaŭra gvatado mi malkovris, ke mia frato ankoraŭ ne revenis, do mi daŭre loĝis en kaverno apud valo, kiun mia popolo malofte frekventas, atendante la tempon, kiam li povos reveni por liberigi min de Jubal.

“Sed fine, unu el la ĉasistoj de Jubal vidis min, dum mi rampis al la kaverno de mia patro por kontroli, ĉu mia frato jam revenis, kaj li faris alarmon, kaj Jubal ekiris post mi. Li ĉasis min jam tra multaj landoj. Li ne povas esti tre malproksime malantaŭ mi nun. Kiam li venos, li vin mortigos kaj reportos min al sia kaverno. Li estis fia viro. Mi iris ĝis la limo de mia povo, kaj ne eblas eskapi,” kaj ŝi senespere rigardis supren al la daŭrigo de la elstarajo dudek futojn super ni.

“Sed li ne havos min,” ŝi subite kriis, kun granda malŝato. “Jen la maro”—ŝi fingromontris preter la randon de la krutaĵo—“kaj la maro havos min anstataŭ Jubal.”

“Sed nun mi havas vin, Dian,” mi kriis; “kaj nek Jubal nek alia vin havos, ĉar vi estas mia,” kaj mi ekkaptis ŝian manon kaj ne levis ĝin super ŝian kapon kaj lasis ĝin fali, por simboli liberigon.

Ŝi leviĝis sur la piedojn, kaj rigardis rekte en miajn okulojn per neflankiĝanta celemo.

“Mi ne kredas vin,” ŝi diris, “ĉar se vi estus sincera, vi estus farinta tion en la kunesto de aliaj, kiuj observus ĝin—tiam mi vere estus via virino; nun estas neniŭ, kiu vidis vin fari ĝin, ĉar vi scias, ke sen observantoj via ago ne ligas min al vi,” kaj ŝi fortiris sian manon de mia kaj forturniĝis.

Mi provis konvinki ŝin, ke mi estas sincera, sed ŝi nur ne povis forgesi la hontigon, kiun mi metis sur ŝin tiun alian fojon.

“Se vi sinceras pri ĉio, kion vi diras, vi havos bonegan okazon por pruvi tion,” ŝi diris, “se Jubal ne kaptos kaj mortigos vin. Mi estas sub via povo, kaj la traktado, kiun vi faros al mi, estos la plej bona pruvo pri viaj intencoj pri mi. Mi ne estas via virino, kaj denove mi diras al vi, ke mi vin malamas, kaj ke mi estus feliĉa neniam revidi vin.”

Dian ja estis malkaŝema. Oni ne povus nei tion. Fakte, mi trovis, ke senartifikeco kaj rektparolo estas tre rimarkebla trajto de la kaverno de Pelucidaro. Fine, mi sugestis, ke ni faru provon atingi mian kavernon, ke ni povus eskapi la serĉantan Jubal, ĉar mi volonte konfesas, ke mi ne tre deziris renkonti la potencan kaj ferocan estulon, pri kies grandega batallerto Dian rakontis al mi, kiam mi unue renkontis ŝin. Estis li, kiu, armita per malgranda tranĉileto, renkontis kaj mortigis kavernurson en luktobatalo. Estis Jubal, kiu je kvindekpaŝa distanco povis ĵeti sian lancon tra la tuta kiraso de sadoko. Estis li, kiu frakasis la kranion de sturmanta dirito per unusola klabobato. Ne, mi ne sopiris renkonti la Malbelulon—kaj estis tute certe, ke mi ne eliros por lin postĉasi; sed rapide la afero pasis el miaj manoj, kiel ofte okazas, ĉar mi renkontis Jubal la Malbelan vizaĝ-al-vizaĝe.

Jen kiel ĝi okazis. Mi estis retrokondukinta Dian laŭ la kornico, per kiu ŝi venis, ĉar mi serĉis vojon, kiu kondukos nin al la supro de la krutaĵo, sciante, ke ni tiam povos transiri al la rando de mia valetto, kie ni certe povus trovi manieron eniri desur la krutaĵosupro. Dum ni antaŭeniris laŭ la kornico, mi donis al Dian precizajn instrukciojn por trovi mian kavernon, pro la ebleco, ke io povus okazi al mi. Mi sciis, ke ŝi estus tute eksterdanĝere kaŝita de postĉaso, atinginte mian loĝejon, kaj la valo provizus al ŝi ampleksan vivtenaĵon.

Multe incitis min ankaŭ ŝia traktado de mi. Mia koro, malĝojis kaj pezis, kaj mi volis ĉagreni ŝin, sugestante, ke io terura povus okazi al mi—fakte, ke mi povus esti mortigita. Sed la efiko estis nula, almenaŭ kiom mi povis percepti. Dian nur skuis siajn belegajn ŝultrojn kaj murmuris ion signifantan, ke oni ne tiel facile

seniĝas je siaj problemoj.

Dum iom da tempo mi restis silenta. Mi estis komplete malesperiĝinta. Komprenu, ke mi dufoje ŝin defendis de atako—la lastan fojon kun risko al mia propra vivo por savi ŝian. Estis nekredeble, ke eĉ idino de la ŝtonepoko povus esti tiel nedankema—tiel senkora—sed eble ŝia koro posedis la atributon de ŝia epoko.

Fine, ni trovis fendiĝon en la krutaĵo, kiu larĝiĝis kaj etendiĝis pro la efiko de akvo verŝiĝanta tra ĝi de la altebenaĵo, kiu etendiĝis kelkajn mejlojn al la ĉefmontaro. Malantaŭ ni kuŝis la larĝa interna maro, kurbiĝanta supren en la senhorizonta malproksimeco kaj kunfandiĝanta kun la bluo de la ĉielo, tiel ke ĝi aspektis ĝuste kvazaŭ la maro returniĝus kaj formus kompletan arkon super ni, malaperante malantaŭ la foraj montoj malantaŭ ni—la stranga kaj mistera aspekto de la pelucidaraj marpejzaĝoj estas nepriskribebla.

Dekstre staris densa arbaro, sed maldekstre la tereno estis maldensa kaj senobstakla ĝis la ekstera rando de la altebenaĵo. Tiudirekte kondukis nia vojo, kaj ni ĵus turniĝis por daŭrigi la iradon, kiam Dian tuŝis mian brakon. Mi turnis min al ŝi, pensante, ke ŝi inaŭguros repaciĝon, sed mi eraris.

“Jubal,” ŝi diris, kaggestante al la arbaro.

Mi rigardis, kaj jen, eliranta el la densa arbaro, venis vere balena viro. Li ŝajnis sep futojn alta, kaj estis same grandproportia. Li estis ankoraŭ tro malproksima, por ke mi distingu liajn trajtojn.

“Kuru,” mi diris al Dian. “Mi kontraŭbatalos lin, ĝis vi estos jam bone ekirinta. Eble mi povos okupi lin, ĝis vi estos tute for,” kaj tiam, sen ekrigardi malantaŭen, mi antaŭeniris por renkonti la Malbelulon. Mi esperis, ke Dian diros al mi ion bonvolan antaŭ ol foriri, ĉar certe ŝi sciis, ke mi iras al la morto pro ŝi; sed ŝi eĉ ne adiaŭis min, kaj kun peza koro mi paŝis tra la florkovrita herbo al mia morto.

Kiam mi venis sufiĉe proksimen al Jubal por rekoni liajn trajtojn, mi ekkomprenis, kiel li gajnis la alnomon Malbelulo. Ŝajne, iu timinda bestego deŝiris unu tutan flankon de lia vizaĝo. Mankis okulo, la nazo, kaj la tuta karno, tiel ke liaj makzeloj kaj tuta dentaro montriĝis kaj ridetis tra la abomena cikatro.

Antaŭe, li eble estis tiel bonaspekta kiel aliaj anoj de lia bela gento, kaj povas

esti, ke la terura rezulto de tiu alfrontiĝo efikis amarige al lia karaktero jam forta kaj bruteca. Kiel ajn, li nun ne estis bela vidaĵo, kaj nun kun vizaĝtrajtoj, aŭ kio restis el tiuj, tordiĝintaj pro kolero je la vido de Dian kun alia viro, estis terure vidi lin—kaj multe pli terure renkonti lin.

Nun li estis ekkurinta, kaj dum li proksimiĝis, li levis sian grandegan lancon, dum mi haltis, kaj metante sagon en mian arkon, mi celis laŭeble senŝancele. Necesis pli longa tempo ol kutime, ĉar mi devas konfesi, ke vidi tiun abomenan viron tordis miajn nervojn tiom, ke miaj genuoj iĝis tute ne firmaj. Kian ŝancon mi havis kontraŭ tiu potenca militisto, kiun eĉ ne timigas la plej sovaĝa kavernurso! Ĉu mi povus esperi venki iun, kiu buĉis la sadokon kaj la diriton propramane! Mi ekstremegis, sed por esti justa al mi mem, mi timis pli pro Dian ol pro mia propra sorto.

Kaj tiam la granda bruto ĵetpafis sian masivan ŝtonpintan lancon, kaj mi levis mian ŝildon por deteni la forton de ĝia terura rapideco. La frapo puŝis min sur la genuojn, sed la ŝildo devojigis la armilon, kaj mi estis nevundita. Jubal nun rapidis al mi kun la sola restanta armilo, kiun li portis—murdaspekta tranĉilo. Li estis tro proksima por preciza sagpafo, sed mi pafis al li dum li venis, sen celi. Mia sago enpikis la karnon de lia femuro, kaŭzante doloran, sed ne senkapabligan vundon. Kaj tiam li min atingis.

Mia lertmoveco pormomente min savis. Mi rapide kaŭrigis min sub lia levita brako, kaj kiam li ĉirkaŭpivotis por denove ataki min, li trovis glavpinton ĉe sia vizaĝo. Kaj momenton poste, li sentis colon aŭ du colojn de ĝi en la muskoloj de sia tranĉilbrako, tiel ke poste li estis iom pli singarda.

Nun estis duelo de strategio—la granda, vila viro manovris por trableĉi mian memgardadon, kie li povus ekuzi siajn enormajn muskolojn, dum mia mensa okupiĝo estis restigi lin je braklonga distanco. Trifoje li sturmis al mi, kaj trifoje mi trafis lian tranĉilbaton sur mian ŝildon. Ĉiufoje, mia glavo trafis lian korpon, unufoje enpenetrante lian pulmon. Nun li estis jam kovrita de sango, kaj la interna sangado kaŭzis paroksismojn de tusado, kiu portis la ruĝan fluaĵon tra la fiaj buŝo kaj nazo, kovrante liajn vizaĝon kaj bruston de sanga ŝaŭmaĵo. Li estis vidaĵo plej malbela, sed li estis malproksima de la morto.

Dum la duelo daŭris, mi komencis havi esperon, ĉar por esti tute malkaŝema, mi ne atendis postvivi la unuan alsturmon de tiu monstra maŝino de neregitaj rabio kaj malamo. Kaj mi kredas, ke Jubal, anstataŭ absolute malestimi min, eksentis

al mi respekton, kaj tiam en lia primitiva menso evidente formuliĝis la penso, ke li finfine renkontis sian superonton kaj frontas sian pereon.

Almenaŭ sole per tiu hipotezo mi povas klarigi lian postan agon, kiu estis kiel lasta provo—ia nereala espero, ke se li ne baldaŭ mortigos min, mi mortigos lin. Ĝi okazis ĉe la kvara alsturmo, kiam, anstataŭ ataki min per sia tranĉilo, li faligis tiun armilon, kaj ekprenante mian glavklingon per ambaŭ manoj, ŝiris tiun armilon el mia teno tiel facile kiel de infano.

Ĵetante ĝin malproksimen al la flanko, li staris senmova dum momenteto, rigardante en mian vizaĝon kun tia terura rikano de malica triumfo, ke mi preskaŭ senkuraĝiĝis—kaj tiam li sin ĵetis al mi, armite nur per siaj manoj. Sed tiu estis la tago, en kiu Jubal lernis pri novaj batalmetodoj. La unuan fojon li vidis pafarkon kaj sagojn, neniam antaŭ tiu duelo li vidis glavon, kaj nun li lernis, kion kapabla homo povas fari per siaj nudaj pugnoj.

Dum li alsturmis min kiel granda urso, mi ekkaŭris sub lia etendita brako, kaj kiam mi ekstaris, mi faris sur lian makzelon tiel trafan baton kiel vi iam ajn vidis. Tiu granda monto de karno baraktis malsupren sur la teron. Li estis tiel mirigita kaj kapturiga, ke li kuŝis kelkajn sekundojn tie, antaŭ ol li provis leviĝi, kaj mi staris super li, preta por doni alian dozon, se li surgenuiĝus.

Fine li ja leviĝis, preskaŭ muĝanta pro rabio kaj honto; sed li ne restis surpieda—mi donis al li trafan baton per la maldekstra pugno sur la pinto de la makzelo, kiu baraktigis lin sur la dorson. Nun Jubal estis jam freneziĝinta pro malamo, ĉar neniu sanmensa homo estus leviĝinta tiom da fojoj kiel li. Denove kaj denove mi baraktigis lin, tiel rapide kiel li povis suprenstumbli, ĝis fine li kuŝis pli longe sur la tero inter batoj, kaj ĉiufoje leviĝis pli malforta ol antaŭe.

Nun lia pulmovundo tre flue sangadis, kaj fine, terura ĉekora bato peze faligis lin surteren, kie li kuŝis tute senmova, kaj iel mi sciis, ke Jubal la Malbelulo neniam plu leviĝos. Sed eĉ rigardante tiun kadavron, kuŝantan tiel severe kaj abomene en la morto, mi ne povis kredi, ke mi sen helpo venkis tiun mortiganton de timindaj bestoj—tiun gigantan ogron de la ŝtonepoko.

Prenante mian glavon, mi apogis min sur ĝi, rigardante la kadavron de mia malamiko, kaj kiam mi pensis pri la batalo, kiun mi ĵus batalis kaj pri mia venko, granda ideo naskiĝis en mia cerbo—rezulte de la venko kaj la propono, kiun Perry faris en la urbo Futra. Se lerteco kaj scienco povis fari iun laŭkompare

pigmean homon la superanto de tiu potenca bruto, kio ne estus plenumeblo de la kolegoj de la bruto, se ili havus la samajn lertecon kaj sciencon. Tuta Pelucidro kuŝus ĉe iliaj piedoj—kaj mi estus ilia reĝo kaj Dian la reĝino.

Dian! Ondeto da dubo traverŝis min. Estis tute laŭ la povoj de Dian, ke ŝi malŝatus min, eĉ se mi estus reĝo. Ŝi certe estis la plej superigema persono, kiun mi iam renkontis—kun la plej konvinka metodo sciigi iun, ke ŝi estas supereca. Nu, mi povus iri al la kaverno kaj diri al ŝi, ke mi mortigis Jubal, kaj tiam ŝi eble sentus pli da favoro al mi, ĉar mi ŝin liberigis de ŝia turmentinto. Mi esperis, ke ŝi facile trovis la kavernon—estus terure, se mi denove ŝin perdus, kaj mi turniĝis por preni miajn ŝildon kaj pafarkon kaj rapide postsekvi ŝin, kiam je mia miro mi trovis ŝin starantan malpli ol dek paŝojn malantaŭ mi.

“Ino!” mi kriis, “kion vi faras ĉi tie? Mi kredis, ke vi iris al la kaverno, kiel mi ordonis al vi.”

Leviĝis ŝia kapo, kaj la rigardo, kiun ŝi donis al mi, forprenis mian tutan majestecon, kaj igis min senti min kiel palacan mastrumhelpanton—se palacoj havas mastrumhelpantojn.

“Kiel vi ordonis al mi!” ŝi kriis, frapante per sia piedeto. “Mi agas laŭ mia volo. Mi estas la filino de reĝo, kaj krome, mi vin malamas.”

Mi estis konsternita—tiel ŝi dankis min post kiam mi savis ŝin de Jubal! Mi turniĝis kaj rigardis la kadavron. “Eble mi savis vin de pli malbona sorto, sinjoro,” mi diris, sed ŝajne Dian ne komprenis tion, ĉar ŝi tute ne ŝajnis rimarki.

“Ni iru al mia kaverno,” mi diris, “Mi estas laca kaj malsata.”

Ŝi sekvis unu paŝon malantaŭ mi, kaj nek unu el ni parolis. Mi estis tro kolera, kaj ŝi ne ŝajnis voli paroli kun ano de pli malalta klaso. Mi estis tutplene kolera, supozinte antaŭe, ke ŝi min rekompencos per ia dankesprimo, ĉar mi sciis, ke eĉ laŭ ŝiaj propraj normoj mi faris tre admirindan aferon, kiam mi mortigis la timindan Jubal en permana batalado.

Sen malfacilaĵoj ni trovis mian loĝejon, kaj tiam mi iris en la valon kaj ŝtonmortigis malgrandan antilopon, kiun mi supentrenis laŭ la kruta deklivo al la malkrutejo antaŭ la aperturo. Ĉi tie ni silente manĝis. Foje mi ekrigardis ŝin, kredante, ke vidi ŝin ŝiri karnon per siaj manoj kaj dentoj kiel sovaĝa besto kaŭzos en mi abomenan sentimenton al ŝi; sed je mia miro, mi trovis, ke ŝi

manĝas same delikate kiel la plej civilizita virino konata al mi, kaj fine mi trovis min gapanta kun stulta ravo al la beleco de ŝiaj fortaj, blankaj dentoj. Tia estas la amo.

Post nia manĝo, ni malsupreniris al la rivero kune kaj lavis niajn manojn kaj vizaĝojn, kaj tiam, ĝissate trinkinte, ni reiris al la kaverno. Senvorte, mi rampis en la plej foran angulon, kaj kunvolviĝinta, mi baldaŭ ekdormis.

Kiam mi vekigis, mi trovis Dian sidantan en la aperturo, elrigardante trans la valon. Dum mi elvenis, ŝi moviĝis flanken por lasi min pasi, sed ne unu vorton ŝi havis por mi. Mi volis malami ŝin, sed mi ne povis. Ĉiufoje, kiam mi ŝin rigardis, io venis en mian gorĝon, kaj mi preskaŭ sufokiĝis. Mi neniam antaŭe amis, sed helpon mi ne bezonis por diagnozi mian kazon—pro amo mi nun akre suferis. Je Dio, kiom mi amis tiun belegan, malŝatan, rave logan praulinon!

Post kiam ni denove manĝis, mi demandis al Dian, ĉu ŝi intencas reiri nun al sia tribo pro la morto de Jubal, sed ŝi malĝoje balancis la kapon kaj diris, ke ŝi ne kuraĝas, ĉar oni ankoraŭ devus konsideri la fraton de Jubal—ties plej aĝan fraton.

“Kiel li rilatas al la afero?” mi demandis. “Ĉu ankaŭ li deziras vin, aŭ ĉu la elektorajto je vi fariĝis familia heredaĵo, donota de generacio al generacio?”

Ŝi ne tute komprenis, kion mi celis diri.

“Estas probable,” ŝi diris, “ke ili ĉiuj volos venĝi la morton de Jubal—ili estas sep—sep teruraj viroj. Eble iu devos mortigi ilin ĉiujn, antaŭ ol mi povos reiri al mia popolo.”

Ekŝajnis, ke mi kontraktis por fari taskon tro grandan por mi—sepoble tro grandan, fakte.

“Ĉu Jubal havis kuzojn?” mi demandis. Preferinde estus scii ĉion plej malbonan komence.

“Jes,” respondis Dian, “sed ili ne gravas—ili ĉiuj havas virinojn. La fratoj de Jubal ne havas virinojn, ĉar Jubal povis akiri neniun por si mem. Li estis tiel malbela, ke la virinojn forkuris de li—kelkaj eĉ ĵetis sin desur la krutaĵoj de Amoz en la Darel Az prefere ol edziniĝi al la Malbelulo.”

“Sed kiel rilatas tio al liaj fratoj—” mi demandis.

“Mi forgesis, ke vi ne estas el Pelucidaro,” diris Dian, kun rigardo kompata, sed samtempe malŝata, kun la malŝato emfazita iom pli ol la cirkonstancoj postulis—kvazaŭ por certigi, ke mi ne preteratentos ĝin. “Komprenu,” ŝi daŭrigis, “pli juna frato ne rajtas alpreni edzinon, ĝis ĉiuj liaj pli aĝaj fratoj tion faris, krom se la pli aĝa frato nuligas sian privilegion, kion Jubal neniam farus, sciante, ke tiel longe kiel li restigos ilin fraŭlaj, ili des pli volonte helpos lin akiri edzinon.”

Rimarkante, ke Dian fariĝas pli komunikema, mi komencis flegi la esperon, ke ŝi eble iom pli ekŝatas min, sed baldaŭ mi eltrovis kiel maldika estis la fadeno, de kiu pendis miaj esperoj.

“Ĉar vi ne povos reiri al Amoz,” mi sugestis, “kio fariĝos el vi, konsiderante, ke vi ne povas esti feliĉa kun mi ĉi tie, ĉar vi tiom malamas min?”

“Mi devos nur toleri vin,” ŝi respondis malvarme, “ĝis vi decidis iri al alia loko kaj lasi min neĝenata; tiam mi tre bone elturniĝos sola.”

Mi rigardis ŝin kun kompleta miro. Ŝajnis nekredeble, ke eĉ prahistoria virino povus esti tiel malvarma kaj senkora kaj nedankema. Tiam mi leviĝis.

“Mi lasos vin *nun*,” mi diris arogante, “Mi jam toleris ĝislime vian nedankemon kaj viajn insultojn,” kaj tiam mi turniĝis kaj paŝis majeste malsupren al la valo. Mi jam faris cent paŝojn en absoluta silento, kiam Dian parolis.

“Mi malamas vin!” ŝi kriis, kaj ŝia voĉo rompiĝis—pro rabio, mi kredis.

Mi komplete malĝojis, sed mi ne iris tre malproksimen, kiam mi ekpensis, ke mi ne povas lasi ŝin sola kaj sen protekto, por ke ŝi ĉasu sian propran manĝaĵon meze de la danĝeroj de tiu sovaĝa mondo. Eble ŝi malamos min kaj insultos min kaj ŝutos unu malhonorigon post la alia sur min, kiel ŝi jam faris, ĝis mi vere ekmalamos ŝin; sed restis la plorinda vero, ke mi ŝin amis kaj ne povus lasi ŝin tie sola.

Ju pli mi pripensis tion, des pli mi koleriĝis, tiel ke kiam mi atingis la valon, mi estis furioza, kaj rezulte de tio, mi retroturniĝis kaj supreniris tiun krutaĵon denove, tiel rapide kiel mi malsupreniris. Mi vidis, ke Dian jam forlasis la kornicon kaj iris en la kavernon, sed mi ĵetis min internen al ŝi. Ŝi kuŝis surventre sur amaso da herboj, kiujn mi kolektis por ŝia lito. Kiam ŝi aŭdis mian

eniron, ŝi saltis sur siajn piedojn kiel tigrino.

“Mi malamas vin!” ŝi kriis.

Veninte el la brila lumo de la tagmeza suno en la duonmallumon de la kaverno, mi ne povis vidi ŝian mienon, kaj mi estis iom kontenta pro tio, ĉar mi malŝatis pensi pri la malamo, kiun mi estus vidinta tie.

Unue mi diris al ŝi nek unu vorton. Mi nur transpaŝis la kaverton kaj kaptis ŝin je la pojn, kaj kiam ŝi luktis, mi ĉirkaŭmetis al ŝi mian brakon, tiel por fiksi ŝiajn manojn ĉe ŝiaj flankoj. Ŝi batalis kiel tigrino, sed per mia libera mano mi retropuŝis ŝian kapon—mi supozas, ke mi subite brutiĝis, ke mi retroiris miliardon da jaroj kaj iĝis vera kavernohomo, kiu prenas sian virinon perforte—kaj tiam mi kisis tiun bela buŝon denove kaj denove.

“Dian,” mi kriis, krude skuante ŝin, “Mi amas vin. Ĉu vi ne komprenas, ke mi amas vin? Ke mi amas vin pli ol ĉion alian en ĉi tiu mondo aŭ en mia? Ke mi havos vin? Ke amo kiel mia ne estas rifuzebla?”

Mi rimarkis, ke nun ŝi tre kviete restas en miaj brakoj, kaj kiam miaj okuloj kutimiĝis al la mallumo, mi vidis, ke ŝi ridetas—kun tre kontenta, feliĉa rideto. Mi miregis. Tiam mi sentis, ke tre mildmove ŝi klopodas liberigi siajn brakojn, kaj mi malkroĉis mian tenon, por ke ŝi povu. Malrapide ili leviĝis kaj envolvis mian kolon, kaj tiam ŝi tiris miajn lipojn al siaj denove kaj tenis ilin tie dum longa tempo. Fine ŝi parolis.

“Kial vi ne ne faris ĉi tion komence, David? Tion mi longe atendis.”

“Kion?” mi kriis. “Vi diris, ke vi malamas min!”

“Ĉu vi atendis, ke mi kuros en viajn brakojn kaj diros, ke mi amas vin, antaŭ ol mi sciis, ke vi amas min?” ŝi demandis.

“Sed konstante mi diris al vi, ke mi amas vin,” mi diris.

“La amo parolas per faroj,” ŝi replikis. “Vi ja povus paroligi vian buŝon laŭplaĉe, sed nun, kiam vi ĵus venis kaj prenis min en viajn brakojn, via koro parolis al mia en la lingvo, kiun komprenas la virina koro. Kia komikulo vi estas, David.”

“Do vi tute ne malamis min, Dian?” mi demandis.

“Mi ĉiam amis vin,” ŝi flustris, “de la unua momento, kiam mi ekvidis vin, kvankam mi ne sciis tion, ĝis kiam vi forbatis Huĝan la Ruzulon kaj tiam rifuzis min.”

“Sed mi ne rifuzis vin, karulino,” mi kriis. “Mi ne konis viajn kutimojn—mi dubas, ĉu eĉ nun mi konas ilin. Ŝajnas nekredeble, ke vi povus tiom insulti min, dum vi amis min dum la tuta tempo.”

“Vi povus esti sciinta,” ŝi diris, “kiam mi ne forkuris de vi, ke mi ne pro malamo restis katenita al vi. Kiam vi batalis kun Jubal, mi povus kuri al la rando de la arbaro, kaj sciiĝinte pri la rezulto de la batalo, tre facile mi povus eviti vin kaj reveni al mia propra popolo.”

“Sed la fratoj—kaj kuzoj—de Jubal,” mi memorigis al ŝi, “kio pri ili?”

Ŝi ridetis kaj kaŝis sian vizaĝon ĉe mia ŝultro.

“Mi devis diri al vi *ion*, David,” ŝi flustris. “Mi devis havi *ian* pretekston por resti apud vi.”

“Vi pekulino!” mi kriis. “Kaj vi kaŭzis al mi tiom da angoro pro nenio!”

“Mi suferis eĉ pli,” ŝi respondis simple, “ĉar mi kredis, ke vi ne amas min, kaj *mi* estas senpova. Mi ne povis veni al vi por postuli, ke vi reciproku mian amon, kiel vi ĵus faris al mi. Kiam vi ĵus foriris, mia tuta espero foriris kun vi. Mi estis senkonsola, terurigita, malĝojega, kaj mia koro ŝiriĝis. Mi ploris, kaj tion mi ne antaŭe faris de post la morto de mia patrino,” kaj nun mi vidis, ke estis malsekeco de larmoj ĉirkaŭ ŝiaj okuloj. Mi mem preskaŭ ekploris, kiam mi pripensis ĉion, kion tiu kompatindulino trasuferis. Senpatrina kaj senprotekta; ĉasata trans sovaĝa, pratempa mondo de tiu fiaspekta viraĉo; elmetita al la atakoj de la sennombraj timindaj enloĝantoj de ĝiaj montoj, ebenaĵoj kaj ĝangaloj—estis miraklo, ke ŝi eĉ travivis ĉion ĉi.

Al mi, ĝi estis revelacio pri la aferoj, kiujn miaj prauloj travivis, por ke la homaro de la ekstera mondo pluvivu. Mi fieriĝis je la penso, ke mi gajnis la amon de tia virino. Kompreneble, ŝi ne povis skribi aŭ legi; ŝi estis neniel kulturita aŭ delikata, kiel vi juĝus kulturitecon kaj delikatecon; sed ŝi estis modelo de ĉio plej inda en virinoj, ĉar ŝi estis bona, kaj kuraĝa, kaj nobla, kaj virta. Kaj ŝi estis ĉio ĉi malgraŭ tio, ke observi ĉi tiujn virtojn kuntrenis suferadon kaj danĝeron kaj eblan morton.

Kiom pli facile estus iri tuj komence al Jubal! Ŝi estus lia laŭleĝa edzino. Ŝi estus la reĝino en sia propra lando—kaj esti reĝino tiom signifis al virino de la ŝtonepoko kiom al hodiaŭa virino; kiel ajn vi rigardas ĝin, temas nur pri relativa gloro, kaj se vivus nur duonnudaj sovaĝuloj en la ekstera mondo hodiaŭ, oni trovas, ke esti la edzino de dahomea ĉefulo estas multe glore.

Mi ne povis ne kompari la faron de Dian kun tiu de unu splenda juna virino, kiun mi konis en Nov-Jorko—splenda por rigardi kaj por konversacii. Ŝi plenkore enamiĝis al unu amiko mia—pura, vireca ulo—sed ŝi edziniĝis al iu kaduka, malbonreputacia, maljuna diboĉulo, ĉar li estis grafo en iu tute eta eŭropa princlando, al kiu la atlaso de Rand McNally eĉ ne atribuis propran koloron.

Jes, mi intense fieris pri Dian.

Post iom da tempo, ni decidis ekiri al Sari, ĉar mi estis avida revidi Perry kaj informiĝi, ĉu li bone fartas. Mi rakontis al Dian pri nia plano emancipi la homaron de Pelucidaro, kaj ŝi tre raviĝis pro ĝi. Ŝi diris, ke se nur revenos Dakor, ŝia frato, li facile povus iĝi la reĝo de Amoz, kaj ke tiam li kaj Gak povus alianciĝi. Tio ebligus al ni impetan starton, ĉar kaj la sarianoj kaj la amozanoj estis tre potencaj triboj. Ni fidis, ke, armitaj per glavoj kaj pafarkoj kaj trejnitaj por uzi ilin, ili povos venki iun ajn tribon, kiu malinklinus aliĝi al la granda armeo de federaciigintaj ŝtatoj, per kiu ni planis marŝi kontraŭ la maharoj.

Mi klarigis la diversajn detrupovajn militilojn, kiujn Perry kaj mi povus konstrui post iom da eksperimentado—pulvon, fusilojn, kanonojn kaj simile, kaj Dian kunfrapis la manojn kaj ĵetis siajn manojn ĉirkaŭ mian kolon kaj diris la mi, kia mirindulo mi estas. Ŝi komencis kredi, ke mi estas ĉiopova, kvankam vere faris nenion krom paroli—sed tiel estas ĉe virinoj, kiuj amas. Perry ŝatis diri, ke se viro estus dekone tiom kapabla, kiom lia edzino aŭ patrino kredas lin, la mondo kuŝus en liaj manoj.

Kiam ni la unuan fojon ekiris al Sari, mi surtretis neston de venenaj vipuroj, antaŭ ol ni atingis la valon. Unu el la malgrandaj pikis min ĉe la maleolo, kaj Dian devigis min reveni al la kaverno. Ŝi ordonis, ke mi ne ekzercu la muskolojn, ĉar tio povus esti mortiga—ŝi diris, ke se min pikus plenkreska serpento, mi ne moviĝus eĉ unu paŝon for de la nesto—mi estus mortinta surpiede starante—tiel mortiga estas la veneno. Sed kiel okazis, mi estis senkapabligita dum longa tempo, kvankam la kataplasmoj, kiujn Dian faris el herboj kaj folioj, fine reduktis la ŝveladon kaj eltiris la venenon.

La epizodo tamen montriĝis tre bonŝanca, ĉar ĝi donis al mi ideon, kiu miloble plivalorigis miajn sagojn kiel armilojn de atako kaj defendo. Tuj kiam mi denove kapablis eliri, mi serĉis kelkajn plenkreskajn vipurojn de la speco, kiu pikis min, kaj mortiginte ilin, mi eltiris de ili la venenon kaj ŝmiris ĝin sur la pintojn de kelkaj sagoj. Pli poste mi pafis hienodonon per unu el tiuj, kaj kvankam mia sago kaŭzis nur supraĵan vundon, la besto falis morta preskaŭ tuj post la trafo.

Ni nun reekiris al la lando de la sarianoj, kaj kun sentoj de sincera bedaŭro ni adiaŭis nian belan ĝardenon Edenan, en kies relativaj paco kaj harmonio ni travivis la plej feliĉajn momentojn de nia vivo. Kiel longe ni estis tie, mi ne scias, ĉar kiel mi diris al vi, la tempo ĉesis ekzisti por mi sub tiu eterne tagmeza suno—eble estis unu horo, aŭ eble monato da surtera tempo—mi ne scias.

15-a ĉapitro

REIRO AL LA TERO

Ni transiris la riveron kaj trapasis la montojn trans ĝi, kaj fine ni eliris sur grandan kaj platan ebenaĵon, kiu disetendiĝis ĝis la limo de la vidpovo. Mi ne povus diri al vi, en kiu direkto ĝi etendiĝis, eĉ se vi volus scii tion, ĉar dum mia tuta restado en Pelucidaro mi neniam eltrovis aliajn ol surlokajn rimedojn por indiki direkton—estas nek nordo nek sudo nek oriento nek okcidento. *Supren* estas la sola bone difinita direkto, kaj tio, kompreneble, estas *malsupren* por vi sur la ekstera krusto de la Tero. Ĉar la suno nek leviĝas nek subiras, mankas ĉia rimedo por indiki direkton krom videblaĵoj kiel altaj montoj, arbaroj, lagoj kaj maroj.

La ebenaĵo, kiu kuŝas post la blankaj klifoj borde de la Darel Az ĉe la bordo plej proksima al la Montoj de la Nuboj, estas la afero plej analoga al direkto konata al la pelucidaranoj. Se oni eventuale neniam aŭdis pri la Darel Az, aŭ la blankaj klifoj, aŭ la Montoj de la Nuboj, oni sentas la mankon de io grava kaj sopiras al la familiaraj kaj kompreneblaj “nord-oriento” kaj “sud-okcidento” de la ekstera mondo.

Ni apenaŭ ĵus surpaŝis la grandan ebenaĵon, kiam ni perceptis du enormajn bestojn, kiuj proksimiĝas al ni el la malproksimo. Tiel malproksimaj ili estis, ke oni ne povis distingi, kiaj bestoj ili estis, sed kiam ili pliproksimiĝis, mi vidis, ke ili estas enormaj kvarpieduloj, inter 80 kaj 100 futojn longaj, kun etaj kapoj sidantaj supre de la tre longa koloj. Iliaj kapoj ŝajnis esti 40 futojn super la tero. La bestoj tre malrapide moviĝis—tio signifas, ke iliaj korpaj moviĝoj estis tre malrapidaj—sed iliaj paŝoj estis tiel longdistancaj, ke ili fakte iris signife pli rapide ol homo.

Kiam ili ankoraŭ pli proksimiĝis, ni eltrovis, ke sur la dorso de ambaŭ sidas homo. Tiam Dian sciis, pri kiu besto temas, kvankam ŝi neniam antaŭe vidis tiajn.

“Ili estas lidioj el la lando de la torianoj”, ŝi kriis. “Toria kuŝas ĉe la periferio de la Terura Ombrolando. Nur la torianoj inter la gentoj de Pelucidaro rajdas lidiojn, ĉar ili troviĝas en neniu lando krom la malluma.”

“Kio estas la Terura Ombrolando?” mi demandis.

“Ĝi estas la lando, kiu kuŝas sub la Morta Mondo”, respondis Dian; “la Morta Mondo, kiu porĉiame pendas inter la suno kaj Pelucidaro super la Terura Ombrolando. Estas la Morta Mondo, kiu faras la grandan ombron sur tiu parto de Pelucidaro.”

Mi ne plene komprenis kion ŝi diras, kaj mi dubas, ĉu eĉ nun mi komprenas, ĉar mi neniam estis en tiu parto de Pelucidaro, de kiu videblas la Morta Mondo; sed Perry diras, ke ĝi estas la luno de Pelucidaro—planedeto interne de planedo—kaj ke ĝi ĉirkaŭiras la akson de la Tero koincide kun la rotacio de la Tero, kaj tial ĝi troviĝas ĉiam super la sama loko en Pelucidaro.

Mi memoras, ke Perry tre ekscitiĝis, kiam mi rakontis al li pri tiu Morta Mondo, ĉar li opiniis, ke ĝi estas la kaŭzo de la ĝis tiam neklarigeblaj fenomenoj de nutacio kaj precesio de la ekvinoksoj.

Kiam la du homoj sur la lidioj estis tre proksimaj al ni, ni vidis, ke unu estas viro kaj la alia virino. La unua levis siajn du manojn kun la polmoj direktitaj al ni, signante per tio pacdeziron, kaj mi jam respondis sammaniere al li, kiam li subite eligis krion de miro kaj plezuro, kaj glitinte desur sia granda rajdbesto, li kuris antaŭen al Dian kaj ĵetis siajn brakojn ĉirkaŭ ŝin.

Post momento mi estis blanka pro ĵaluzo, sed nur dum momento, ĉar Dian rapide tiris la viron al mi, dirante al li, ke mi estas David, ŝia edzo.

“Kaj jen mia frato, Dakor la Fortulo, David”, ŝi diris al mi.

Ŝajnis, ke la virino estas la edzino de Dakor. Li trovis neniun, kiun li ŝatis, inter la sarianoj, nek en aliaj lokoj, ĝis li atingis la landon de la torianoj, kaj tie li trovis kaj batalakiris sian tre belegan torian junulinon, kiun li ĝuste nun venigis al sia propra popolo.

Kiam ili aŭdis nian historion kaj niajn planojn, ili decidis akompani nin al Sari, por ke Dakor kaj Gak faru interkonsenton pri alianco, ĉar Dakor estis same tiel entuziasma pri la proponita ekstermo de la maharoj kaj sagotoj kiel Dian kaj mi.

Post vojaĝo, kiu estis laŭ pelucidaraj normoj tre seneventa, ni venis al la unua el la sariaj vilaĝoj, kiu konsistas el cent ĝis ducent artefaritaj grotoj elkavigitaj en la faco de granda kreta krutaĵo. Tie, je nia grandega ĝojo, ni trovis kaj Perry kaj Gak. La maljunulo estis tute superfortita de emocio, kiam li vidis nin, ĉar li delonge kredis min mortinta.

Kiam mi prezentis Dian kiel mian edzinon, li ne sciis ĝuste kion diri, sed li pli poste rimarkis, ke havinte la elekton en du mondoj, mi ne povus pli bone trafi.

Gak kaj Dakor intertrakte atingis tre amikan aranĝon, kaj ĉe interkonsiliĝo de la ĉefoj de la diversaj triboj de sarianoj oni faris portempan interkonsenton pri la ebla estonta regadsistemo. Proksimume dirite, la diversaj reĝlandoj de Pelucidaro restus preskaŭ sendependaj, sed estus unu granda superreganto aŭ imperiestro. Oni decidis, ke mi estu la unua el la dinastio de la imperiestroj de Pelucidaro.

Ni komencis instrui al la virinoj la faradon de pafarkoj kaj sagoj kaj venenujoj. La junaj viroj serĉis la vipurojn, kiuj provizis la venenon, kaj ili estis tiuj, kiuj minis la ferercon kaj laŭ la instrukcioj de Perry fabrikis la glavojn. Rapide disvastiĝis la febro de unu tribo al alia, ĝis reprezentantoj el nacioj tiel malproksimaj, ke la sarianoj neniam eĉ aŭdis pri ili, venis por ĵuri la ĵuron de lojaleco, kiun ni postulis, kaj por lerni la arton fabrikii la novajn armilojn kaj uzi ilin.

Ni dissendis niajn junajn virojn kiel instrukciistojn al ĉiu nacio de la federacio, kaj la movado jam akiris kolosajn proporciojn, antaŭ ol la maharoj malkovris ĝin. La unua eksuspekto, kiun ili ekhavis, venis post la ekstermo en rapida sinsekvo de tri el iliaj grandaj sklavkaravanoj. Ili ne povis kompreni, ke la malaltaj klasoj subite ekhavis potencon, kiu faris ilin vere timindaj.

En unu el la bataletoj kun sklavkaravanoj kelkaj el niaj sarianoj prenis plurajn sagotajn kaptitojn, kaj inter ili estis du anoj de la gardistaro interne de la konstruaĵo, en kiu oni tenis nin malliberigitaj en Futra. Ili diris al ni, ke la maharoj estis frenezaj pro rabio, kiam ili eltrovis, kio okazis en la kelo de la konstruaĵo. La sagotoj sciis, ke io tre terura trafis iliajn mastrojn, sed la maharoj zorge klopodis, por ke neniu sugesto pri la vera naturo de ilia pereiga afliko sciiĝu ekster la propra specio. Kiom da tempo necesos por ke la specio forpereu, oni tute ne povus eĉ diveni; sed ŝajnis neeviteble, ke tio finfine okazu.

La maharoj oferis fabelan rekompencan al tiu, kiu kaptus unu el ni viva, kaj samtempe minacis suferigi la plej timindan punon al tiu, kiu farus fizikan malbonon al ni. La sagotoj ne povis kompreni tiujn ŝajne paradoksajn instrukciojn, kvankam ilia kialo estis sufiĉe komprenebla al mi. La maharoj deziris la Grandan Sekreton kaj ili sciis, ke nur ni povus havigi ĝin al ili.

La eksperimentoj de Perry pri la fabrikado de pulvo kaj la konstruo de fusiloj ne progresis tiel rapide kiel ni esperis—multege da aferoj pri tiuj du artoj Perry ne sciis. Ni ambaŭ certis, ke la solvo de tiuj du problemoj progresigus la civilizon interne de Pelucidaro je miloj da jaroj en unu antaŭensalto. Kaj estis diversaj aliaj artoj kaj sciencoj, kiujn ni deziris enkonduki, sed niaj komunaj scioj ne ampleksis la meĥanikajn detalojn, kiuj solaj povas doni al ili komercan aŭ praktikan valoron.

“David”, diris Perry tuj post sia plej lasta malsukceso produkti pulvon, kiu eĉ brulus, “unu el ni devos reveturi al la ekstera mondo kaj reporti la informojn, kiuj mankas al ni. Ĉi tie ni havas la laboristojn kaj materialojn por reprodukti ion ajn, kion oni iam produktis supre—ni malhavas nur la necesan scion. Ni reveturu kaj kunprenu tiun scion en la formo de libroj—tiam tiu ĉi mondo vere kuŝos en niaj manoj”.

Kaj tial oni decidis, ke mi reveturu en la borveturilo, kiu ankoraŭ kuŝis ĉe la rando de la arbaro, tie, kie ni unue penetris ĝis la supraĵo de la interna mondo. Dian rifuzis eĉ aŭskulti iun planon pri mia foriro, kiu ne inkluzivas ŝin, kaj mi ne bedaŭris, ke ŝi volas akompani min, ĉar mi deziris, ke ŝi vidu mian mondon, kaj mi deziris, ke mia mondo vidu ŝin.

Kun granda eskorto ni marŝis al la granda fera talpo, kiun Perry baldaŭ jam repoziciigis kun ĝia nazo redirektita al la ekstera krusto. Li zorge ekzamenis la tutan mekanismon. Li replenigis la aer-rezervujon kaj produktis oleon por la motoro. Finfine ĉio pretis, kiam niaj pikedanoj, el kiuj longa, maldika vico ĉiam ĉirkaŭis nian kampadejon, informis, ke granda amaso da laŭŝajne sagotoj kaj maharoj proksimiĝas el la direkto de Futra.

Dian kaj mi pretis ekiri, sed mi estis avida spekti la unuan alfrontiĝon inter du ne malgrandaj armeoj de la sin kontraŭantaj specioj de Pelucidaro. Mi komprenis, ke tio markos la historian komencon de enorma lukto por la posedo de tuta mondo, kaj kiel la unua imperiestro de Pelucidaro, mi kredis, ke estas ne nur mia devo, sed ankaŭ mia rajto esti en la mezo de tiu decida batalo.

Dum la kontraŭa armeo proksimiĝis, ni vidis, ke estas multaj maharoj kun la sagotaj soldatoj—indiko pri la vastetenda graveco, kiun la dominanta specio atribuis al la rezulto de tiu kampanjo, ĉar ne estis ilia kutimo aktive partopreni la sklavkaptajn atakojn, kiujn faris iliaj servobestoj—la sola speco de milito, kiun ili faris kontraŭ la malaltaj estaĵoj.

Gak kaj Dakor estis ambaŭ kun ni, veninte antaŭ ĉio por vidi la borveturilon. Mi metis Gak kaj kelkajn el liaj sarianoj ĉe la dekstra flanko de nia batallinio. Dakor enlokiĝis maldekstraflanke, dum mi komandis la centron. Malantaŭ ni mi postenigis sufiĉe grandan rezervon sub unu el la ĉefoj de Gak. La sagotoj senhalte antaŭenmarŝis kun minacaj lancoj, kaj mi lasis ilin veni, ĝis ili estis facile atingeblaj per pafarko, antaŭ ol mi ordonis pafi.

Je la unua salvo de venenpintaj sagoj, la unua linio de gorilohomoj falis teren; sed la malantaŭuloj atakis super la sternitaj figuroj de iliaj kamaradoj en furioze rapida atako por povi trafi nin per siaj lancoj. Dua salvo haltigis ilin dum momento, kaj tiam mia rezervo saltis tra la breĉoj en la paflinio por kontraŭbatali ilin per lancoj kaj ŝildoj.

La ne oportunaj lancoj de la sagotoj ne estis egalaj al la lancoj de la sarianoj kaj amozanoj, kiuj flankenigis la lancpuŝojn per siaj ŝildoj kaj impetis proksimen por batali per siaj pli malpezaj kaj oportunaj armiloj.

Gak kunprenis siajn sagpafistojn laŭlonge de la flanklinio de la malamiko, kaj dum la glavistoj kontraŭbatalis ilin antaŭe, li elĵetigis salvon post salvo en ilian neŝirmitan maldekstran flankon. La maharoj faris malmulte da vera batalado kaj pli ĝenis ol helpis, kvankam foje unu el ili ekkaptis per siaj potencaj makzeloj la brakon aŭ kruron de sariano.

La batalo ne daŭris tre longe, ĉar kiam Dakor kaj mi kondukis niajn trupojn al la dekstra flanko de la sagotoj kun nudaj glavoj, ili estis jam tiel demoralizitaj, ke ili turniĝis kaj fuĝis de ni. Ni ĉasis ilin dum iom da tempo, prenante multajn kaptitojn kaj regajnante ĉirkaŭ cent sklavojn, inter kiuj estis Huĝa la Ruza.

Li diris al mi, ke oni kaptis lin, dum li estis survoje al sia propra lando; sed ke lian vivon oni indulgis pro la espero, ke de li la maharoj lernos la kaŝlokon de sia Granda Sekreto. Gak kaj mi havis inklinon kredi, ke la Ruzulo gvidis tiun ekspedicion al la lando Sari, pri kiu li kredis, ke tie oni povus trovi la libron en la posedo de Perry; sed ni ne havis pruvon pri tio, do ni akceptis lin kaj traktis lin

kiel unu el ni, kvankam neniu ŝatis lin. Kaj kiel li rekompencis mian grandanimecon, vi baldaŭ sciiĝos.

Estis kelkaj maharoj inter niaj kaptitoj, kaj niaj propraj homoj tiom timis ilin, ke ili rifuzis proksimiĝi al ili, krom se komplete kovritaj per peco de felo. Eĉ Dian kredis je la popola superstiĉo pri la malbonaj efikoj de elmetiĝo al la okuloj de koleraj maharoj, kaj kvankam mi priridis ŝiajn timojn, mi tute pretis toleri ilin, se tio eĉ iomete forigus ŝiajn malbonajn antaŭsentojn, do ŝi sidis fore de la borveturilo, apud kiu la maharoj estis katenitaj, dum Perry kaj mi denove ekzamenis ĉiun eron de la mekanismo.

Fine, mi alprenis mian lokon en la stirseĝo kaj alvokis iun el la viroj ekstere, por ke li venigu Dian. Okazis, ke Huĝa staris tute proksima al la pordo de la borveturilo, do estis li, kiu sen mia scio iris por venigi ŝin; sed kiel li sukcesis plenumi la diablan aferon, kiun li faris, mi ne povas diveni, krom se aliaj helpis lin en la komploto. Kaj tion mi ne povas kredi, ĉar ĉiuj miaj homoj estis lojalaj al mi kaj tuj mortigus lin, se li estus proponinta la senkoran intrigon, eĉ se li havus tempon por konigi ĝin al aliulo. Ĉio estis farita tiel rapide, ke mi povas kredi nur, ke ĝi estis la rezulto de subita impulso, helpita de kelkaj por Huĝa bonŝancaj cirkonstancoj okazintaj akurate je la ĝusta momento.

Mi scias nur, ke estis Huĝa, kiu portis Dian al la borveturilo, ankoraŭ envolvitan de la kapo ĝis la piedo en la felo de enorma kavernleono, kiu kovris ŝin, de kiam oni kondukis la maharajn kaptitojn en la kampadejon. Li metis sian ŝarĝon sur la seĝon flanke de mi. Mi estis preta ekveturi. La adiaŭoj estis diritaj. Perry kaptis mian manon por la lasta, longa adiaŭo. Mi fermis kaj riglis la eksteran kaj internan pordojn, denove eksidis ĉe la vetura mekanismo, kaj ektiris la startigilon.

Kiel antaŭe, dum tiu nokto longe pasinta, en kiu okazis nia unua elprovo de la fera monstro, estis terura muĝado sub ni—la giganta framo tremis kaj vibris—okazis ekbruego, kiam la malfirma grundo ekĵetiĝis supren tra la kavaĵo inter la interna kaj ekstera blendoj kaj redeponiĝis malantaŭ ni. Duan fojon la maŝino ekveturis.

Sed en la momento de la forveturo mi preskaŭ ĵetiĝis el mia seĝo pro la subita skuiĝo de la borveturilo. Komence mi ne sciis, kio okazis, sed baldaŭ mi ekkomprenis, ke tuj antaŭ ol ĝi eniris la terkruston, la tureca maŝino trafalis tra sia apoga skafaldo, kaj ke anstataŭ eniri la teron vertikale, ni plonĝas en ĝin je

alia angulo. En kiu loko ni eliros sur la ekstera terkrusto, mi ne povis eĉ konjekti. Kaj tiam mi turniĝis por konstati la efikon de tiu stranga sperto ĉe Dian. Ŝi ankoraŭ sidis vualita en la granda felo.

“Montru vin,” mi kriis ridetante, “venu el via ŝelo. Neniu maharaj okuloj povas atingi vin ĉi tie,” kaj mi klinis min tien kaj ekkaptis de ŝi la leonan felon. Kaj tiam mi retiriĝis sur mian seĝon, tute hororigita.

La afero sub la felo ne estis Dian—ĝi estis abomeninda maharo. Tuj mi komprenis la ruzon, kiun Huĝa uzis kontraŭ mi, kaj ĝian celon. Foriginte min porĉiame, kiel li sendube kredis, Dian estus senhelpa kontraŭ li. Furioze mi tiris je la stirilo, penante returni la borveturilon al Pelucidaro; sed kiel tiun alian fojon, mi povis moveti ĝin eĉ ne unu harlarĝon.

Ne necesas rakonti pri la teruraĵoj aŭ la tedeco de tiu vojaĝo. Ĝi diferencis tute malmulte de la antaŭa, kiu portis nin de la ekstera al la interna mondo. Pro la angulo, je kiu ni eniris la teron, la vojaĝo daŭris preskaŭ unu tagon pli longe kaj elportis min sur la sablojn de la Saharo, anstataŭ al Usono, kiel mi esperis.

Jam de monatoj mi atendas ĉi tie la alvenon de blankulo. Mi ne kuraĝis forlasi la borveturilon, pro timo, ke mi neniam plu povos trovi ĝin—la moviĝantaj sabloj de la dezerto baldaŭ kovrus ĝin, kaj mia sola espero pri reveno al mia Dian kaj ŝia Pelucidaro estus por ĉiam for.

Ke mi iam revidos ŝin, ŝajnas nur malgranda ebleco, ĉar kiel mi sciu, en kiu parto de Pelucidaro mia revena vojaĝo finiĝos—kaj kiel, sen nordo aŭ sudo aŭ oriento aŭ okcidento, mi esperu iam trovi la vojon trans tiu vasta mondo al la loketo, kie restas mia perdita amatino kaj funebras pro mi?

Jen la historio, kiel David Innes rakontis ĝin al mi en la kaprofela tendo ĉe la rando de la granda Sahara Dezerto. La venontan tagon, li gvidis min por vidi la borveturilon—ĝi estis precize tia, kia li priskribis ĝin. Ĝi estis tiel grandega, ke ĝi povus esti transportita al tiu malfacile alirebla mondoparto per neniu transportrimedo, kiu ekzistis tie—ĝi povus esti veninta nur tiel, kiel David Innes diris—tra la kruston de la Tero el la interna mondo Pelucidaro.

Mi pasigis semajnon kun li, kaj tiam, forlasinte mian leonĉasadon, reveturis rekte al la marbordo kaj rapidis al Londono, kie mi aĉetis grandan kvanton da aĵoj, kiujn li deziris kunporti kun si al Pelucidaro. Estis libroj, fusiloj, revolveroj, pafaĵoj, fotiloj, kemiaĵoj, telefonoj, telegrafiloj, drato, iloj kaj pliaj libroj—libroj pri ĉiu temo sub la suno. Li diris, ke li deziras libron, per kiu ili povos reprodukti la mirindaĵojn de la dudeka jarcento en la ŝtonepoko, kaj se kvanto gravas, mi bone priservis lin.

Mi reportis la aferojn mem al Alĝerio, kaj akompanis ilin ĝis la fino de la fervojo; sed de tie mi estis revokita al Usono pro gravaj aferoj. Tamen, mi povis dungi tre fidindan viron por ekestri la karavanon—la saman gvidiston, fakte, kiu akompanis min dum mia antaŭa vojaĝo en la Saharon—kaj skribinte longan leteron al Innes, en kiu mi donis mian usonan adreson, mi vidis la ekspedicion ekvoji suden.

Inter la aliaj aferoj, kiujn mi sendis al Innes, troviĝis pli ol kvincent mejlojn da duobla, izolita drato de tre maldika dikeco. Mi pakigis ĝin ĉirkaŭ speciala bobeno je lia propono, ĉar estis lia ideo, ke li povus fiksi unu finon ĉi tie antaŭ ol foriri, kaj ellasante ĝin tra la malantaŭo de la borveturilo, krei telegraflineon inter la ekstera kaj interna mondoj. En mia letero, mi petis lin nepre marki la finon de la linio tre klare per alta ŝtonamaso por la okazo, ke mi ne povus atingi lin antaŭ ol li ekveturus, por ke mi facile trovu ĝin kaj komunikiĝu kun li, se okazos, ke li bonŝance atingos Pelucidaron.

Mi ricevis kelkajn leterojn de li post mia reveno al Usono—fakte, li utiligis ĉiun al la nordo irantan karavanon por doni al mi ian mesaĝon. Lia lasta letero estis skribita la tagon antaŭ ol li intencis ekveturi. Jen ĝi:

Mia kara amiko:

Morgaŭ mi ekveturos por serĉi Pelucidaron kaj Dian. Kondiĉe, ke la araboj ne mortigos min. Ili kondukis tre malamike lastatempe. Mi ne scias la kaŭzon, sed en du okazoj ili minacis mian vivon. Unu, pli amika ol la ceteraj, diris al mi hodiaŭ, ke ili intencas ataki min ĉi nokte. Estus bedaŭrinde, se tiuspeca afero okazus nun, kiam mi estas tiel baldaŭ forveturonta.

Tamen, eble estus egale bone, ĉar ju pli proskimiĝas la horo, des pli malgrandaj ŝajnas miaj ŝancoj sukcesi.

Alvenis la amika arabo, kiu portos ĉi tiun leteron norden por mi, do adiaŭ, kaj Dio benu vin pro viaj komplezoj al mi.

La arabo diras, ke mi rapidu, ĉar li vidas sablonubon sude—li kredas, ke ĝi estas la bando, kiu venas por murdi min, kaj li ne deziras esti trovita kun mi. Do adiaŭ denove.

Via David Innes

Post unu jaro mi denove troviĝis ĉe la fino de la fervoja linio, veturanta al la loko, kie mi forlasis Innes. Mia unua seniluziigo okazis, kiam mi eksciis, ke mia maljuna gvidisto mortis kelkajn semajnojn antaŭ mia reveno, kaj mi povis trovi neniun alian membron de mia iama grupo, kiu povus konduki min al la sama loko.

Dum monatoj mi traserĉis tiun brulvarman landon, pridemandante sennombrajn dezertajn ŝejkojn, esperante, ke finfine mi trovus unu, kiu aŭdis pri Innes kaj lia mirinda fera talpo. Konstante miajn okuloj esploris la blindigan amason da sablo por ekvidi la ŝtonamason, sub kiu mi trovus la dratojn irantajn al Pelucidaro— sed ĉiam mi malsukcesis.

Kaj ĉiam molestas min ĉi tiuj terurigaj demandoj, kiam mi pensas pri David Innes kaj liaj strangaj aventuroj.

Ĉu finfine la araboj murdis lin tuj antaŭ lia ekveturo? Aŭ ĉu li redirektis la nazon de sia fera monstro al la interna mondo? Ĉu li atingis ĝin, aŭ ĉu li kuŝas ie enterigita en la mezo de la granda terkrusto? Kaj se li revenis al Pelucidaro, ĉu li trapenetris ĉe la fundo de unu el ĝiaj grandaj internaj maroj aŭ inter iu sovaĝa popolo tute malproksime de la lando de lia korsopiro?

Ĉu la respondo kuŝas ie sur la sino de la vasta Saharo, ĉe la fino de du etaj dratoj, kaŝitaj sub perdita ŝtonamaso? Mi scivolas.

Fino

End of Project Gutenberg's Ce la koro de la tero, by Edgar Rice Burroughs

*** END OF THIS PROJECT GUTENBERG EBOOK CE LA KORO DE LA TERO ***

***** This file should be named 20802-h.htm or 20802-h.zip *****
This and all associated files of various formats will be found in:
<http://www.gutenberg.org/2/0/8/0/20802/>

Updated editions will replace the previous one--the old editions will be renamed.

Creating the works from public domain print editions means that no one owns a United States copyright in these works, so the Foundation (and you!) can copy and distribute it in the United States without permission and without paying copyright royalties. Special rules, set forth in the

General Terms of Use part of this license, apply to copying and distributing Project Gutenberg-tm electronic works to protect the PROJECT GUTENBERG-tm concept and trademark. Project Gutenberg is a registered trademark, and may not be used if you charge for the eBooks, unless you receive specific permission. If you do not charge anything for copies of this eBook, complying with the rules is very easy. You may use this eBook for nearly any purpose such as creation of derivative works, reports, performances and research. They may be modified and printed and given away--you may do practically ANYTHING with public domain eBooks. Redistribution is subject to the trademark license, especially commercial redistribution.

*** START: FULL LICENSE ***

THE FULL PROJECT GUTENBERG LICENSE
PLEASE READ THIS BEFORE YOU DISTRIBUTE OR USE THIS WORK

To protect the Project Gutenberg-tm mission of promoting the free distribution of electronic works, by using or distributing this work (or any other work associated in any way with the phrase "Project Gutenberg"), you agree to comply with all the terms of the Full Project Gutenberg-tm License (available with this file or online at <http://www.gutenberg.org/license>).

Section 1. General Terms of Use and Redistributing Project Gutenberg-tm electronic works

1.A. By reading or using any part of this Project Gutenberg-tm electronic work, you indicate that you have read, understand, agree to and accept all the terms of this license and intellectual property (trademark/copyright) agreement. If you do not agree to abide by all the terms of this agreement, you must cease using and return or destroy all copies of Project Gutenberg-tm electronic works in your possession. If you paid a fee for obtaining a copy of or access to a Project Gutenberg-tm electronic work and you do not agree to be bound by the terms of this agreement, you may obtain a refund from the person or entity to whom you paid the fee as set forth in paragraph 1.E.8.

1.B. "Project Gutenberg" is a registered trademark. It may only be used on or associated in any way with an electronic work by people who agree to be bound by the terms of this agreement. There are a few things that you can do with most Project Gutenberg-tm electronic works even without complying with the full terms of this agreement. See paragraph 1.C below. There are a lot of things you can do with Project Gutenberg-tm electronic works if you follow the terms of this agreement and help preserve free future access to Project Gutenberg-tm electronic works. See paragraph 1.E below.

1.C. The Project Gutenberg Literary Archive Foundation ("the Foundation" or PGLAF), owns a compilation copyright in the collection of Project Gutenberg-tm electronic works. Nearly all the individual works in the collection are in the public domain in the United States. If an individual work is in the public domain in the United States and you are located in the United States, we do not claim a right to prevent you from copying, distributing, performing, displaying or creating derivative works based on the work as long as all references to Project Gutenberg are removed. Of course, we hope that you will support the Project Gutenberg-tm mission of promoting free access to electronic works by freely sharing Project Gutenberg-tm works in compliance with the terms of this agreement for keeping the Project Gutenberg-tm name associated with the work. You can easily comply with the terms of this agreement by

keeping this work in the same format with its attached full Project Gutenberg-tm License when you share it without charge with others. This particular work is one of the few copyrighted individual works included with the permission of the copyright holder. Information on the copyright owner for this particular work and the terms of use imposed by the copyright holder on this work are set forth at the beginning of this work.

1.D. The copyright laws of the place where you are located also govern what you can do with this work. Copyright laws in most countries are in a constant state of change. If you are outside the United States, check the laws of your country in addition to the terms of this agreement before downloading, copying, displaying, performing, distributing or creating derivative works based on this work or any other Project Gutenberg-tm work. The Foundation makes no representations concerning the copyright status of any work in any country outside the United States.

1.E. Unless you have removed all references to Project Gutenberg:

1.E.1. The following sentence, with active links to, or other immediate access to, the full Project Gutenberg-tm License must appear prominently whenever any copy of a Project Gutenberg-tm work (any work on which the phrase "Project Gutenberg" appears, or with which the phrase "Project Gutenberg" is associated) is accessed, displayed, performed, viewed, copied or distributed:

This eBook is for the use of anyone anywhere at no cost and with almost no restrictions whatsoever. You may copy it, give it away or re-use it under the terms of the Project Gutenberg License included with this eBook or online at www.gutenberg.org

1.E.2. If an individual Project Gutenberg-tm electronic work is derived from the public domain (does not contain a notice indicating that it is posted with permission of the copyright holder), the work can be copied and distributed to anyone in the United States without paying any fees or charges. If you are redistributing or providing access to a work with the phrase "Project Gutenberg" associated with or appearing on the work, you must comply either with the requirements of paragraphs 1.E.1 through 1.E.7 or obtain permission for the use of the work and the Project Gutenberg-tm trademark as set forth in paragraphs 1.E.8 or 1.E.9.

1.E.3. If an individual Project Gutenberg-tm electronic work is posted with the permission of the copyright holder, your use and distribution must comply with both paragraphs 1.E.1 through 1.E.7 and any additional terms imposed by the copyright holder. Additional terms will be linked to the Project Gutenberg-tm License for all works posted with the permission of the copyright holder found at the beginning of this work.

1.E.4. Do not unlink or detach or remove the full Project Gutenberg-tm License terms from this work, or any files containing a part of this work or any other work associated with Project Gutenberg-tm.

1.E.5. Do not copy, display, perform, distribute or redistribute this electronic work, or any part of this electronic work, without prominently displaying the sentence set forth in paragraph 1.E.1 with active links or immediate access to the full terms of the Project Gutenberg-tm License.

1.E.6. You may convert to and distribute this work in any binary, compressed, marked up, nonproprietary or proprietary form, including any word processing or hypertext form. However, if you provide access to or distribute copies of a Project Gutenberg-tm work in a format other than

"Plain Vanilla ASCII" or other format used in the official version posted on the official Project Gutenberg-tm web site (www.gutenberg.org), you must, at no additional cost, fee or expense to the user, provide a copy, a means of exporting a copy, or a means of obtaining a copy upon request, of the work in its original "Plain Vanilla ASCII" or other form. Any alternate format must include the full Project Gutenberg-tm License as specified in paragraph 1.E.1.

1.E.7. Do not charge a fee for access to, viewing, displaying, performing, copying or distributing any Project Gutenberg-tm works unless you comply with paragraph 1.E.8 or 1.E.9.

1.E.8. You may charge a reasonable fee for copies of or providing access to or distributing Project Gutenberg-tm electronic works provided that

- You pay a royalty fee of 20% of the gross profits you derive from the use of Project Gutenberg-tm works calculated using the method you already use to calculate your applicable taxes. The fee is owed to the owner of the Project Gutenberg-tm trademark, but he has agreed to donate royalties under this paragraph to the Project Gutenberg Literary Archive Foundation. Royalty payments must be paid within 60 days following each date on which you prepare (or are legally required to prepare) your periodic tax returns. Royalty payments should be clearly marked as such and sent to the Project Gutenberg Literary Archive Foundation at the address specified in Section 4, "Information about donations to the Project Gutenberg Literary Archive Foundation."
- You provide a full refund of any money paid by a user who notifies you in writing (or by e-mail) within 30 days of receipt that s/he does not agree to the terms of the full Project Gutenberg-tm License. You must require such a user to return or destroy all copies of the works possessed in a physical medium and discontinue all use of and all access to other copies of Project Gutenberg-tm works.
- You provide, in accordance with paragraph 1.F.3, a full refund of any money paid for a work or a replacement copy, if a defect in the electronic work is discovered and reported to you within 90 days of receipt of the work.
- You comply with all other terms of this agreement for free distribution of Project Gutenberg-tm works.

1.E.9. If you wish to charge a fee or distribute a Project Gutenberg-tm electronic work or group of works on different terms than are set forth in this agreement, you must obtain permission in writing from both the Project Gutenberg Literary Archive Foundation and Michael Hart, the owner of the Project Gutenberg-tm trademark. Contact the Foundation as set forth in Section 3 below.

1.F.

1.F.1. Project Gutenberg volunteers and employees expend considerable effort to identify, do copyright research on, transcribe and proofread public domain works in creating the Project Gutenberg-tm collection. Despite these efforts, Project Gutenberg-tm electronic works, and the medium on which they may be stored, may contain "Defects," such as, but not limited to, incomplete, inaccurate or corrupt data, transcription errors, a copyright or other intellectual property infringement, a defective or damaged disk or other medium, a computer virus, or computer codes that damage or cannot be read by your equipment.

1.F.2. LIMITED WARRANTY, DISCLAIMER OF DAMAGES - Except for the "Right of Replacement or Refund" described in paragraph 1.F.3, the Project Gutenberg Literary Archive Foundation, the owner of the Project Gutenberg-tm trademark, and any other party distributing a Project Gutenberg-tm electronic work under this agreement, disclaim all liability to you for damages, costs and expenses, including legal fees. YOU AGREE THAT YOU HAVE NO REMEDIES FOR NEGLIGENCE, STRICT LIABILITY, BREACH OF WARRANTY OR BREACH OF CONTRACT EXCEPT THOSE PROVIDED IN PARAGRAPH F3. YOU AGREE THAT THE FOUNDATION, THE TRADEMARK OWNER, AND ANY DISTRIBUTOR UNDER THIS AGREEMENT WILL NOT BE LIABLE TO YOU FOR ACTUAL, DIRECT, INDIRECT, CONSEQUENTIAL, PUNITIVE OR INCIDENTAL DAMAGES EVEN IF YOU GIVE NOTICE OF THE POSSIBILITY OF SUCH DAMAGE.

1.F.3. LIMITED RIGHT OF REPLACEMENT OR REFUND - If you discover a defect in this electronic work within 90 days of receiving it, you can receive a refund of the money (if any) you paid for it by sending a written explanation to the person you received the work from. If you received the work on a physical medium, you must return the medium with your written explanation. The person or entity that provided you with the defective work may elect to provide a replacement copy in lieu of a refund. If you received the work electronically, the person or entity providing it to you may choose to give you a second opportunity to receive the work electronically in lieu of a refund. If the second copy is also defective, you may demand a refund in writing without further opportunities to fix the problem.

1.F.4. Except for the limited right of replacement or refund set forth in paragraph 1.F.3, this work is provided to you 'AS-IS,' WITH NO OTHER WARRANTIES OF ANY KIND, EXPRESS OR IMPLIED, INCLUDING BUT NOT LIMITED TO WARRANTIES OF MERCHANTABILITY OR FITNESS FOR ANY PURPOSE.

1.F.5. Some states do not allow disclaimers of certain implied warranties or the exclusion or limitation of certain types of damages. If any disclaimer or limitation set forth in this agreement violates the law of the state applicable to this agreement, the agreement shall be interpreted to make the maximum disclaimer or limitation permitted by the applicable state law. The invalidity or unenforceability of any provision of this agreement shall not void the remaining provisions.

1.F.6. INDEMNITY - You agree to indemnify and hold the Foundation, the trademark owner, any agent or employee of the Foundation, anyone providing copies of Project Gutenberg-tm electronic works in accordance with this agreement, and any volunteers associated with the production, promotion and distribution of Project Gutenberg-tm electronic works, harmless from all liability, costs and expenses, including legal fees, that arise directly or indirectly from any of the following which you do or cause to occur: (a) distribution of this or any Project Gutenberg-tm work, (b) alteration, modification, or additions or deletions to any Project Gutenberg-tm work, and (c) any Defect you cause.

Section 2. Information about the Mission of Project Gutenberg-tm

Project Gutenberg-tm is synonymous with the free distribution of electronic works in formats readable by the widest variety of computers including obsolete, old, middle-aged and new computers. It exists because of the efforts of hundreds of volunteers and donations from people in all walks of life.

Volunteers and financial support to provide volunteers with the assistance they need, is critical to reaching Project Gutenberg-tm's goals and ensuring that the Project Gutenberg-tm collection will

remain freely available for generations to come. In 2001, the Project Gutenberg Literary Archive Foundation was created to provide a secure and permanent future for Project Gutenberg-tm and future generations. To learn more about the Project Gutenberg Literary Archive Foundation and how your efforts and donations can help, see Sections 3 and 4 and the Foundation web page at <http://www.pgla.org>.

Section 3. Information about the Project Gutenberg Literary Archive Foundation

The Project Gutenberg Literary Archive Foundation is a non profit 501(c)(3) educational corporation organized under the laws of the state of Mississippi and granted tax exempt status by the Internal Revenue Service. The Foundation's EIN or federal tax identification number is 64-6221541. Its 501(c)(3) letter is posted at <http://pglaf.org/fundraising>. Contributions to the Project Gutenberg Literary Archive Foundation are tax deductible to the full extent permitted by U.S. federal laws and your state's laws.

The Foundation's principal office is located at 4557 Melan Dr. S. Fairbanks, AK, 99712., but its volunteers and employees are scattered throughout numerous locations. Its business office is located at 809 North 1500 West, Salt Lake City, UT 84116, (801) 596-1887, email business@pglaf.org. Email contact links and up to date contact information can be found at the Foundation's web site and official page at <http://pglaf.org>

For additional contact information:

Dr. Gregory B. Newby
Chief Executive and Director
gbnewby@pglaf.org

Section 4. Information about Donations to the Project Gutenberg Literary Archive Foundation

Project Gutenberg-tm depends upon and cannot survive without wide spread public support and donations to carry out its mission of increasing the number of public domain and licensed works that can be freely distributed in machine readable form accessible by the widest array of equipment including outdated equipment. Many small donations (\$1 to \$5,000) are particularly important to maintaining tax exempt status with the IRS.

The Foundation is committed to complying with the laws regulating charities and charitable donations in all 50 states of the United States. Compliance requirements are not uniform and it takes a considerable effort, much paperwork and many fees to meet and keep up with these requirements. We do not solicit donations in locations where we have not received written confirmation of compliance. To SEND DONATIONS or determine the status of compliance for any particular state visit <http://pglaf.org>

While we cannot and do not solicit contributions from states where we have not met the solicitation requirements, we know of no prohibition against accepting unsolicited donations from donors in such states who approach us with offers to donate.

International donations are gratefully accepted, but we cannot make any statements concerning tax treatment of donations received from outside the United States. U.S. laws alone swamp our small staff.

Please check the Project Gutenberg Web pages for current donation methods and addresses. Donations are accepted in a number of other

ways including checks, online payments and credit card donations.
To donate, please visit: <http://pglaf.org/donate>

Section 5. General Information About Project Gutenberg-tm electronic works.

Professor Michael S. Hart is the originator of the Project Gutenberg-tm concept of a library of electronic works that could be freely shared with anyone. For thirty years, he produced and distributed Project Gutenberg-tm eBooks with only a loose network of volunteer support.

Project Gutenberg-tm eBooks are often created from several printed editions, all of which are confirmed as Public Domain in the U.S. unless a copyright notice is included. Thus, we do not necessarily keep eBooks in compliance with any particular paper edition.

Each eBook is in a subdirectory of the same number as the eBook's eBook number, often in several formats including plain vanilla ASCII, compressed (zipped), HTML and others.

Corrected EDITIONS of our eBooks replace the old file and take over the old filename and etext number. The replaced older file is renamed. VERSIONS based on separate sources are treated as new eBooks receiving new filenames and etext numbers.

Most people start at our Web site which has the main PG search facility:

<http://www.gutenberg.org>

This Web site includes information about Project Gutenberg-tm, including how to make donations to the Project Gutenberg Literary Archive Foundation, how to help produce our new eBooks, and how to subscribe to our email newsletter to hear about new eBooks.

EBooks posted prior to November 2003, with eBook numbers BELOW #10000, are filed in directories based on their release date. If you want to download any of these eBooks directly, rather than using the regular search system you may utilize the following addresses and just download by the etext year.

<http://www.ibiblio.org/gutenberg/etext06>

(Or /etext 05, 04, 03, 02, 01, 00, 99,
98, 97, 96, 95, 94, 93, 92, 91 or 90)

EBooks posted since November 2003, with etext numbers OVER #10000, are filed in a different way. The year of a release date is no longer part of the directory path. The path is based on the etext number (which is identical to the filename). The path to the file is made up of single digits corresponding to all but the last digit in the filename. For example an eBook of filename 10234 would be found at:

<http://www.gutenberg.org/1/0/2/3/10234>

or filename 24689 would be found at:
<http://www.gutenberg.org/2/4/6/8/24689>

An alternative method of locating eBooks:
<http://www.gutenberg.org/GUTINDEX.ALL>

*** END: FULL LICENSE ***